


Christian BERTIN

KURSO PRI

RAPIDA LEGADO



Eldonoj Christian Bertin

KURSO PRI RAPIDA LEGADO

1986

Aŭtoro :

Christian BERTIN
CCETT AIS
B.P : 59
Rue du Clos Courtel
F-35510 CESSON-SEVIGNE
FRANCIO

©Eldonita de la aŭtoro

1 Enkonduko

En nia moderna vivo, kvankam aŭdvidaj rimedoj (radio, televido, magnetofono, videobenda aparato) ludas pli kaj pli gravan rolon en nia informado, la legado restas la plej grava rimedo por akiri scion kiel montras la sekvanta tabelo :

Komparo de diversaj agrapidoj

Indico	Ago	Signoj/horo
33	tajpado	16 500
100	parolado - aŭskultado	49 500
170	malrapida legado	82 500
300	mezrapida legado	148 500
500 600	rapida legado	247 500 297 000
1200	selektiva malrapida legado	450 000
2400	selektiva rapida legado	900 000
3000	genia legado	1 500 000
12000	selektiva genia legado	4 500 000

Sekve eĉ malrapida leganto akiras scion pli rapide per legado ol per aŭskultado. Plie la supereco de la legado super la aŭskultado por la akiro de scio povas pligrandiĝi per uzo de adekvataj legezercoj.

Kiom da fojoj vi jam diris : tion mi devus legi sed hodiaŭ mankas al mi la tempo, kaj tiel vi prokrastas la legadon de libro, dokumento aŭ raporto eble tre utila por via eduko aŭ por via ĉiutaga laboro.

Se vi regule praktikas la ekzercojn de tiu libro dum unu monato, via legrapido devus progresi almenaŭ je 50% ĝis 150% (escepte se vi jam ekzercis vin per alia metodo) sen malpliboniĝo de la kompreno.

Memoru ke por atingi tian rezulton, ne sufiĉas tralegi tiun libron, necesas regule trejni sin.

Iuj personoj timas ne memori se ili pli rapide legas. Tio estas eraro. Eksperimentoj pruvis ke plirapida legado fakte plibonigas la komprenon de la legata teksto.

La legrapido de ĉiu leganto varias depende de la sekvantaj kondiĉoj :

La facileco de la teksto : La teksto povas esti facile legebla (novaĵo en gazeto) aŭ malfacile legebla (teksto kun multaj fakaj vortoj nekutimaj al vi aŭ kun multaj person-nomoj, datoj kaj nombroj). Vi certe legos la unuan pli rapide ol la duan.

La strukturo de la teksto : Se la aŭtoro de la teksto redaktis ĝin laŭ la reguloj kutimaj al vi, vi certe legos ĝin pli rapide kaj plie vi certe pli bone komprenos kaj memoros ĝin.

Via interesiĝo pri la teksto : Se la enhavo de la teksto estas aparte grava por vi aŭ se temas pri teksto rilata al via ŝatokupo, vi certe legos ĝin pli rapide ol multaj aliaj tekstoj.

La stilo de la aŭtoro : Se ĝi estas agrabla al vi, via legrapido estos certe pli alta.

Viaj antaŭaj konoj : Se la teksto rilatas al tute ne konata temo aŭ male liveras al vi nur kelkajn precizigojn meze de aliaj bone konataj faktoj, via legrapido estos multe pli alta por la duatipaj tekstoj.

Via koncentriĝa kapablo : Depende de via laceco, depende de via mensostato (ĉu vi estas maltrankvila aŭ ne) vi kapablos aŭ ne kapablos konservi vian atenton al la teksto. En la lasta kazo vi ofte konstatos ke vi tute ne komprenis ĵus legitan frazon. Pro tio vi devos relegi frazojn kaj tio malaltigas vian legrapidon.

La legkondiĉaj (bruo, lumo, komforto) : Se vi legas en stacidomo, mce de ludantaj infanoj aŭ sole en senbrua ĉambro, via legrapido estos tute malsama en la diversaj cirkonstancoj.

Se vi malbone vidas la legatan tekston pro manko de lumo, vi certe malpli rapide legos. Necesas bona lumado por ne laciĝi la okulojn.

Se vi sidas aŭ kuŝas sur lito por legi, vi rapide laciĝos. Plej bone estas sidi ĉe tablo sur seĝo kun dorsapogilo. La komforto devas esti nek tro bona (por ne ekdormi) nek tro malbona (por ne suferi).

La aspekto de la teksto : Vi pli rapide legos tre kontraste presitaj tekstoj. Se la uzitaj litertipoj estas kutimaj, tio faciligos vian legadon.

2 Analizo de la legado


En la lernejo, kiam vi estis infano, vi verŝajne lernis la legadon laŭ la kutima maniero. Unue vi lernis kiel prononci laŭvoĉe la diversajn literojn de la alfabeto de via lingvo. Due vi lernis kiel laŭvoĉe prononci la diversajn silabojn, kiuj troviĝas en la vortoj de via lingvo. Trie vi lernis kiel laŭvoĉe literumi la literojn de vorto kaj poste kiel laŭvoĉe prononci ĝin, silabon post silabo. Kvare vi lernis kiel laŭvoĉe legi frazojn, silabon post silabo, vorton post vorto. Vi tiel lernis, ĉar la instruist(in)o bezonis kontroli ĉu vi bone prononcis aŭ ne.

Tiam la instruist(in)o konsideris ke vi kapablis legi kaj ke la legadinstruo estis finita. Por la lerneja sistemo, vi estis preta por legi ĉion, kion vi bezonos legi en via vivo. Bedaŭrinde la

instruado de la legado ne iras pluen en la lernejoj. Poste, per vi mem, vi senkonscie praktikis la legadon pro viaj bezonoj kaj tiel multe aŭ nur iomete progresis en la legado.

2.1 Artikulaciado kaj subartikulaciado

Iuj legantoj konservis de sia leglerna tempo la kutimon laŭtvoĉe aŭ mallaŭtvoĉe legi. Ili bezonas la aŭdon de la vortoj por kompreni tion kion ili legas. Por tiuj legantoj la vojo de la legado estas tia :



Aliaj legantoj flustras la vortojn dum la legado, tio signifas ke ili parolas sen vibrigi la voĉkordojn. Se ankaŭ vi faras tion, vi devas forigi tiun kutimon por silente legi.


Ofte legantoj, kiuj emas artikulacii, kutimas montri per la fingro al la vortoj, kiujn ili legas. Se ankaŭ vi faras tion dum la legado, vi devas nepre forigi tiun kutimon se vi volas pli rapide legi.

Se viaj lipoj moviĝas dum la legado, ankaŭ tio estas forigenda. Por kontroli tion, legu premante inter viaj lipoj plej maldikan folieton. Se la folieto moviĝas dum la legado, tiam vi devas forigi tiun kutimon.

Alia kontrolo : premu vian gorĝon dum la legado per via polekso kaj via montra fingro. Se ĝi moviĝas dum la legado, tiam vi devas forigi tiun kutimon por pli rapide legi.

Subartikulaciado estas artikulaciado de vorto nur en la menso sen movi la laringon. La bezono aŭskulti la prononcon de la vortoj, kiujn oni legas estas tute ne necesa kaj ĉar ĝi malpli rapidigas la legadon, ĝi estas forigenda.

La vojo de la plej rapida legado estas tia :



Por lerni kiel pli rapide legi, vi devas elekti tekston por ekzerco. Tio signifas ke vi legos ĝin sen la celo kompreni kaj memori ĝin, sed nur kun la celo ekzerci vian legkapablon. Tiu teksto povas esti paĝoj de libro, raporto aŭ gazetartikolo. En tiu ekzerco vi devas movi viajn okulojn pli rapide ol vi kutime faras por legi. Sekve de tiu ekzerco, se vi kutime flustre legas, tiam la legado okazos tro rapide por lasi al vi la tempon flustri ĝin. Same se vi laŭtvoĉe legas aŭ subartikulacias. Tiu ekzerco ne lasos la tempon al via kutimo por normale efektiviĝi.

Jen resumo de la konsiloj por pli rapide legi :

- Forigi laŭtvoĉan legadon.
- Forigi mallaŭtvoĉan legadon.
- Forigi flustran legadon.
- Forigi legadon kun montrilo al la vortoj per la fingro.
- Forigi legadon kun gorĝaj aŭ lipaj movoj.
Sen la superaj handikapo, vi jam povas legi je 180 000 signoj en horo.
- Forigi subartikulacian legadon.

Kiel forigi tiujn handikapojn :

- Elekti tekston kiun vi ne intencis legi pro manko de intereso.
- Legi ĝin pli rapide ol kutime por ne lasi la tempon al via handikapo normale agi.

2.2 *La legkampo*


Plie, necesas bone scii, kio estas la legado, kiel ĝi funkcias.

Eble vi kredas ke dum la legado, la okuloj senhalte moviĝas laŭ la linioj de la legata teksto de la unua vorto ĝis la lasta vorto de la teksto. Tio estas tute erara. D-ro Emile JAVAL (p: emil javal) (legi en anekso 1 pri liaj rilatoj al D-ro Zamenhof), direktoro de la oftalmologia laboratorio en la Sorbono (Parizo) malkovris en 1878 ke la movo de la okuloj dum la legado ne estas kontinua sed interrompiĝas tre ofte kaj nur dum tiuj okulhaltoj vere okazas la legado.

Dum kvarono da sekundo (250 ms), la okuloj de mezrapida leganto fiksis grupon da signoj de la teksto, poste rapide moviĝas dum kvardekono da sekundo (25 ms) por denove fiksi novan grupon da signoj dum kvarono da sekundo, k.t.p. La okuloj de infano en sia unua jaro de leglerno ĉiufoje haltas dum du trionoj da sekundo (660 ms) kaj en la kvina jaro de leglerno ili ĉiufoje haltas dum kvarono da sekundo (250 ms).

Necesas scii ke la rapida leganto movas siajn okulojn malpli rapide ol la malrapida leganto kaj tiel prokrastas la laciĝon de siaj okulmuskoloj; tamen la diferenco estas malgrava.

La diferenco inter rapida kaj malrapida leganto kuŝas do unue en la diferenco de la okulhaltoj.



Ni ĉiuj bone scias, kio estas la vidkampo (vidi apudan bildon) sed la legkampo estas tute alia afero. Por bone kompreni ĝin, prenu libron kaj rigardu ĝin, vi bone vidas ĝin sen movi la okulojn. Sed se vi volas legi la titolon kaj ĉiujn vortojn skribitajn sur la kovrilo, vi devas movi la okulojn ĉar vi povas legi nur tion kio estas en via legkampo, kaj via legkampo estas tute malgranda kompare al via vidkampo.

•

Jen unu el la ĉefaj diferencoj inter la rapida kaj la malrapida legantoj : la amplekso de la legkampo. La vidkampon oni mezuras per angulo sed la legkampo ne estas mezurata per angulo sed per nombro da signoj. Por mezuri vian legkampon, en la sekvanta kolumno, fikse rigardu la centron de ĉiu linio (indikita per krisigno) kaj provu legi ĉiun linion sen movi la okulojn. Per papero vi devas kaŝi la sekvantajn liniojn kaj malkovri ilin unu post la alia. Vi konos la amplekson de via legkampo kiam vi bezonos movi la okulojn sur iu linio maldekstren kaj dekstren por legi ĉiujn vortojn de tiu linio. La unua linio enhavas 3 signojn, la dua 5 kaj la lasta 29 signojn, se oni kalkulas la spaceton inter la vortoj kiel signon.

tie (3)
 !
 nenio (5)
 !
 sinjoro (7)
 !
 diligenta (9)
 !
 helikoptero (11)
 !
 defendsistemo (13)
 !
 partoprenantaro (15)
 !
 plurjara praktiko (17)
 !
 eksterlanda turisto (19)
 !
 ekologia kaj ekonomia (21)
 !
 pacienca eksperimentado (23)
 !
 la decido ne estis facila (25)
 !
 sugestoj pri saĝa elspezado (27)
 !
 staris tabuleto kun la vortoj (29)
 !

La malrapida leganto havas legkampon ampleksan je 5 aŭ 10 signoj kaj la rapida leganto havas legkampon ampleksan je pluraj dekoj da signoj.

Por ĉiu leganto, la okulhalta tempo estas preskaŭ la sama, sendepende de la enhavo de la legkampo. Tio signifas ke vi bezonas la saman tempon por legi 5-signan aŭ 25-signan vorton, se via legkampo kovras ĝin.

Nun vi pli bone komprenas ke se via legkampo ebligas al vi legi maksimume 9 signojn, alia leganto kun legkampo je 27 signoj legos 3-oble pli rapide ol vi; sed vi jam legas 3-oble pli rapide ol leganto kun legkampo je 3 signoj.

Pro tiu vasteco de la legkampo, infano en sia unua jaro de leglerno haltigas siajn okulojn 18-foje en ĉiu linio, dum infano en sia kvina jaro de leglerno haltigas siajn okulojn nur 7-foje en ĉiu linio.

2.3 *La necesaj okulmovoj*

Ekzistas du necesaj okulmovoj : la okulmovoj inter du sinsekvaj haltoj sur la sama linio kaj la okulmovoj de la lasta halto fine de iu linio al la unua halto komence de la sekvanta linio (sur la sama paĝo aŭ sur du paĝoj).

La celo de tiuj okulmovoj estas la kovrado de la tuta legata teksto per legkampoj.

Por pli rapide legi, du legkampoj devas sin kovri nur iomete, kiel vi povas vidi sur la sekvanta figuro :



Se la sinsekvaj legkampoj sin kovras tro multe, vi devos pli ofte haltigi viajn okulojn en ĉiu linio ol necesas. Se ili ne sin kovras almenaŭ iomete, de tempo al tempo vi preterpasos vorton kaj devos fari retroan okulmovon por legi ĝin. En la du kazoj vi legas malpli rapide ol vi povus legi.

Aparta okulmovo estas tiu necesa por iri de la lasta legkampo fine de linio al la unua legkampo komence de la sekvanta linio. Se la movo estas tro longa, via legkampo ne estos plena kaj sekve, eble vi bezonos plian okulhalton en tiu linio por legi ĝin. Se la movo estas tro mallonga, la unua vorto de la linio ne estos en via legkampo kaj sekve vi devos fari plian okulmovon maldekstren por kovri la unuan vorton per via legkampo.

Fakte tiuj okulmovoj devas adaptiĝi al la formo de la teksto. Vi al kutimiĝas al la formato de la linioj kaj viaj okulmovoj alĝustiĝas al la legata teksto. Al tio helpas via pozicio rilate al la dokumento. Necesas esti en komforta pozicio (tamen ne tro por ne ekdormi), ni diru en nelaciga pozicio, tio estas sidi kun rektaj korpo kaj kapo kun la vizaĝo ne tro klinita, sur seĝo ne tro mola nek tro malmola.

2.4 La retroaj okulmovoj

La retroaj okulmovoj estas nenecesaj movoj de la okuloj por reiri al jam legita parto de la teksto. Tiuj retroaj okulmovoj okazas en la sekvantaj kazoj :

Konfuziĝoj : Tio okazas kiam vi erare legas vorton, ĉar ĝi similas al alia vorto. Por ekzemplo vi legas "ano", "vosto" aŭ "pezo" kiam en la teksto estas "amo", "vorto" aŭ "prezo". Pro tiu erara legado, vi tute ne komprenos la frazon, kiu entenas tiun vorton kaj vi devos retromovi viajn okulojn ĉe la komenco de tiu frazo por relegi malpli rapide kaj malkovri dum dua legado vian legeraron. Vi trovos en la sekvanta ĉapitro ekzercojn por lerni kiel pli bone distingi similaspektajn vortojn kaj tiel kiel eviti viajn konfuziĝojn.

Tro rapida legado : Se vi tro rapide legas, vi ne kapablas kompreni la frazojn kaj sekve vi bezonas retromovi viajn okulojn por relegi jam legitajn frazojn. Se temas pri ekzerco por plirapidigi la okulmovojn, ne gravas ĉar vi ne bezonas, nek intencas, retromovi viajn okulojn. Sed se temas pri teksto, kiun vi volas kompreni, tiam vi devas reveni al via kutima legrapido por eviti tro oftajn retroajn okulmovojn.

Malfacila teksto : Vi legas je via normala rapido sed la teksto estas pli malfacila ol kutime eble pro multaj person-nomoj, ciferoj aŭ datoj, aŭ pro teknikaj vortoj. En tiu kazo vi devas malpli rapidigi vian legadon ol kutime por eviti tro oftajn retromovojn.

Manko de atento : Vi legas je via normala rapido sed intereso mankas al vi por la teksto. En tiu kazo vi devas demandi vin, ĉu vere la legado de tiu teksto estas necesa. Se jes, vi devas prepari vin antaŭ ol legi. Vi devas serĉi motivojn por legi ĝin, fari demandojn al kiuj la legota teksto devus respondi.

La manko de atento eble ŝuldiĝas al via laceco, en tiu kazo, prokrastu la legadon ĝis ellaciĝo aŭ trinku kafon.

2.5 La memoro en la legado

Necesas ankaŭ kompreni kio okazas en nia cerbo, kiam ni legas. Ni disponas pri memoro, kiu konsistas el du partoj : la ĵustempa memoro kaj la longtempa memoro.

La ĵustempa memoro konservas la bildon de la viditaĵoj nur dum kelkaj sekundoj. Tiel ni memoras la numeron de paĝo post lego de tabelo de la enhavo dum ni foliumas la libron por trovi tiun paĝon. Tiel ni kapablas memori telefon-numeron ĵus legitan en la jarlibro por numerumi ĝin; sed se la vokintlineo estas okupita, tiam kutime ni jam forgesis la numeron kaj ne kapablas denove numerumi sen rigardi ĝin.

La ĵustempa memoro ebligas al ni, kiam ni legas la lastajn vortojn de frazo, ankoraŭ memori la unuajn vortojn de tiu frazo.

Tiam la menso povas analizi la frazon en la ĵustempa memoro kaj trovi ties signifon. Poste la ĵustempa memoro forgesas la vortojn sed la signifo de la frazo eniras la longtempan memoron.

Nun vi certe komprenas kial kelkfoje vi legas la finon de frazo kaj konstatas ke vi tute ne komprenis ĝin. Fakte la legado de tiu frazo daŭris tro longtempe kaj via ĵustempa memoro jam forgesis la unuajn vortojn, tial via menso ne plu povas analizi ĝin.

Oni konstatis per eksperimentoj ke la kapacito de la ĵustempa memoro de rapida leganto superas tiun de malrapida leganto. Tio estas komprenebla, kiam vi scias ke la daŭro de konservado de la ĵustempa memoro estas preskaŭ la sama por ĉiuj personoj; sed dum tiu daŭro, la rapida leganto legas pli da vortoj, sekve pli da vortoj eniras lian ĵustempan memoron kredigante ke lia ĵustempa memoro havas pli grandan kapaciton.

La konkludo estas evidenta : "JU PLI RAPIDE VI LEGAS DES PLI BONE VI KOMPRENAS". Mi esperas ke, per tiuj klarigoj, mi forpelis ĉiujn viajn eventualajn timojn pri malbona memorado kaze de pli rapida legado. Kompreneble se vi movas viajn okulojn pli rapide ol via maksimuma legrapido, tiam via kompreno malkreskas. La celo de tiu metodo estas plialtigi vian maksimuman legrapidon sen perdo de kompreno.

3 La kompleta legado

Tio estas legado en kiu la leganto movas siajn okulojn por kovri ĉiujn vortojn de la teksto per sia legkampo.

Por povi mezuri viajn progresojn en la legado, necesas unue mezuri vian nunan legrapidon.

Iuj metodoj utiligas la nombron de vortoj kiel mezurunuon, sed depende de la teksto (romano, raporto, scienca artikolo, ktp.) la longo de la vortoj povas multe varii de iu teksto al la alia.

Por teksto en la franca lingvo, oni konsideras ke la meza longo de vorto estas 5,5 (tio signifas ke la meza vorto en la franca lingvo havas 5 aŭ 6 literojn). Kompreneble tiu mezurunuo ne estas oportuna se oni deziras kompari la legrapidon de diverslingvaj legantoj, ĉar la meza longo de vorto varias de iu lingvo al la alia.

Aliaj metodoj (kaj ĉi tiu) elektis la nombron de signoj kiel mezurunuon. Kio estas signo en teksto ? Signo povas esti iu ajn presita signo inkluzive de interpunkcio kaj spaceto.

Estas necese ripeti ke "rapida legado" estas nur la unua celo, la dua estas "bona kompreno". Sekve por ĉiu legota teksto ni mezuros kaj la legrapidon kaj la komprenon. Por mezuri la komprenon, ni aldonis post ĉiu teksto, demandojn kun eblaj respondoj. Inter ili troviĝas la bona respondo prenita el la teksto mem. Vi mem devos elekti unu sen rigardi al la teksto.

Por mezuri vian legrapidon, vi bezonas kronometron aŭ horloĝon, kiu indikas la sekundojn kaj vi devas fari tiel :

- Se vi havas nur sekundmontran horloĝon, skribu ĉe angulo la nombron de la venonta minuto (se estas 8h 12mn 35s, skribu 13) kaj atendu la komenciĝon de la venonta minuto por eklegi.
Se vi havas kronometron sufiĉas premi la butonon, kiam vi estas preta.
- Ĉe la fino de la legado rigardu vian horloĝon kaj skribu la precizan momenton, kiun ĝi indikas.
- Respondu la demandojn, kiuj estas post la teksto (sen rigardi la tekston).
- Kalkulu la tempon pasintan por legi la tekston.
- Rigardu al la tabelo post la demandoj por trovi vian legrapidon.
- Kontrolu viajn respondojn al la demandoj kaj mezuru vian legkomprenon : 100 % por 10 bonaj respondoj, 90 % por 9 bonaj respondoj, 80 % por 8 bonaj respondoj ktp.

Kompleta legado teksto 1 :

El "Paŝoj al plena posedo" de W.AULD.
eldonita de "Heroldo de Esperanto"

AVINJO

— Ni restu en mallumo — li petis. — Estas tiom ripozige aŭdi bruon de la ondoj inter la rifoj, kaj nenion vidi. —

Mi estingis la lampon malantaŭ ni. La teraso fariĝis tute malhela. Dum momento, nenio estis videbla; sed baldaŭ ni perceptis konturojn de la sveltaj kolonetoj; sub necerta lumo falanta de miriadoj da steloj, la sablo, la rifoj, la maro nigris malsame. Niaj vizaĝoj fantomis pale unu al la alia. Kaj mi komprenis, ke mia amiko estis preta ellasi per konfidenco la tro streĉitajn nervojn. Cigaredo fosforeskis. Dum ĝia ekfajriĝo, mi rimarkis la kuntiritajn brovojn de mia amiko.

— Nu, mi bezonas konsilon.

— Diru.

— Mi devas mortigi mian avinjon, kaj ne scias kiel. Mi eksaltis:

— Ho!

— Jes. Mi devas mortigi ŝin.

— Sed kial?

— Ĉar ŝi jam mortis.

— Kion vi diras?

De sia reveno el Francujo, mia amiko ŝajnas eviti min, kaj, la tre malmultajn fojojn kiam mi povis alparoli lin, li aspektis ne tute sana mense. Li ne atentis; li ne respondis, aŭ respondis post kelkaj minutoj. Li agis kaj parolis hezite, nedecide, kvazaŭ obseda ideo posedus lin. Kaj nun... Ĉu tiu estis la obsedo?

— Jes. Ŝi jam mortis; kiel do mi povas fari, ke ŝi mortu?

— Ŝi? Avinjo Dalia? Ĉu vi parolas pri avinjo Dalia?

— Jes. Ĉu vi memoras ŝin?

Mi memoris la maljunulinon; preskaŭ naŭdekjara ŝi estis: sulka vizaĝo, hezitema voĉeto, ne plu vigla menso. La tutan tagon ŝi estis dormetanta kvazaŭ infano kiu pene trenas sin atendante baldaŭan definitivan endormiĝon. Avinjo Dalia, laca el sia longa vivo... Ĉu ŝi definitive endormiĝis?

— Aŭskultu, kaj ne interrompu min. Alie, mi ne kuraĝos ĉion rakonti.

Mi silentis obeeme. La maro daŭre grumblis inter la rifoj.

— Nu, kiam mi planis tiun vojaĝon al Côte d'Azur, avinjo Dalia neatendite ekvigliĝis. Lastan fojon, ŝi diris, mi volas vojaĝi; prenu min kun vi en via aŭtomobilo; kia ĝeno mi estos por vi? Vi kalkulu havi unu plian

99

valizon; kaj tiel plu. Elna pledis por la afero de avinjo ĉe mi: finfine, kompatinda avinjo, kiajn ĝojojn ŝi havis de la vivo? Tri militoj venis kaj pasis, kaj ĉiam ŝi restis en sia provinca urbeto; la mondo ŝanĝiĝis, ŝi ne konas ĝin; se ŝi tiom deziras tiun vojaĝon, nu lasu...

Mi fine cedis al mia edzino kaj al avinjo Dalia. Foriris ni tri. Pasportoj, kofroj, devizoj, ŝaloj kaj kaŭĉuka botelo por avinjo. Kaj triumfe avinjo Dalia marŝis sur la laŭstranda promenejo de Cannes. Eble ŝia maljuna koro tro pleniĝis je

maro, je ĉielo, je luma ĝojo de sunsubiroj: eĉ de sia propra sunsubiro. Ĝi krevis.

— Ho! Mi ne sciis!

— Silentu. Neniu sciis. Neniu scias. Ĉar ni komprenis, ke transporto de kadavro al nia lando kostos terure, ke oni devos plenumi nedireble multajn formalaĵojn, ke ni certe devos malfruigi nian revenon hejme je tagoj, eble je semajnoj, kaj tio signifus bato por mia entrepreno, por mia laboro, ni diris al neniu, ke avinjo mortis. Inter Elna kaj mi ne estis diskutoj. Ni tuj vestis avinjon por vojaĝi: ŝi veturos kun ni, en ombra angulo de nia aŭto, kovrita per ŝaloj. Malmultaj horoj dividis nin de nia hejmlanda limo: ŝi mortos oficiale tuj trapasinte ĝin, de ĝi nia urbo ne estas malproksima. Tien alvenintaj, ni esperis, ke nia familia kuracisto helpos nin, eventuale deklarante, ke la morto okazis unu-du horojn pli malfrue ol la vero, do trapasinte la landlimon.

Ni ekveturis tuj: ni pagis hotelkonton, ŝarĝis nian aŭton per valizoj kaj, profitante el la fakto, ke la ĉambro de avinjo havis fenestropordon al la ĝardeno de la hotelo (ni ne volis, ke ŝi estu devigata grimpi ŝtupojn), portis tien la veturilon kaj situigis avinjon sidanta sub aro da ŝaloj. La kapo, apogiĝis dormmiene sur ŝultro: pala kiel ĉiam, ŝi ŝajnis, kiel ĉiam, dormeti.

Mi forglutis kilometron post kilometro, piedon sur la akcelilo, okulojn al rapid-montrilo. Jen la limo. Ni donis la tri pasportojn. Niaj koroj — niaj du koroj batis; neniu rimarkis, ke ne batas la tria.

Do, oficiale, laŭ la stampo sur sia pasporto, avinjo Dalia eniris vivanta nian landon.

Vespero estis falanta. Ni veturis inter montoj krute minacaj. Neniu el ni emis paroli. Ni sentis interese la ĉeeston, kaj samtempe la malĉeeston, malantaŭ ni, de

100

avinjo Dalia.

Subite Elna ekparolis:

— Tamen, — ŝi diris — oni devos manĝi.

Jes, sed kiel...

Nu... Ni haltigu la veturilon en malluma strateto; poste, ni — ni du — serĉos restoracion kaj manĝos.

Ni estis enirantaj mezgrandan urbon. Jen taŭga strato: malluma, silenta, soleco. Neniu ĝenos la grandan dormon de avinjo Dalia. Mi ŝlosis akurate ambaŭ pordojn de nia veturilo.

Post kelkaj minutoj, la lumoj, la bruo, la miksitaj odoroj de restoracio malstreĉis niajn nervojn kaj iom distris niajn deprimitajn spiritojn. Bonega vespermanĝo kaj taŭgaj alkoholaĵoj plie helpis nin momente forgesi pri la dormantino en senluma veturilo.

Jam estis la deka vespere kiam ni pagis kaj eliris. Ni iom penis trovi la strateton; sed, kvankam ni streĉis niajn okulojn en la mallumo, neniel ni povis vidi nian aŭtomobilon. Kaj ni devis konvinkiĝi, ke oni ŝtelis ĝin. Kun avinjo ene.

Strange, dum mia lango pasis febre sur miaj sekaj lipoj mi ne pensis pri nia situacio, nek pri la perdo de mia veturilo, nek pri avinjo Dalia. Mi pensis pri la ŝtelistoj. Kian mienon ili

havos, kiam ili malkovros la kadavron! Kaj mia dua penso estis: ni devas trovi ĉiukaze la veturilon, sed ni ne povas turni nin al la policejo: ili pridemandus nin, volus scii kion enhavis la aŭtomobilo. Nia nura espero estis, ke la ŝtelistoj, kiel ofte okazas, forlasu la aŭton, eventuale sen kromrado, sen radio, sen valizoj, sen la diablo kiu forportu ilin... sed kun avinjo.

Ni luis taksion. Ni pasigis tri kvaronojn de la nokto laŭirante ĉiujn stratojn, vojojn, placojn kaj stratetojn de tiu damnita urbo. Mi povas certigi al vi, ke mi konas ĝin parkere. Mi detale vizitis ĝin. Tute detale.

Nenio.

Ni maldungis la taksion. Ni pagis fabelan lu-prezon kaj ne aldonis trinkmonon. La taksiisto foriris ne sciante ĉu ĝoji pro la longa dungado aŭ ĉu grumbli pro manko de trinkmono. Mi opinias, ke li faris ambaŭ.

Jen ni en flavromana situacio. Ni sentis nin krimuloj.

Nur, anstataŭ havi la problemon senigi nin de kadavro,

101

ni devis solvi tiun rehavi nian kadavron. Sen kadavro, ni estas perditaj.

Grize mateniĝis. Pluveto ekfalas. Sed ni ne atentis ĝin. Ni estis marŝantaj sencele, senpense laŭ kampara vojeto ekster la urbo. Laceco, emocioj, timigo malplenigis niajn kapojn. Elna donis al mi duonkuraĝige la brakon. Mi dankis per rideto senkolora.

Subite, en la duba lumo, jen vizio. Ĝi frapis nin kvazaŭ nerealeco. Nia veturilo fantomis, kotmakulita, antaŭ ni, ĉe kurbo de tiu vojeto. Mi legis kaj relegis la numeron sur la ŝildo. Nenia dubo, estis ĝi! Ni kuris, mi febre malfermis pordon ĉe kiu la ŝlosilo jam ne plu estis bezonata...

Avinjo ne estis tie. Valizoj, ŝaloj, radio, kromrado, ĉio netuŝita. Sed avinjo mankis.

Ni nin rigardis senespere. Kien la ŝtelistoj povis ĵeti ŝin? Ni serĉis en la proksimaj kampoj. Ni serĉis inter la arbitaroj. Nenio. Ni revenis al la aŭto, ĉiam serĉante, eĉ sub ĝi...

"Ĉu mi povas helpi? — demandis proponi preterpasanta kamparano — Ĉu vi perdis ion?"

"Jes. Kadavron! — senvole elbuŝigis Elna per raŭka voĉo.

La kamparano haltis, gapis momenton, senmova, senesprima. Poste li ruĝiĝis:

"Ne, mi ne vidis ĝin... — li balbutis, kaj forkuris.

Kion fari nun? Ni ne povis iri al policejo, diri ke oni ŝtelis kadavron. Ni ne povis diri, ke avinjo forkuris: duonparalizita naŭdekjarulino ne forkuras tiel. Ni ne povis deklari, ke ŝi malaperis: kiam oni trovas la kadavron (mia Dio, kie? kiel?), oni konstatus, ke ĝi estis ĵetita jam post morto el la aŭtomobilo: tio estas ele-mente simpla; kaj ni... teruro!

Ni reengrimpis la aŭtomobilon. Mi silente startis. Ni veturis malrapide al nia urbo, al nia domo. En mia poŝo, sur pasporto, kuŝis avinjo vivanta; en mia veturilo tamen ne plu kuŝis avinjo mortinta.

Ni venigis hejmen niajn gekuzojn, kaj pristudis la situacion, kiun mi sincere klarigis al ili. Kaj, jen nova problemo. Avinjo Dalia, kiel vi scias, estis riĉa. Ŝi posedis

multon; ŝi kompreneble testamentis, preskaŭ certe je favoro de ĉiuj ŝiaj nepoj. Sed la testamento kuŝas fermita en tirkesto de ŝia komodo; kiel malfermi ĝin? Kiel pruvi, kiel diri eĉ al geamikoj, ke ŝi mortis? Ŝi laŭleĝe vivas kaj eniris nian landon vivanta. Intertempe, ni neniun vidas, al neniun parolas, vivas solaj, kiel pestmalsanuloj evitas ĉies kontakton. Nur vin mi enlasis ĉivespere, profitante el momenta foresto de Elna. Kaj mi enlasis vin por peti, por preĝi vin: helpu min ne frenezigi, sugestu al mi rimedon, por mortigi mian avinjon... —

La maro ĉiam grumblis inter la rifoj. Mi ne vidis solvon, nek en la nigra inko bruete moviĝanta sub ni, nek en la lumetanta veluro silente etendiĝanta super ni.

Avinjo Dalia, kie vi estas?

Clelia Conterno Guglielminetti
(el "La Suda Stelo")

Via legtempo : sekundoj

Respondu la sekvantajn demandojn :

1. En kia loko babilas la du amikoj ?
 - a) sur teraso.
 - b) en domo.
 - c) en restoracio.

2. Kial la rakontanto fine decidis kunpreni avinjon Dalia por la ferioj ?
 - a) ĉar ili ne povis lasi ŝin sola hejme.
 - b) ĉar ili kompatis ŝin kaj lian vivon.
 - c) ĉar ili devis viziti unu el ŝiaj familianoj.

3. Kie ili pasigis la feriojn ?
 - a) en Hispanio.
 - b) en Francio.
 - c) en Italio.

4. Kia estis avinjo Dalia ?
 - a) ŝercema kaj babilema.
 - b) helpema kaj laborema.
 - c) dormetanta kiel infano dum la tuta tago.

5. Kial ili sukcesis sensciige porti ŝin al la aŭto el la hotelo ?
 - a) ĉar ili profitis mallumon.
 - b) ĉar la ĉambro de avinjo havis fenestropordon.
 - c) ĉar ŝi mortis nur en la aŭtomobilo.

6. Kiel ili serĉis sian aŭtomobilon post ties ŝtelo.
 - a) per luita taksio.
 - b) piede dise unu de la alia.
 - c) helpe de familianoj.

7. Kiu proponis helpon dum la serĉado de la aŭtomobilo ?
 - a) policano.
 - b) vagabondo.
 - c) kamparano.

8. Kial ili forlasis la aŭtomobilon ?
 - a) por serĉi restoracion.
 - b) por aĉeti manĝaĵojn.
 - c) por viziti kaj peti konsilojn de amiko.

9. Kion ili decidis post vana serĉo de la kadavro ?
 - a) iri al policejo.
 - b) venigi siajn gekuzojn.
 - c) venigi sian familian kuraciston.

10. Kiel la geedzoj kondutas hejme post reveno ?
 - a) ili tute normale vivas kiel antaŭe.
 - b) ili vidas neniun, parolas al neniun.
 - c) ili renkontas multajn amikojn por provi trovi solvon.

La teksto enhavas 8509 signojn. Nun, per la sekvanta tabelo vi povas kalkuli vian legrapidon en signoj en unu horo.

legtempo	I legrapido
1'	510 540 s/h
2'	255 270 s/h
2'30	204 216 s/h
3'	170 180 s/h
3'30	145 868 s/h
4'	127 635 s/h
5'	102 108 s/h
6'	85 090 s/h
7'	72 934 s/h
8'	63 817 s/h
9'	56 726 s/h

Via proksimuma legrapido : s/h

Vi povas mezuri vian komprenon per komparo de viaj respondoj al la demandoj kun la sekvanta listo de bonaj respondoj :

1a, 2b, 3b, 4c, 5b, 6a, 7c, 8a, 9b, 10b.

Via legkompreno estas 100% se vi havas 10 bonajn respondojn, 90% se 9 bonajn respondojn kaj tiel plu.

Via legkompreno :%

Nun vi povas kalkuli vian efektivan legrapidon per la sekvanta formulo : (via efektiva legrapido) = (via mezurita legrapido) x (via legkompreno).

Por ekzemplo se via mezurita legrapido estas 100000 s/h kaj via legkompreno 80 %, tiam via efektiva legrapido estas nur 80 % de via mezurita legrapido, tio estas 80000 s/h.

Via mezurita legrapido : s/h

Via legkompreno :%

Via efektiva legrapido : s/h

Antaŭ ol fari la mezuradon de via legrapido per la sekvanta trejni vin dum almenai unu semajno helpe de la ekzercoj kiuj sekvantaj sekcioj.
Tiu teksto utilas nur por kontroli viajn progresojn en legrapido kaj legkompreno.

Kompleta legado teksto 2 :

El "Faktoj kaj Fantazioj" de Marjorie BOULTON
eldonita de UEA (1984)

La Musoj kaj la Reĝo

Iam, ie, en iu lando, regis reĝo; kaj en la lando estis multaj musoj.

Normale la musoj prosperis kaj manĝis sufiĉe; sed venis jaro de malbona rikolto. La musoj, kiuj kutime vivtenis sin grandparte per la greno, kiun la homoj lasis sur la tero post la rikolto, rimarkis, ke ĉi-jare la postrikolta greno ne sufiĉos por la tuta vintro. La Reĝo de la Musoj decidis peti helpon de la Reĝo de la Lando.

Kiam la palaca pordisto informis la Reĝon, ke muso deziras paroli kun li, la Reĝo ekridis, sed ordonis, ke oni enlasu la muson.

La muso venis respekteme kaj dece en la grandan Aŭdiencan Ĉambron. Ĉar tibetanoj, je formalaj renkontiĝoj al kiuj taŭgas ceremonioj, donacas elegantajn skarpojn, la eta muso portis silkan fadenon, kiun li per la ĝustaj ceremoniaj gestoj ĝentile proponis al la reĝo.

"Mi vin salutas, frato Muso," diris la Reĝo. "Kion vi deziras?"

"Ho, Reĝa Moŝto," respondis la Muso, "la rikolto estas malgranda; la homoj ne lasis multan grenon sur la tero; ni musoj mortos pro malsato, se ni ne povos pruntepreni stokon por la vintro. Mi petas vian helpon. Bonvolu prunti al ni sufiĉan grenon por la vintro; kaj mi, la Reĝo de la Musoj, solene promesas, ke post la nova rikolto ni plene repagos vin. La enhavo de unu el viaj grenejoj sufiĉos."

"Kiel vi etaj musoj forportos tiom da greno?"

"Via Reĝa Moŝto, se vi pruntos la grenon al ni, ni povos ĝin forporti."

"Do, Frato Muso, mi pruntos al la musoj la grenon en unu grenejo, sub tiuj kondiĉoj." Kaj li ordonis al la respondeca persono, malfermi unu grenejon, kaj permesis al la musoj forporti la grenon.

La Reĝo de la Musoj kunvokis ĉiujn musojn de la lando, centmilojn da musoj. Ĉiuj iris al la grenejo, metis grenon en la buŝon, sur la dorson, ligis iom da greno per la vosto; kaj tia laboro, de tiom da musoj kune, rapide malplenigis la grenejon. Kiam la Reĝo vidis, kio okazis, li komencis alte estimi la inteligentecon kaj kapablon de la musa popolo, kaj ĝian kunlaboremon.

Post la nova rikolto, la Reĝo de la Musoj plenumis sian promeson, la musoj reportis al la reĝa grenejo la tutan kvanton da greno, kiun ili antaŭe prunteprenis; kaj ankaŭ kun interezo. La Reĝo ne plu inklinis ridi je la etaj musoj, ĉar li konstatis, ke la musoj estas ne nur inteligentaj, sed honestaj kaj fidindaj.

Sed baldaŭ la Reĝo havis gravan problemon: milito komenciĝis inter lia regno, kaj najbara regno. Granda rivero fluis inter la du regnoj, kaj ĉe la bordo de la rivero la malamika reĝo jam metis sian tendaron, preta por invadi la landon.

La musoj ne deziris, ke fremda reĝo, eble malpli helpema, aŭ eĉ kruela, venku ilian Reĝon. La Reĝo de la Musoj tuj iris al la palaco kaj petis aŭdiencon. La Reĝo tuj invitis lin al la Aŭdienca Ĉambro.

"Via Reĝa Moŝto, mi venis denove, ĉi-foje por demandi, ĉu ni povas reciproki vian grandan helpon. Ni metas nin je via dispono."

Eĉ meze de tiu grava krizo, la Reĝo ne povis kaŝi rideton. "Frato Muso," li demandis, "kiel etaj musoj povos helpi min nun? La malamika armeo estas vasta, multe pli granda ol la mia. Mi nepre malvenkos. Mi dankas pro viaj bonaj intencoj, sed kiel musoj povos helpi min?"

"Via Reĝa Moŝto, ĉu tamen vi memoras, kiel vi dubis pri nia kapablo forporti la grenon el la grenejo? Kaj kiel vi surpriziĝis, kiam ni repagis nian tutan pruntaĵon? Nur fidu al ni denove; kaj konsentu pri du servoj al nia popolo; kaj per specialaj musaj manovroj ni savos vian regnon."

"Estas vere, ke vi sukcesis pri la du aliaj aferoj," la Reĝo konsentis. "Do, kion mi faru?"

"Ordonu al viaj soldatoj, ke ili preparu por ni cent mil bastonetojn, longajn kiel via reĝa piedo, kaj kuŝigu ilin ĉe nia flanko de la rivero, antaŭ la sunsubiro. Ordonu tion ĉi — por tiom da soldatoj, la tasko estos malgranda — kaj ni nepre kreos konfuzon kaj panikon inter la malamikoj."

"Tion mi ordonos," la Reĝo promesis. "Kaj kion vi deziras por vi mem?"

"La du grandaj danĝeroj, kiuj minacas musojn en tiu ĉi lando, estas inundoj kaj katoj. Kiam la rivero iom plialtiĝas, la akvo envenas niajn nestojn. ĉu vi konsentos, konstruigi fortan baraĵon laŭlonge de la rivera bordo, por ke la akvo ne povu plu plenigi niajn nestojn? Kaj katoj ĉiam ĉasas musojn; do, ni humile petas, ke vi ekzilu ilin de via regno."

"Se vi savos la regnon, vi havos vian baraĵon kaj malhavos la katojn."

La Reĝo de la Musoj faris la kutimajn ceremoniajn gestojn, kaj rapide reiris al sia musa popolo.

La suno subiris; kaj ĉiuj plenkreskaj musoj, centmiloj da musoj, sekvis sian reĝon al la rivera bordo. Tie ili trovis la cent mil bastonetojn en bona ordo. La musoj tuj puŝis la bastonetojn sur la riveron, eksidis sur ili, duope aŭ triope, padelis per la piedetoj kaj facile vojaĝis al la alia flanko. Ili kviete kuris tra densa mallumo, al la tendoj kie la malamika armeo dormis. La musoj mordis la kordojn de la pafarkoj kaj la portilojn de la pafiloj; dente detruis la ŝnurajn fuzeojn; difektis la vestaĵojn de la soldatoj kaj eĉ formordis la harplektaĵojn de tiuj, kiuj dormis plej profunde. Ili faris ĉion, kion centmiloj da musoj povas fari per la dentoj: ĉifonigis tendojn, formanĝis grenon, farunon kaj aliajn nutraĵojn, mordis kordojn, truis ŝuojn, kaj ĉie ion manĝis, kion homoj zorge aranĝis. Post du-tri horoj da sabotado, la musoj reiris al la rivera bordo, residiĝis sur siaj bastonetoj kaj revojaĝis padele al la amika bordo. Neniu rimarkis ilin.

La suno leviĝis. Ankaŭ leviĝis multaj krioj kaj malbelaj vortoj el la tendaro de la malamika armeo. La soldatoj vekiĝis kaj trovis pafarkojn neuzablajn, pafilojn nek uzeblajn nek porteblajn, uniformojn truoplenajn, sen butonoj, sen insignoj. Baldaŭ ili ankaŭ konstatis, ke ili ne matenmanĝos, ke eĉ taso da teo kun butero ne estos havebla por varmigi kaj fortigi ilin.

Unue, ĉiu soldato akuzis la najbarajn kamaradojn; poste la kverelado iĝis pli grandskala; oficiroj akre riproĉis soldatojn, soldatoj eĉ ekakuzis oficirojn. Aŭdiĝis laŭtaj krioj de "Ŝtelo!", "Perfido!", "Sabotado!", "Spionoj!" kaj multaj fiaj vortoj, ĉar soldatoj malsataj, malvarmaj, kaj sen uzeblaj armiloj ne parolas tre elegante.

Ĝuste kiam en la frumatena lumo la tendaro estis en plena konfuzo, la malamika armeo ankaŭ aŭdis, de la alia bordo, klarionojn kaj kelkajn pafojn. Tute ne preta batali, la armeo forkuris malbonorde.

La Reĝo tre ĝojis, kaj ridegis pri la manovroj de la musoj. Li kore dankis la Reĝon de la Musoj kaj lian popolon. Kaj li tuj plenumis siajn du promesojn. Li ordonis al arkitektoj kaj konstruistoj, tuj plani kaj konstrui bonan, fortan baraĵon laŭlonge de la rivero, por ke ĝi neniam plu inundu la nestojn kaj dronigu la musojn. Kaj li dekretis ekzilon de ĉiuj katoj, kaj mortopunon por iu, kiu poste portos katon en la landon.

Li sendis heroldon al la malamika reĝo, kun la jena averto: "Ni en nia lando ne deziras militon. Milito suferigos vian popolon kaj mian popolon, kiu ajn venkos. Ni rajtas defendi nin kontraŭ iu, kiu nin atakas, kaj ni forte defendos nin. Sed ni deziris, se eble, eviti nenecesajn mortojn kaj vundojn. Do, unue ni sendis nian armeon de musoj, kiuj venkis viajn soldatojn sen elverŝo de sango. Ni proponas al vi pacon; sed, se vi denove ekatakos, ni sendos kontraŭ vi armeon de niaj dombestoj kaj kortbirdoj; se ili ne sukcesos, ni sendos niajn sovaĝajn bestojn; kaj finfine, se ni ne povos per moderaj diskutoj kaj prudentaj kompromisoj eviti plenan militon, mi mem kondukos al batalo miajn lertajn kaj kuraĝajn soldatojn."

La malamika reĝo estis sufiĉe saĝa, por aŭskulti atente; kaj poste li komprenis, ke se la musa armeo povis tiom detrui, estos malsaĝe, riski pri la armeoj de dombestoj, sovaĝbestoj kaj soldatoj. Estos pli saĝe, tuj interkonsenti pri pac-traktato. Do, la du reĝoj facile preparis traktaton, kaj la du regnoj longe restis en amika rilato. Ankaŭ la musoj restis feliĉaj, ĉar la Reĝo protektis ilin kontraŭ inundoj kaj katoj; kaj, pro ilia meritplena servo al la patrolando, ili ĉiujare ricevis unu grenejo-plenon da greno.

Via legtempo : sekundoj

Respondu la sekvantajn demandojn :

1. Kiu estas la unua problemo de la musoj ?

- a) ne sufiĉa postrikolta greno.
- b) tro abundas la katoj.
- c) tro oftas la inundoj.

2. Kion oni donacas kutime al la reĝo ?

- a) belajn vestaĵojn.
- b) elegantajn skarpojn.
- c) luksajn juvelojn.

3. Kiom da greno petis la reĝo de la musoj ?

- a) tutan ĉaron.
- b) plurajn grenejojn.
- c) nur unu grenejon.

4. Kion promesis la reĝo de la muso ?

- a) redoni la grenon post la nova rikolto.

- b) redoni la grenon iom post iom post la 5 sekvantaj rikoltoj.
- c) repagi per alia servo.

5. Kio apartigis la reĝlandon de la alia lando ?

- a) montaro.
- b) maro.
- c) rivero.

6. Kial la reĝo de la muso petis duan aŭdiencon ?

- a) por provi reciproki la ricevitan helpon.
- b) por peti pli malfruan redonon de la greno.
- c) por peti plian grenon.

7. Kion faris la soldatoj laŭ peto de la reĝo de la musoj ?

- d) ili veturigis la musojn al la alia riverbordo.
- e) ili konstruis ponton.
- f) ili preparis bastonetojn.

8. Kiom estis la musoj ?

- a) centmiloj.
- b) pluraj milionoj.
- c) dekmiloj.

9. Kio okazis post la nokto en la malamika tendaro ?

- a) ĉiuj pretiĝis por la batalo en bona ordo.
- b) aŭdiĝis multaj fiaj vortoj.
- c) alvenis la malamika reĝo por kuraĝigi sian armeon.

10. Per kiu alia armeo la reĝo minacis la malamikan reĝon ?

- a) per armeo de dombestoj.
- b) per armeo de araneoj.
- c) per armeo de elefantoj.

Antaŭ ol fari la mezuradon de via legrapido per la sekvanta teksto vi devas trejni vin dum almenaŭ unu semajno helpe de la ekzercoj kiuj trovi ĝas en la sekvantaj sekcioj.

La teksto enhavas 7800 signojn. Nun per la sekvanta tabelo vi povas kalkuli vian legrapidon en signoj en unu horo.

legtempo	Legrapido
1'	468 000 s/h
2'	234 000 s/h
3'	156 000 s/h
4'	117 000 s/h
5'	93 600 s/h
6'	78 000 s/h
7'	66 857 s/h
8'	58 500 s/h

Via proksimuma legrapido : s/h

Vi povas mezuri vian komprenon per komparo de viaj respondoj al la demandoj kun la sekvanta listo de bonaj respondoj :

1a, 2b, 3c, 4a, 5c, 6a, 7c, 8a, 9b, 10a.

Via legkompreno estas 100% se vi havas 10 bonajn respondojn, 90% se 9 bonajn respondojn kaj tiel plu.

Via legkompreno :%

Nun vi povas kalkuli vian efektivan legrapidon per la sekvanta formulo : (via efektiva legrapido) = (via mezurita legrapido) x (via legkompreno).

Por ekzemplo se via mezurita legrapido estas 100000 s/h kaj via legkompreno 80 %, tiam via efektiva legrapido estas nur 80 % de via mezurita legrapido, tio estas 80000 s/h.

Via mezurita legrapido : s/h

Via legkompreno :%

Via efektiva legrapido : s/h

Antaŭ ol fari la mezuradon de via legrapido per la sekvanta teksto vi devas trejni vin dum almenaŭ unu semajno helpe de la ekzercoj, kiuj troviĝas en la sekvantaj sekcioj.

Tiu teksto utilas nur por kontroli viajn progresojn en legkompreno.

Kompleta legado : teksto 3 :

El "Paŝoj al plena posedo" de W.AULD.
eldonita de "Heroldo de Esperanto"

SUR DALMATA FIŜISTINSULO

Neniam ŝi vidis la sunon. Nur la karesojn de ĝiaj varmaj radioj ŝi sentis sur sia juna vizaĝo. Neniam ŝi vidis la lazuran bluan de la Adria Maro, nur gojplezure ŝi ĝuis lulata per ĝiaj ondoj. Nek sian patrinon nek la patron ŝi vidis, nur palpkarese ŝi ekkonis iliajn kaloplenajn manojn kaj vizaĝojn, sur kiuj ŝi tiel bone konis ĉiun sulkon... Nenion ŝi iam ajn vidis, ĉar ŝi estis de la naskiĝo blinda...

Jarojn longe ŝi vivis en la lernejoj por blinduloj kaj nur somere ŝi revenadis pasigi la ferion apud siaj karaj. Nun, ŝi denove troviĝas en sia fiŝistvilaĝo sur fora insuleto perdiĝinta en la marovasto. Feliĉa ŝi estis forlasi por ioma tempo bruegon de la grandurbo en kiu ŝi vizitadas lernejon. Tamen, sidante sur la pruo de leĝera velboato kiu petole saltetis sur la ŝaŭmantaj ondoj, kaj karesante la harojn de sia sepjara fratineto, ŝi pensis pri tiu grandurbo kien ŝi revenos post la ferio por fini sian lastan studjaron kaj kie ŝi, dank' al siaj lertaj manoj, ricevos postenon. Ho, kiel ŝi revadis pri sia unua salajro! Pri Ĉio kion ŝi aĉetos per ĝi. En ŝia imago jam ĉiu monero estas fikselpezota! Al la patrino ŝi aĉetos kaptukon el belega pura silko... Ridetante ŝi imagas kiel la vilaĝaninoj rigardos ŝian patrinon, kiam ŝi kun tiu kaptuko aperos dimanĉe inter ili. Ĉiuj ekdeziros ĝin tuŝi por prijuĝi la kvaliton, kaj la patrino fiereme rakontos al ili ke ŝia Zlatica aĉetis ĝin. Jes, Zlatica kiu nun laboras en la grandurbo kaj perlaboras tiom, ke ŝi eĉ povas de tempo al tempo helpi al Kaj, al la patro?... Al li ŝi aĉetos novan pipon el rozoligno ĉar la malnovan forglutis la maro, kiam pasintan printempon tempesto surprizis lin, dum li estis ĵetanta reton en la maron. Ĝojos la patro pro tiu donaco... Al la frato? Oh, li jam fariĝis edziĝkandidato kiu eĉ rajtas malkaŝe fumi. Al li ŝi aĉetos belegan arĝentan cigaredujon, kaj kiam li elpoŝigos ĝin, ĉiuj junulinoj el la vilaĝo admire rigardos!... Al la fratineto Mare, nepre ŝi aĉetos tiun grandan pupon kiu palpebrumas kaj pepas: "Panjo, panjo"! Ho, kiel ŝiaj karbonigraj okuletoj mire gapos!...

Subite, iu granda ondo frapis la boatpruon kaj amaso da akveroj ŝprucmalsekigis ŝian korpon. Ŝi tremkuiĝis kaj la revaĵo disrompiĝis kvazaŭ sapveziko... Instinkte ŝi antaŭsentis tion, ŝia frato senzorge sidan-ta ĉe la poŭpo ne rimarkis: iom troe ili malproksimi-ĝis de la bordo. Laŭ

timkrioj de la mevoj ŝi sentis alvenon de tempesto, kvankam la sunradioj ankoraŭ varme brilis.

Mario, ni iru returnen. Ĉu vi rimarkas la tempestalvenon?

Mario nur memfide ekridetis kaj per sia sonora voĉo iom mokeme respondis: "Ne zorgu vi, grandurba sinjorino, kaj ne saligu al mi la cerbon!"

Ŝi eksilentis, sed ĉiuj liaj sentoj streĉiĝis. Ne, ŝi ne eraras. Ne plu blovas la agrabla venteto. La veloj de la boato ne plu gaje kraketas sed knarkrakas sub ĉiam pli forta ventpremo. Sur la ondoj, la leĝera velboato ĉiam pli kaj pli supreniĝas kvazaŭ iu ĉevalo transsaltanta barojn.

Mario, ni iru returnen! Fine... ni ne estas solaj, Mare povas ektimi de la ondoj.

Mare ja estas fiŝista filino. Ĉu ne, Mare? Ni ne timas de la maro kiel tiu nia fratino, kiu tute urbaniĝis... ĉu ne, Mare?

La knabineto nenion respondis, nur pli forte sin premis al la fratino. Mario, tenante la poŭpon per siaj fortaj manoj, gaje fajfetis kaj videble ĝuis sian lertan manovradon. Ankaŭ li estis rimarkinta la malboniĝon de la vetero kaj rapidan plialtiĝon de la ondoj sed pro sia vireca fiero li ne volis obei al la "ina saĝo"... Subite, malaperis la rideto de sur lia vizaĝo. Jen, tie malantaŭ la fora horizonto, aperis ia verdnigra nuboj kiu fulmrapide pligrandiĝadis kaj ĝiaj brakosimilaj ekstremoj minace disvastiĝadis. Fulmobriloj trakuris la ĉielon kaj perdiĝadis ien en la vasto. Eĥis timigaj tondrobruoj...

Al diablo! ni eĉ malsekiĝos! — grumblis Mario por si mem kaj manovris por direkti la velboaton al la bordo. Sed jam estis iom malfrue. Li konsciiĝis pri tio. Kontraŭ la vento la leĝera velboato pene luktis por alproksimiĝi al la bordo kiu apenaŭ videbletis. Dume la tempesto rapide alproksimiĝis... La suno tute malaperis malantaŭ la nigra nubkurteno. Malheliĝis. La vento fantome ekhurlis kaj la ondoj furie ekdancis kvazaŭ la maro estus bolanta... La tempesto atakis per sia tuta sovaĝa forto.

Portata per la ondegoj kvazaŭ juglandŝelo, post iu nova ventatako la velboato renversiĝis...

Mario-o! ekkriegis malgranda Mare, sed en la sama momento fortaj brakoj kaptis ŝin kaj konata voĉo trankviligis la infanon:

Mare, ne timu... Mare, via frato portos vin... ne timu! Luktante kontraŭ la ondoj, kun la fratineto en la manoj, li plenforte kriis al la fratino kiun li fojfoje vidis inter la ondoj:

Zlatica-a-a, naĝu laŭ mia voĉo. Ne timu pri Mare, mi portos ŝin.

Je-e-e-s! Eĥis ŝia respondo. Ekscio ke Mare estas en la manoj de Ia frato trankviligis Zlatican kaj ŝi eknaĝis per fortaj membrosvingoj, gvidata per la voĉo de Mario. Ŝi naĝis kuraĝe, sentime, kvankam la ondoj fojfoje superiris ŝian kapon. Ŝi ja estas infano de la maro... De tempo al tempo la frato vokkriis al ŝi kaj ŝi respondkriis. Tranĉante la ondojn ŝi naĝis kvazaŭ sireno... Post ioma tempo, ŝajnis al ŝi ke ĉiam malpli ofte ŝi aŭdas la voĉon de la frato... kaj ke ĝi malproksimiĝas, dume la hurlo de la vento superas la ondofrakason...

Mario, Ma-ri-o-o! krivokis ŝi, sed la voĉo de Mario ne aŭdiĝis plu. Sola ŝi estis. Sola...en tiu infero de la elementoj kaj sen gvidvoĉo de la frato. Tamen ŝi ne cedis al la teruro. Ŝi naĝis, naĝis en la direkton el kiu ŝi lastfoje aŭdis la voĉon de Mario. Sed vane... Ne estis eble gardi la direkton en la maro kiu infere bolis...

La tempo pasadis. Si jam sentis lacon kaj por ŝpari la forton ŝi forlasis sin al la ondoj... Mario certe atin-gos la bordon, pensis ŝi, kaj ili venos min trovi. Ili scias ke mi naĝas kiel fiŝo. Kaj, se mi forlasas min al la ondoj ili alproksimigos min al la bordo, — ŝi rezonis. Sed krom la ventofajfado kaj ondomuĝoj nenian bruon ŝi estis aŭdanta. Tamen ŝi esperis... De tempo al tempo por memkuraĝigo ŝi vokkriis: — Mario, Ma-ri-o!

Ree minutoj fariĝis horoj. Kiom longe ŝi jam solas portata per la ondoj? Nur ne perdi kuraĝon, ne pensi pri ebla droniĝo! Vivi ŝi volas... kaj pense ŝi ekvagis tra sia vivo rememorante siajn geamikojn. Laŭ iliaj voĉoj ŝi ĉiam rekonadis ilin: "Pala voĉo", "Nigra voĉo", "Verda voĉo"... El ŝia brusto kelkfoje eliĝis ia nomo kvazaŭ voksopiro. Laca, tro laca ŝi ja estas. Tiu ĉi maro...kiu estis lia unua lulilo...ne povas ŝin nun malamike forrabi...el la vivo...

*

* * *

En vilaĝa ŝtandometo, okupita per sia hejmlaboro, la patrino ne rimarkis la veterŝanĝon. La patro, kiu pasigis du lastajn noktojn en fiŝkaptado kun la aliaj fiŝistoj el la vilaĝo, nun ripozis en la apuda ĉambro. La ventatako kunfrapis la larĝe malfermitan fenestron kaj la patro vekiĝinta ekvidis la nuboplenan ĉielon.

— Tempesto alvenas, Ĉi nokte ni ne povos fiŝkap-tadi! — grumblis li por si mem. Li aliris la fenestron kaj alrigardis la marovaston kiu etendiĝis antaŭ liaj okuloj. La malheliĝintan horizonton tranĉadis fulmoj kaj sur la bordorokojn disrompiĝis ondoj. La vizaĝo de la maljuna filisto malsereniĝis. Forlasante la fenestron li rapidpaŝe eniris la kuirejon, kie lia edzino okupiĝis pri lavado.

— La infanoj jam revenis, ĉu ne? — demandis li.

— Verŝajne... Mi ne scias! — respondis ŝi.

— Tempesto alvenas, al diablo, kaj mi ŝatus vidi ilin hejme, — rediris la patro kaj prenante sian veston kaj ĉapon li rapide eliris.

En la malgranda insulhaveno la fiŝistoj okupiĝis pri plifirmigo de la boatoj kaj lipetoj. Rigarde esploris la patro la havenon sed lia velboato ne troviĝis ligita al la bordo.

— Amikoj, ĉu iu vidis Marion kaj nian velboaton?

— Marion? Ne, neniuj vidis lin! — respondis iuj.

Ĉu li eble per velboato...? ekdemandis iu junulo.

Jes, tuj post la tagmanĝo li elveturis kun Zlatica kaj Mare... kaj ili ankoraŭ ne revenis! — lia vizaĝo streĉiĝis zorgoplene.

Al diablo! Certe li malproksimen elveturis kaj la tempesto jam alvenis sur la maron! — diris iu mezaĝa viro.

Eh, infanoj, infanoj! neniam ili estas prudentaj! — sopiris iu maljunulo.

Mi timas ke la velboato ne povos rezisti al tia ĉi tempesto, malgraŭ la lerteco de Mario.

Li estas sperta fiŝisto kaj certe li revenus ĝis nun se tio estus ebla, des pli ĉar la fratinoj estas kun li, — aldonis iu alia fiŝisto.

Ni ne perdu la tempon, diris iu altstatura viro. Jen, mia motorboato kies forton vi konas, per ĝi ni facile kontraŭstaros al la ondegoj. Venu ni kelkaj kaj iru serĉi ilin.

Ĉe tiuj vortoj jam kelkaj fiŝistoj ensaltis la motorboaton; inter la unuaj estis la zorgoplena patro. Dume, alkuris la patrino sekvata de la malmultnombraj loĝantoj de la vilaĝeto.

Timoplenaj okuloj esploradis la maron sur kiu ne videblis io ajn alia krom la jam tre alten leviĝintaj ondoj.

* *
*

Jam unu horon per motorboato la bravaj fiŝistoj esploradis la bordproksimajn regionojn. Neniun ili trovis. Iom okcidente troviĝas ia rokinsuleto kaj ili decidis tien direktiĝi. Malgraŭ la ventego ili senĉese vokkriis kaj daŭre esploradis la maron.

Kaj jen, sur unu rokpinto, svingante per sia ĉemizo, sidis Mario premante al sia brusto la sepjaran fratineton Mare. Danĝere estus iom pli proksimiĝi, ĉar la ondoj furioze frapadis sur la rokojn. Tamen lertaj manoj sukcese alĵetis al la junulo ferfadenŝnuregon, kiun li firme ligis al la rokpinto kaj per alia ŝnuro ligis al si la fratineton. Simiosimile li glitrampis laŭ la ŝnurego kaj helpe de la sindonaj amikoj, post pena streĉiĝo, li atingis la motorboaton.

Ĉu... ĉu vi trovis Zlatican?! — estis lia unua demando. Post nea respondo, liaj okuloj pleniĝis de larmoj.

Per kelkaj vortoj li klarigis kio okazis al ili kaj kiel li kun Mare surdorse, pli dank' al la feliĉo ol al siaj muskoloj, atingis la rokinsuleton. Sed, Zlatica... ŝin li luktanta kontraŭ la ondegoj ne plu vidis, nek aŭdis delonge jam. Ĉiuj mutis. La patro, karesante la malsekajn harojn de Mare kiu silente ploris en lia sino, kun larmoplenaj okuloj rigardis la larĝon de la maro... Ŝi, lia malfeliĉa filino... ŝi... Sed, ne! Li ne povis, ne volis ŝin kredi pereinta. Li kuŝigis la knabineton sur la boatfundon kaj kun petoplena rigardo ekkriis:

Serĉu ni plue! — Ĉiuj jese kapsvingis.

Mario, kie vi ŝin lastfoje vidis? — demandis iu maljuna marlupo. Mario revigliĝis. Montrante per tremanta mano la okcidentan direkton li streĉe observis la marosurfacon.

La motorboato ree ekveturis.

Tri horojn ili serĉis senrezulte. La okuloj jam laciĝis pro streĉa observado. Iom post iom la maro trankviliĝis...

Dume, ne havante plu forton por naĝi, Zlatica kuŝis surdorse forlasante sin al la kaprica danco de la ondoj. Ŝiaj membroj jam rigidiĝis. Laca ŝi estis, tiom laca. — "Estus eble pli bone se mi ne scipovus naĝi, ol tiu malrapida droniĝo", — pensis ŝi amare. Tamen, de tempo al tempo preskaŭ aŭtomate ŝi vokkriis: — Mario! Ma-ri-ooo!

He-ej! He-e-j! eĥe alvenis ŝin raŭkaj voĉoj. Ŝi ekremis ne kredante al sia aŭdsento.

Zla-ti-ca! He-e-j! Aŭdiĝis vokoj jam pli proksime.

Mario! Paĉjo! — ĝojkrie ŝi respondis kaj sentante novan forton eknaĝis al la direkto el kiu ŝi estis aŭdanta la vokojn...

* * *

La ĉielo ankoraŭ estis kovrita per nuboj sed jam kelkaj sunradioj trapenetris ilin falante sur la amason kiu mute staris ĉe la marbordo. La motorboato enhaveniĝis... Retenante spiron ĉiuj febre atendis. Malrapide surbordiĝis la maljuna fiŝisto apogante sian filinon. Mario portis la fratineton Mare kiu dormis sur lia ŝultro. Ĉiuj eliris el la motorboato.

Savitaj ili estas! — ekis gojkrioj. La patrino, kies vizaĝon malsekigis larmoj alkuris ilin balbutante: — Infanoj miaj infanoj — Ĉiu deziris ion demandi, ekscii kie kaj kiel oni trovis ilin...

Lasu ilin unue ripozi! — grumblis iu el la savantoj. — Ni ĉiuj tion nepre bezonas. Poste vi povas babilaĉi kiom ajn vi volas. Nur ion mi nun deziras diri al vi. Rigardu Zlatican! Nian Zlatica, pri kiu vi fojfoje mokeme diradis "grandurba sinjorino"... Sciu, ke ŝi luktis tri horojn sola sur la marondegoj! Ŝi pruvis al ni ke ŝi restis vera fiŝista filino... Filino de la maro. Fieru pri ŝi!

La tuta amaso silente akompanis la savitojn kaj iliajn gepatrojn ĝis la domo. Mute ekstaris la patro ĉe la sojlo. Nur per forta manpremo li dankis al siaj amikoj-fiŝistoj.

La suno reaperis salutkaresante la insuleton perdiĝintan en la marovasto.

* * *

Neniam ŝi vidos kiom ŝia patrino maljuniĝis, kiom la haroj de la patro griziĝis dum tiu fatala posttagmezo. Nur palpkaresante iliajn vizaĝojn ŝi malkovros novajn sulkojn kiujn ŝi antaŭe ne konis.

*Srdj Arandjeloviĉ
el "Monda Kulturo"*

Via legtempo : Sekundoj

Respondu la sekvantajn demandojn :

1. Kial Zlatica ne povis restadi la tutan jaron en sia hejmvilaĝo ?
 - a) ĉar ŝi laboras en iu urbo.
 - b) ĉar ŝi vizitadas lernejon en iu urbo.
 - c) ĉar ŝi bezonas vojaĝi.
2. Kiom da homoj troviĝis en la velboato ?
 - a) 2.
 - b) 3.
 - c) 4.
3. Pri kio pensis Zlatica en la boato ?
 - a) pri agrablaj ferioj per boatado.
 - b) pri eventuala tempesto.
 - c) pri la grandurbo kaj sia unua salajro.
4. Kial Mario ne atentis tuj pri la tempestalveno ?
 - a) pro sia vireca fiero.
 - b) ĉar li tute ne konsciis pri la tempestalveno.
 - c) ĉar ĉiuj gaje babilis kaj amuziĝis..
5. Kion estis faranta la patro kiam la ĉielo pleniĝis je nuboj ?
 - a) li ripozis en apuda ĉambro.
 - b) li estis okupita per sia hejmlaboro.
 - c) li babilis kun aliaj fiŝistoj.
6. Kiu la unua maltrankviliĝis pri la infanoj
 - a) la patrino.
 - b) la patro.
 - c) alia frato de Zlatica.
7. Pri kio pensis Zlatica dum ŝi portilis de la ondoj ?
 - a) pri siaj verŝajne dronintaj frato kaj fratino.
 - b) pri sia baldaila droniĝo.
 - c) ŝi revidis sian vivon memorante siajn geamikojn.
8. Kie ili trovis Mario-n ?
 - a) sur iu rokpinto.
 - b) sinapogantaj al flosantaj lignopecoj.
 - c) savitaj de alia boato.
9. Kiu petis pluan serĉadon post la retrovo de Mario ?
 - a) la patro.
 - b) Mario.
 - c) la fratineto Mare.
10. Dum kiom da tempo ili serĉis Zlatica-n post retrovo de Mario ?
 - a) dum duono da horo.
 - b) dum unu horo.
 - c) dum tri horoj.

La teksto enhavas 12756 signojn. Nun per la sekvanta tabelo vi povas kalkuli vian legrapidon en signoj en unu horo.

legtempo	Legrapido
2'	382 680 s/h
3'	255 120 s/h
4'	191 340 s/h
5'	153 072 s/h
6'	127 560 s/h
7'	109 337 s/h
8'	95 670 s/h
9'	85 040 s/h
10'	76 536 s/h
11'	69 578 s/h
12'	63 780 s/h
13'	58 874 s/h
14'	54 668 s/h
15'	51 024 s/h

Via proksimuma legrapido : s/h

Vi povas mezuri vian komprenon per komparo de viaj respondoj al la demandoj kun la sekvanta listo de bonaj respondoj :

1b, 2b, 3c, 4a, 5a, 6b, 7c, 8a, 9a, 10c.

Via legkompreno estas 100% se vi havas 10 bonajn respondojn, 90% se 9 bonajn respondojn kaj tiel plu.

Via legkompreno : %

Nun vi povas kalkuli vian efektivan legrapidon per la sekvanta formulo : (via efektiva legrapido) = (via mezurita legrapido) x (via legkompreno).

Por ekzemplo se via mezurita legrapido estas 100000 s/h kaj via legkompreno 80%, tiam via efektiva legrapido estas nur 80% de via mezurita legrapido, tio estas 80000 s/h.

Via mezurita legrapido : s/h

Via legkompreno :%

Via efektiva legrapido : s/h

Antaŭ ol fari la mezuradon de via legrapido per la sekvanta teksto vi devas trejni vin dum almenaŭ unu semajno helpe de la ekzercoj, kiuj troviĝas en la sekvantaj sekcioj.

Tiu teksto utilas nur por kontroli viajn progresojn en legkompreno.

Kompleta legado : teksto 4 :

El "Paŝoj al plena posedo" de W.AULD.
eldonita de "Heroldo de Esperanto"

PLEJ BONE RIDAS KIU LASTE RIDAS

Dum la manĝohoro la bazaruloj kutime kolektiĝis en la foira restoracio kaj senĉese babiladis. La temo estis preskaŭ eksluzive pri ilia negoco. La negoco kaj foiroj kaj ĉio rilata estis la ĉiama temo. Oni pensus, ke for de la laboro, kiu konsistas plejparte el uzo de la voĉo, bazaruloj emus ripozi per silento, sed tute male. Ju pli ili parolas, des pli ili emas paroli, eĉ kiam ili estas raŭkaj.

Ĉe la manĝotablo oni demandis al mi, ĉu mi konas Benzo'n. "Jes," mi respondis. "Mi konas lin, sed nur supraĵe."

"Ho," respondis la bazarulo, "li estis en vera kaĉo antaŭ nelonge. Neniam mi vidis viron pli turmentatan ol li. Tiu kompatinda bovo preskaŭ frezeziĝis! Strange, ke vi ne aŭdis pri li."

"Sed kio okazis al li?"

"Kio okazis? Ĉiuj ridis pri li. Jen kio okazis."

La bazarulo ĉirkaŭrigardis esprimplene, tusetis kaj komencis rakonti. (Mi poste konfirmiĝis, ke la rakonto, kiun la bazarulo rakontis, estas ja baze vera; sed ĝis kia grado li ornamis ĝin per elpensitaj detaloj, mi ne scias. Mi citas lian rakonton komplete, kiel li diris ĝin, kun la troigoj.)

— Vi ĉiuj konas tiun pseŭdan lertulon, ĉu ne? Do la kaĉo startis tre simple. Kiam Benzo sklavumis ĉe cirka budo, li pruntis 'om da pundoj al ulo, kiu laboris en la sama cirko. Tiu cirkisto promesis tuj redoni la pruntaĵon, sed tempo pasis, kaj la cirkisto ĉiam elpensis novajn turnojn por eviti la repagon. Tiu ludo daŭris, kaj Benzo pli kaj pli malpacientiĝis. La afero tedis lin, ne sole ĉar li ne emis roli kiel filantropo, sed ankaŭ ĉar aliaj vidos, kiel facile trompebla li estas. Komprenu, ke nenio pli frakasas la memestimon de trompisto, ol esti mem trompata antaŭ atestantoj. Fine Benzo komencis forte minaci la ŝuldanton. La ŝuldanto multe protestis kaj fine konvinkis Benzon, ke li ja volas repagi, sed ke li vere ne havas la gelt'on. Sed Benzo persistis kaj diris ke, se li ne povas repagi per mono, do li nepre devas repagi per io egalvalora. Post longa disputo la cirkisto diris al Benzo: "La sola oferto, kiun mi povas fari, estas repagi vin per leonido. Ĝi valoras multe pli ol la ŝuldata sumaĉo, sed por enkapigi al vi, ke mi ja estas honesta, kaj por ŝtopi vian kvakantan faŭkon, mi faras tiun oferton."

"Je la turmentita Kristo." eksplodis Benzo. "Kion mi faru per leonido? Kia brila ideo! — vera geniaĵo! Kial ne oferti elefanton? Jen ideo: ofertu elefanton, faskon da elefantoj, mi

ja amegas ilin, elefantojn de ĉiuj formatoj kaj koloroj, milojn da efektive mi aĉetis dudekon da ili ĉi-matene antaŭ la matenmanĝo!" peze sarkasmis Benzo.

"Do, sarkasmu, sarkasmu, idioto! Ĉu vi demandas, kion fari per valora leonido? Vi, kies metio estas vendi! For de mia vido, mi perdas paciencon pri vi. Jen vi aperas en ĝusta lumo! Vi, kiu fanfaronas ĝisnaŭze, ke vi povas vendi kion ajn! Kaj ni aŭskultis, dum vi pufigis vin per memlaŭdoj, sed nun, kiam mi ofertas al vi trezoran varon, vi ekŝrumpas kiel pikita baloneto! La leonido valoras pli ol duoble la ŝuldon, eĉ kretena vendisto scias tion. Ĉu tiu fakto ankoraŭ ne enpenetris la spongon en via kapo? Kion vi pensas? Ĉu vi pensas, ke oni povas aĉeti leonidojn tiel facile kiel kuniklojn? Leonoj ne petolas sur la kampoj ĉi tie, sciu. Oni ne kaptas ilin per papilia reto. Se vi estas tro stulta por akcepti la leonidon, nu, mi estas kontenta, ĉar mi certe ne volas fordoni ĝin. Sed ne plu ĝenu min. La afero finiĝu tiel. Neniu povos diri, ke mi ne faris malavaregan ofertan."

Tiel daŭris la reciprokaj insultoj, kaj post multe da argumentoj Benzo akceptis la leonidon. Tuj li klopodis vendi ĝin, sed ne sukcesis. Diablo! tion li ne atendis. La leonido embarasis lin, ĉar estis tre maloportune kuntreni ĝin ĉie. Li forlasis la cirkolaboron kaj reiris al foiroj: sed ĝenaj malfacilaĵoj komenciĝis, kiam li provis enloĝiĝi. Li konstatis, ke dommastrinoj tute ne ŝatas havi leonidon en la ĉambroj. —

La rakontanto rigardis al ni ĉiuj kaj iom tro serioze ripetis:

"Jes, amikoj. Kredu-ne-kredu, sed dommastrinoj — cetere tute normalaj homoj — havas tiun strangan ka-pricon, tiun nekompreneblan mankon, ke ili ne ŝatas havi leonidojn en la ĉambroj."

La rakontanto ekbruligis cigaredon kaj daŭrigis:

— Post multaj ĝenaj provoj Benzo komencis ruzi por akceptiĝi en loĝejon. Li lasis la leonidon provizore ĉe iu, luprenis ĉambron, kaj post la mallumiĝo enportis la leonidon. Ĉiutage li devis ŝteliri, por aĉeti viandon por la besto, kaj reveni mistere kun volvaĵo sub la brako. Sed tiu damnita leonido manĝis senfine. Benzo pli kaj pli zorgumis. La kosto de la viando iĝis peza ŝarĝo. Kiam la dommastrino volis enveni por ordigi la ĉambron, ŝi trovis ke la pordo estas ŝlosita kontraŭ ŝi kaj ŝi komencis esti suspektama. La enporto de la misteraj pakaĵoj kaj la elporto de la necesaj sed same misteraj pakaĵoj pliigis lian suspekton. Ŝi imagis ke io terure stranga okazas en la ĉambro, kaj kvereloj rezultigis, dum kiuj ŝi faris amarajn aludojn al magiaj ritoj kaj nigra sorĉo, sed Benzo ne cedis eniron al ŝi. Fine li ricevis de ŝi forlas-avizon kaj li devis atendi oportunan momenton por ŝtele eliri kun sia leonido.

Denove li serĉis ĉambron kaj denove li devis ruzi. En la nova loĝejo la farso rekomenciĝis. La leonido ŝajne volis ĉiam gluti, kaj se Benzo ne prethavis sufiĉe da viando, ĝi komencis muĝi; do, por senbruigi ĝin, li estis devigata plensĉtopi ĝin per manĝaĵo. Kaj la laboro, kaj la prizorgo de la besto, kaj la ĝeno, kaj la senmoneco: ĉio kune reduktis

Benzon al kompatinda stato. La leonido pli kaj pli grasiĝis, dum Benzo pli kaj pli maldikiĝis. Dumtempe la besto kreskis kaj komencis agi iom minace, kaj samritme kun la kresko de la besto kreskis la premzorgo de Benzo. Unu vesperon li revenis en la ĉambron kaj trovis la leonon sur la lito; sed kiam li provis malsuprenigi ĝin ĝi murmuris terurige, do Benzo devis dormi sur la planko. Ni kunlaborantoj de Benzo multe ŝercopikis lin pri la okazaĵo, kaj li furioziĝis. Ĉiuj ridis pri li kaj diris, ke li estas pli sovaĝa ol la besto. La kompatinda Benzo fariĝis malbonhumora, malgrasa kaj di-boĉaspekta pro nesufiĉa dormo, dum oni povis imagi glatan, grasrondan leonon trankvile ripozantan sur la lito kun rideto, kiu streĉiĝis de orelo al orelo. Benzo sovaĝe bojis kontraŭ niaj ŝercopikoj, kaj mankis nur tempo, por ke la homo bestiĝu kaj la besto homiĝu. Kompato komencis tuŝi nin, ĉar li ja estis en terura stato; sed niaj bonintencaj konsiloj nur pli kolerigis lin, ĉar li taksis ilin kiel blagojn. Li nun perdis ĉian iniciativon kaj ne povis pensi kion fari.

Sed unu tagon venis la krizo. Dum lia foresto el la ĉambro la dommastrino havigis al si kroman ŝlosilon kaj malŝlosis lian ĉambropordon. Ŝi tre suspekteme ŝtelrigardis en lian ĉambron, atendante vidi mi-nescias-kion. Kio ajn estis lia atendo, ŝi certe ne estis preta ricevi tian ŝokon. Ŝi ŝovis la kapon en la ĉambron, kaj ŝiaj okuloj gluiĝis sur la besto. La leono subite antaŭenmoviĝis, kaj la dommastrino tujtuj fermetiris la pordon kaj reŝlosis ĝin. Ŝi staris frostigita dum momento kaj, post konsciiĝo, eligis kriĉon kiel lokomotiva fajfilo kaj forkuregis laŭ la koridoro ĝis duonvoje, kie ŝi falis en plena sveno. Alarmite, homoj kuris el la ĉambroj kaj komencis revivigi la dommastrinon. Ŝi rekonsciiĝis, malfermis la okulojn kaj ĉe la rememoro larĝigis la okulojn kaj komencis histerie kriegi:

"Leonoj, teruraj leonoj en la ĉambro! Ho Dio, savu min! Ho Dio, ili saltis al mi, grandaj, sovaĝaj leonoj! Tiu diablo, tiu vampiro kaj lia sorĉarto, tiu monstro el infero!"

"Sed kio estas, kio estas?" voĉoj demandis al ŝi.

"En tiu ĉambro, tie, leono atakis min. Ĝi estas leona monstro. Ne eniru, pro la sanktuloj ne eniru: ĝi estas terura monstro, ĝi preskaŭ disŝiris min per la ungegoj pli ol unu futon longaj! Ĝi saltegis al mi, ĝi havas kornojn, — je Dio, ne malfermu la pordon — estas ĉiuspecaj monstroj tie!"

"Trankviliĝu, ne tremu, ni helpos!" diris la voĉoj; sed la dommastrino nur kriadis el tuta gorĝo panikan galimation da kontraŭdiroj.

133

Iu vokis policanojn.

"Nu," diris unu el la policanoj, "regu vin kaj diru al ni, pri kio temas."

"En tiu ĉambro, numero ok, estas teruraj bestformaj monstroj. Apenaŭ mi eskapis viva."

"Nu, nu, ne ekscitiĝu, ni protektos vin," diris la policano, per tono, kiun oni uzas por pacigi frenezulon. "Ĉu la bestoj havis gajajn kolorojn?" Kompreneble la policanoj pensis, ke ŝi estas aŭ freneza aŭ ebria. "Estu nur trankvila, ni forigos la bestojn, ne ĝenu vin, lasu al ni!"

"Jes, jes, forigu ilin tuj — estu singarda, eniru armite — voku pastron, ke ekzorcu la diablojn!"

"Donu al ni la ŝlosilon!" diris la policano tute trankvile, kaj duonridete li kaj lia kolego alproksimiĝis al la pordo, sed ĝuste tiam aŭdiĝis muĝo el la ĉambro.

"Jen, jen," kriis la dommastrino. "Ĉu mi ne diris?"

La grupeto da homoj tuj forkuris for de la pordo, kaj la du policanoj restis senmove. Post hezito unu diris al la alia: "Ni ne rajtas eniri privatan ĉambron sen serĉmandato."

Esprimo de malŝarĝo heligis la vizaĝojn de la policanoj ĉe tiu elturno. Ili sin turnis al la dommastrino: "Kie troviĝas la luanto de la ĉambro?"

"En la foiro, ĉe stando 13. Lia nomo estas Samuel Rogers."

La du policanoj iris al la stando kaj flustre parolis al Benzo. Li kviete foriris kun ili.

Pasis tri tagoj, dum kiuj nin jukis la scivolo. Jaŭde matene li revenis, palante tra la aleoj kun iom de la malnova aplombo.

Ni kuris al li. "Kio okazis?" ni demandis.

"Aranĝite, knaboj!" diris Benzo. "Nu kio? Iom da tondro kaj hajlo en la policejo, sed tio tuŝis min kiel akvo anseron. Nun ja ili transprenis la zorgon, kaj ĝi donis al ili urtikon en la kalsonon! Kion fari? Ili devis eltiri la leonon kun helpo de cirkaj dresistoj, kaj ili loĝigis ĝin ĉe la cirko. Tamen la besto ja restis mia! Tion ili ne povis ŝanĝi. Ili akuzis min pri rompo de l'paco, mi kontraŭakuzis, ke ili senrajte forprenis mian proprajon. Diable, tio mutigis ilin! Ili estis inter martelo kaj amboso ne sciis kion fari. Mi vidis ilin danceti kiel kato sur fornoplato. Fine mi konsentis intertrakti, kaj ili vendis la leonidon al la zo'lo — kredu, mi bone remburis la prezon! Jes, knaboj, lasu min fari: mi scias min aranĝi. En mia cerbo ne kreskas herbo. Kiu min tuŝas, min sentas!"

Tion rakontis Benzo; sed pri tiu parto de la rakonto mi ne garantias. Mi mem rakontas nur la puran veron, kiel bonpia bazarulo; sed vi ĉiuj scias, ke Benzo mensogas kiel funebra parolo! —

*Cezaro Rossetti
(el "Kredu Min, Sin jorino!")*

Via legtempo sekundoj

Respondu la sekvantajn demandojn :

1. Kion la bazaruloj faris kiam ili kolektiĝis en la foira restoracio ?

- a) ili silente manĝis.
- b) ili babiladis pri negocoj kaj foiroj.
- c) ili ofte kverelis.

2. Kie Benzo trovis laboron.

- a) ĉe cirka budo.
- b) ĉe zoologia parko.
- c) ĉe la foira restoracio.

3. Kiu estis la unua problemo de Benzo ?
- akcidento dum la laboro.
 - ne repago de alprunto.
 - perdo de laboro.
4. Kiun beston oni proponis al Benzo ?
- leonidon.
 - simion.
 - krokodileton.
5. Kial Benzo ricevis la beston ?
- anstataŭ repago de alprunto.
 - ĉar la cirko bankrotis.
 - ĉar amiko donacis ĝin al
6. Pri kio aludis la suspektemaj dommastrinoj kiuj ne rajtis eniri lian ĉambron ?
- pri kaŝo de kunulino.
 - pri ritoj.
 - pri kaŝo de rabaĵoj.
7. Kio okazis al la besto ?
- ĝi eskapis dum foresto de Benzo.
 - ĝi kreskis kaj komencis agi minace.
 - ĝi fariĝis la plej bona amiko de Benzo.
8. Kio okazis al Benzo ?
- li fariĝis malgrasa kaj diboĉaspekta.
 - li fanfaronis pri la kapabloj de sia besto.
 - li fondis novan cirkon.
9. Kiom da policianoj venis post voko de la dommastrino ?
- unu.
 - du.
 - tri.
10. Kiel la afero fini ĝis ?
- Benzo estis enkarcerigita kaj juĝita.
 - Benzo daŭrigis sian vivon kun la besto.
 - La polico vendis la beston.

La teksto enhavas 10196 signojn. Nun per la sekvanta tabelo vi povas kalkuli vian legrapidon en signoj en unu horo.

legtempo	Legrapido
2'	305 880 s/h
3'	203 920 s/h
3'30	174 788 s/h
4'	152 940 s/h
5'	122 352 s/h

6'	101 960 s/h
7'	87 394 s/h
8'	76 470 s/h
9'	67 973 s/h
10'	61 176 s/h
11'	55 614 s/h

Via proksimuma legrapido :s/h

Vi povas mezuri vian komprenon per komparo de viaj respondoj al la demandoj kun la sekvanta listo de bonaj respondoj :

1b, 2a, 3b, 4a, 5a, 6b, 7b, 8a, 9b, 10c.

Via legkompreno estas 100% se vi havas 10 bonajn respondojn, 90% se 9 bonajn respondojn kaj tiel plu.

Via legkompreno :%

Nun vi povas kalkuli vian efektivan legrapidon per la sekvanta formulo : (via efektiva legrapido) = (via mezurita legrapido) x (via legkompreno).

Por ekzemplo se via mezurita legrapido estas 100000 s/h kaj via legkompreno 80 %, tiam via efektiva legrapido estas nur 80 % de via mezurita legrapido, tio estas 80000 s/h.

Via mezurita legrapido : s/h

Via legkompreno :%

Via efektiva legrapido : s/h

3.1 Ekzercoj por eviti la (sub)artikulaciadon

Tiuj ekzercoj konsistas el frazoj kiuj enhavas multajn vortojn kun similaj silaboj por stumbligi vian legadon. Ne atentu pri la signifo de tiuj frazoj.

Vi devas legi ilin kiel eble plej rapide. Por tio vi devas mezuri vian legtempon kaj trejni vin por malgrandigi ĝin sed tamen vi devas kompreni ĉiujn vortojn de la frazoj.

Faru tiun ekzercon almenaŭ unufoje ĉiusemajne.

EKZERCO :

Do Dio donis al Doris domon el domenpecoj apud dolmeno.

La luno lumis laŭ la landlimo.

Ses sekaj seĝoj sed sen severaj serĝentoj.

Korpo kun koro de korvo troviĝis en korbo kie korniko kore kovis kovrante neston per sia korpo.

Blonda, blanka, blua, blinda blekanta blato.

Rato en rako raportis antaŭ ravitaj ratidoj pri rapida rabado de raspita fromaĝo. Iu ploris pri pluraj plenplenaj pladoj en pluvo sur plaĝo apud platanaj.

Laŭ propono de profesia profesoro prova provizo de proviantoj kaj protekto devus produkti profiton kaj prosperadon.

Vi vene vendis vere verdan veston kaj vendrede vete venkis vekiĝantan vermon. La monaFio sen mono sur la monto montris al monstra monumento.

Kara kato kaj kaduka kapro kun kalva kapo kaŝitaj en katolika kapelo kaptiĝis en kana kaĝo.

Konstanta kondiĉo estas la kontentiga konsidero de la konsekvencoj de konsilita konduto.

Tri trikistinoj tre tremis trovante trotrinkintojn de tiu tribo sur trotuaro.

La ĉefo sen ĉemizo pro ĉeko de ĉeestanta ĉeho ĉesis ĉerpi kaj kaptis la 'ĉenon ĉe sia ĉevalo.

Pagana patro kaj pala pastro pace paŝis sur pa.jlo en parko pase preter padelantaj paroj.

La kuzo kun kulo de kuniklo sur kubo kunvenis kun kukolo kaj kune kuiris kurbajn kukurbojn apud kuirita kuko.

Sen sukcesa savo de sekta Sakso ŝi ĉesis serĉi samseksan Sakson por ŝerce suĉi ŝutitan ŝuon.

Via legtempo : sekundoj

NOVA EKZERCO :

(el LA INFORMILO de Nancy Francio) :

Al alta arbara abatejo alpaŝas la anaso.

Bebo babilas bobele.

Celante certecon, ci, sciante ceterajn cirkonstancojn, cedis.

Ĉiam la ĉielo ĉarmas ĉiujn.

Do, didaktikema didelfo sin dediĉas al dorna dogmo.

Ermita elefanto evitas evidentajn erarojn.

Fabla fiŝo faras fantaziajn fanfarojn .

Guma gudro gluas genuojn de generaloj.

Ĝemelaj ĝirafoj ĝenerale ĝuas ĝentilan ĝojon.

Hirta histriko hurlas hoboje.

Ĥameleonoj en ĥitonoj ĥaose ĥoras ĥorale.

Iam, iel, ia insida infano iom insulte kaj ironie imitis ilin.

Jes ja, jam la jaro januaras.

Ĵusa ĵurnalo ĵuras ĵargone ke ĵudisto raze ĵonglas en ĵipo.
Knabo kolektas kokajn koksojn.
Lundon la larma luno lulis lekantojn kaj liliojn.
Momente morgaŭ la mondo muĝos mistere.
Neniam necesas nutri naciojn najbarajn nukle-bombe.
Obstinaj oficiroj observas ornamitajn orajn ovojn ostracisme.
Purpura papilio palpebrumas palpite.
Ronde kaj ronde rulis la radoj.
Ronkante ripozis la ridema reĝo.
Serioze kaj solene en la selo sidis la skeleto.
Ŝajne lanco ŝanĝas ŝablonojn.
Tamen tempo tenas tiaman tiklan tigron.
Ume umu per uma umilo.
Urba urso unikas universitate.
Varma vanta vampiro venas vane.
Volonte Volapukano vokas vin volupte.
Zitero zumas zorge. Zebro zigzagas zenite.

(el MONATO 4/85 p29) :

afabla avo en Aŭstrio.
blua botelo en Bulgario.
cigareda cindro en Centra Afriko.
ĉefa ĉambro en Ĉeĥoslovakio.
dolora dento en Danlando.
erara edzo en Ekvadoro.
flava fromaĝo en Finnlando. gaja gasto en Grekio.
ĝentila ĝirafo en Ĝibutio. helpema homo en Hungario.
ĥaosa ĥoro en Ĥarkovo.
interesa insulo en Indonezio.
juna jaguaro en Jamaiko.
ĵaluza ĵurnalisto en Ĵuraso.
kuranta kato en Kanado.
longa lito en Luksemburgo.
memorinda monto en Maroko.
neĝa naturo en Norvegio.
ordinara oranĝo en Oceanio.
ploranta policisto en Portugalio.
ruĝa robo en Rumanio.
sola sinjoro en Svedio.
ŝerca ŝejko en Ŝanhajo.
trankvila trajno en Tanzanio.
la unua urso en Usono.
verda vilaĝo en Vjetnamio.
zigzaga zebro en Zairo.

Via legtempo : Sekundoj

3.2 Ekzercoj por eviti la konfuziĝojn

Tiuj ekzercoj konsistas el frazoj, kiuj enhavas similajn vortojn, kiuj povas okazigi konfuziĝojn. En ĉiu frazo troviĝas almenaŭ du vortoj, kies diferenco konsistas el unu malsama litero (por ekzemplo "ano" kaj "amo") aŭ unu plia litero (por ekzemplo "frazo" kaj "fazo").

Vi devas legi ilin kiel eble plej rapide. Por tio vi devas mezuri vian legtempon kaj trejni vin por malgrandigi ĝin sed tamen vi devas kompreni ĉiujn vortojn de la frazoj.

Faru tiun ekzercon almenaŭ unufoje ĉiusemajne.

EKZERCO

Muŝo flugis preter la muso.

Neniigo de ordeno per reĝa ordono.

Ŝinko ne troviĝas en la sinko.

Struto sur strato promenis.

Ŝarko ne ĝenos vin dum sarko en via ĝardeno.

Nur du slavoj estis inter la sklavoj.

La ŝalo falis apud la salo.

Kato en koto ne bele aspektas.

Lia saĝo malaperis pro preterpasinta sago.

Multaj fosilioj troviĝis helpe de tiuj fosiloj.

Ŝi ŝaltis kaj saltis pro surprizo.

Peco de pano miksiĝis en la peĉo.

Donaĉo ne same valoras kiel donaco.

Plagoj sur plaĝoj povas trafi vin.

Danoj estis meze de la kanoj.

Lia poŝtaĵo estis sub mia poŝtaĵo.

Tiel tie ĝi malaperis por ĉiam.

Enurbe bomboj falis sur tomboj.

Korvo sidis rande de korbo.

La kolo de la koko estas ruĝa.

Sur la ŝtupo estis ŝtipo.

Pro kliniĝo la kranio koliziis kun la krano.

Li trinkis dum ŝi trikis.

Paso per paŝo post paŝo ne estas rapida.

La aĉeto de tendo estis grava tento por li.

La reĝo sen rego koleris.

La boto cstis en la boato.

Al si ŝi faris vundetona.

Pro kapta fuŝo la fiŝo falis en la maron.

La bazo de lia nazo jukis lin.

La rozo kun roso velkis.

Jelpi ne povas helpi.

Vendo de flagoj en vento estas malfacila.

Jen benko donacita de banko.

Generalo ĝenerale komandas armeon.

Advokato ne utilas kontraŭ malbona advokado.

La knabo ne nur kraĉis sed ankaŭ kriaĉis.

Post sabato la salato ne plu estos bona.

La kono de la kodo povas utili.

Post ŝato venas sato.
La kuzino kuŝis sur kuseno por akuŝi.
Li tuŝis tiun kiu tuisis.
Nun pano estas akirebla sen peno.
Por ĉies plaĉo la placo estas ornamita.
Provi por pruvi sian kapablon.
Alfluganta jeto jeto de ŝtono estas ridinda.
Sen ostoj estas ostroj.
La Krista kruco pendis super la kruĉo.
Multaj eraroj troviĝas en la nomaro de la eraoj.
Apud brioĉo kuŝis broĉo.
Bredi kokojn sen kredi je estonta vendo.
La sego de ligna seĝo estas facila.
Volvita ĉirkaŭ la fosto estis ĝia vosto.
La patro de la pastro multe vojaĝas.
Post dormo en la domo la viro manĝis.
La ŝtelo de la stelo okazis sabate.
Jen la plej alta monto en la mondo.
Tie li loĝis kaj logis multajn.
Cigano kun dika cigaro trinkis.
Nia nuna suna sistemo estas tre malnova.
La stato de la ŝtato malboniĝis.
Laŭta lego de tiu leĝo tre utilus.
La ĥoro daŭre kantis dum unu horo.
Manĝo de mango estus bonvena.
Aviadilon kaptis Ruso per ruzo.
Temporaba estas serĉo de ŝerco.
Necesa povas estis ŝanĝo de sango.
Besto ne ĝojas en kesto.
La vido de vipo forkurigas lin.
Per salto super la salato la rano fuĝis.
Eĉ ĉelo ne vivas sen celo.
Piza ŝelo sidas sur ĉevala selo.
La lupo rigardis tra lupeo.
Per versoj li pagis por vinaj verŝoj.
Kun granda intereso li eksciis pri la interezo.
Ŝargo de pafilo kaj larĝo de kamiono.
Ili estis ses aŭ sep sed ne pli.
Ĝuste laŭ via gusto.
La pezo estas konata nur post peso.
Gejunuloj kun malfermita buŝo sidis en buso.
Parto de tiu karto estas el kartono.
Se vi ne bluiĝos ĝin, ĝi ne bluiĝos.
La afiŝo pri la fiŝo estis tie.
Rigidaj personoj povas estis ridigaj.
Konsilinda estas kaŝo de kaso.
Sendepende de ago venas aĝo.
Jen kaĝo desegnita sur tiu paĝo.
Post vido venas fido.

Via legtempo : sekundoj

NOVA EKZERCO :

La porto al la bordo okazis tra tiu pordo.
Aranĝo de oranĝoj por faciligi ilian vendon.
La kanajlo baraktis kontraŭ fortika najlo.
La sekvo de tiu servo estos rekompenco.
Ŝi lavis la buŝon de la bebo kiu bavis.
Ŝi levis la tukon kiun ŝi lavis.
Je tiu epoko la lasta ezoko kaptiĝis.
Kakto pikas, jen la fakto.
Estas konsilinde stari antaŭ ol starti.
Tiu ludilo amuzas kiel lulilo.
Por ludi per ĝi, vi devas lui ĝin.
Sur tiu korto ne mankas koto.
Doloriga estas bato per pato.
Ne eblas kovo de struto en kuvo.
Prefereble sidi por pli bone vidi.
Li famiĝis pro verkado pri velkado de floroj.
Unue kolektado kaj poste korektado.
La paro malaperis sur la maro.
Malgaja estas vivo sen vino.
Lia apero en la aero estis surpriza.
La rato dormis en la rako.
La koro de tiu korvo estas malvarma.
Li venis kaj vendis multajn pomojn.
Neniu trovo eblas sen provo.
Jen truo en la turo.
En la nesto estis la resto de la familio.
La timo estis la temo de ŝia prelego.
La bato de kato estas kondamninda.
La kosto de la fosto estas granda.
Por ofta lavado tiu lavabo bone taŭgas.
La titolo de tiu balado estas "banado en la suno".
La kresko de ĝia kresto estas finita.
Per kiso al sia kaso li montris sian avidemon.
En tiu budo la ludo povas okazi.
En marto post marŝo li rigardis al Marso.
Post mordo ĝis morto, la ĉashundo revenis.
Por li posedo estas vana obsedo.
Ne iru sen botoj en tiu koto.
Se vi daŭre sidas sur seĝo, la sieĝo ne povas sukcesi.
Foriris la viro post la vido de tiu akcidento.
Post peto sekvis lia veto.
La bova herbo estas nova.
Iun tagon ni vidis fagon.
Tiu paro estas parto de la grupo.
Peniga estas porto de porko.
La porto ĝis la pordo estis facila.

La poto estis en la boto.
Per premo eliras la kremo.
Troviĝas pafilo supre super ni.
Se vi ne havas pagilon, uzu pafilon.
Sub la tablo estas sablo.
Eĉ la lumo de la luno ne mankas.
Tra la lukto vidiĝis ilia lukto.
Malantaŭ la pordo la perdo okazis.
Apud la fajro lia fajfo klare aŭdiĝis.
La knaboj kun multaj kraboj revenis.
La sorto frapis en tiu korto.
Nur post peso paso eblas.
Feloj de bestoj estas iliaj vestoj.
Granda estas povo de bovo.
Eĉ sekunda pensado povas esti fekunda.
Li dormis kun la flanko sur la planko.
Sur breto povas okazi bredo de helikoj.
Pro vundo de lia lango, la sango fluis.
Pli facile estas kuri ol kuiri.
Li ofte kuiras sed ankaŭ kudras.
La gastoj adiaŭis per multaj gestoj.
Rosto de ostoj eble plaĉus al hundoj.
Koloro kaj oro ne mankis ĉirkaŭ ŝia kolo.
Por iri al fora planedo necesas bona planeto.
La teraso estis farita sur teramaso.
La marvestoj ne povas utili al marbestoj.
La rumo estis kontraŭ la muro.
La stato de la statuo estas bona.
Kruela bando regas en tiu lando.
En tiu lando lano abundas.
La reĝimoj kun reĝinoj ne estas pli bonaj.
Lia serena vizaĝo montriĝis ankaŭ severa.
Jen frua sed brua deiro.
Al novicaj provantoj utilas proviantoj.
Lia falo dum la balo ne surprizis min.
Lia oferto estis grava ofendo.
Ĝia lasta plezuro estis naĝo en kaĝo.
Per flato al ŝia frato li ekparolis al la knabino.
Eĉ rabo de robo estas punenda.
La karbo estis en la korbo.
La ministroj parolis al la ministoj.
La trafo de la celo far la grafo silentigis ĉiujn.
Li salutis kaj saltis.
Meze de torĉoj la sorĉoj okazis.
En kazo de okazo vi rajtos veni.
Tiu premio estos via sen ekstera premo.
Li tranĉis ĝian longan langon.
Tiu perdo de perlo malgajigis ŝin.
La maljuna bardo paroladis ĉe la bordo
Lia vizaĝo estis konata en tiu vilaĝo.

Li saltis kaj haltis por saluti.
Malantaŭ la placo estas la palaco.
Tie atendu kaj atentu pri ĉio.
Malfacila estas la vivo kun manko de mano.
Per premo povas okazi preno.
Bela estis la lago en tiu tago.
La koko de tiu loko estas ruĝa.
Senlima bonkoreco kaj sentima kuraĝo.
Difektado ne ĉiam okazas kun direktado.
Post akuzo de lia kuzo li forkuris.
La ratoj troviĝis en la rompitaĵoj.
Firmoj pri filmoj estas malmultaj.
Iu gastubo rompiĝis en la gasturbo.
Borde de rivero, ŝi torde senakvigis tukon.
Ŝi estis blonda kaj blinda.
Li tretis per la plando sur tiu planto.
Ne parolu pri alfabeto al fabeto.
Jen legendo legenda por vi ĉiuj.
El vundo per sago sango fluis.
Ŝia koliero estis el kapraj kaj apraj dentoj.

Via legtempo : sekundoj

3.3 Ekzercoj por plirapidigi la okulmovojn

Tiuj ekzercoj konsistas el tekstoj en mallarĝaj kolumnoj. Viaj okuloj devas moviĝi nur unufoje en ĉiu linio por salti de la komenco de la linio al la fino de la linio sen halti intertempe.

Vi devas legi ilin kiel eble plej rapide. Por tio vi devas mezuri vian legtempon kaj trejni vin por malgrandigi ĝin.

Vi devas trudi al viaj okuloj movrapidon pli altan ol kutime, tiel vi povos lukti kontraŭ la artikulaciadon kaj la subartikulaciadon (se necesas) kaj kutimigi viajn okulojn al pli rapida legado. Ne gravas se vi havas la impreson ne kompreni la tekston, ĉar la celo ne estas kompreni la tekston sed estas nur plirapidigi la okulmovojn.

Faru tiun ekzercon se eblas ĉiutage.

EKZERCO :

El "Universala legolibro" Modelaj tradukaĵoj el la tutmonda literaturo kaj originalaĵoj Esperantaj. Wilhelm Fricke. Berlin 1922. Esperanto—Verlag Ellersiek Borel.

La terpomoj

de Schubert. Tradukis Kabe.

La	terpomoj	Drake	pensis,
estis	transportitaj	ke	la
el	Ameriko	"frukto"	estas

Eŭropon	unue	la	verdaj
antaŭ	kelke	tuberoj,	kiuj
da	jarcentoi.	pendas	sur
La	marveturisto	la	kreskaĵo .
Francisko	Drake	Kiam	venis
sendis	iom	la	aŭtuno
da	ili	kaj	la
al	sia	tuberoj	jam
amiko	por	estis	flavnj,
plantado	kaj	li	invitis
skribis:	"La	multe	da
frukto	de	eminentaj	gastoj
tiu	ĉi	al	luksa
kreskaĵo	estas	festeno.	Je
tiel	bongusta	la	fino
kaj	nutra,	oni	alportis
ke	mi	kovritan	pladon,
opinias	gan	kaj	la
kultivadon	tre	mastro	levi ĝis
utila	por	kaj	diris
Eŭropo".	La	belan	paroladon:
amiko	de	"Nun	mi

havas	la	rondajn	tuberojn
honoron,	prezenti	en	la
al	vi	cindro	de
frukton	kies	la	fajro
semon	mi	kiun	ekbruligis
ricevis	de	por	si
mia	amiko	la	ĝardenisto
nia	fama	Li	disprenis
Drake,	kun	unu	per
certigo,	ke	la	piedo:
ĝia	kultivado	ĝi	havis
estos	tre	agrablan	odoron,
utila	por	tio	estis
Anglujo" .	La	bakita	terpomo.
invititaj	parlamentanoj	Li	demandis
gustumis	la	la	ĝardeniston,
frukton,	rostitan	kio	ĝi
en	butero	estas.	La
kaj	surŝutitan	ĝardenisto	diris
per	sukero	al	li,
per	cinamo,	ke	li
sed	ĝi	trovis	la
estis	abomena .	tuberojn	ĉe
Ĉiuj	esprimis	la	radikoj
la	opinion,	de	la
ke	la	amerika	kreska ĵo.
frukto	eble	La	amiko
estas	bona	de	Drake
por	Ameriko,	komprenis	nun
sed	en	ĉion .	Li
Anglujo	ĝi	ordonis	kolekti
ne	maturiĝas.	kaj	kuiiri
La	mastro	la	subterajn

ordonis	post	tuberojn	kaj
kelke	da	invitis	la
tagoj	el ŝiri	parlamentanojn .	Kredeble
kaj	forjeti	li	diris,
la	kreskaĵojn.	ke	kiam
Sed	foje	oni	juĝas
matene,	promenante	supraĵe,	oni
en	la	ofte	faras
ĝardeno,	li	grandajn	erarojn.
rimarkis	nigrajn		

Via legtempo sekundoj

ALIA EKZERCO :

El "Universala legolibro" Modelaj tradukaĵoj el la tutmonda literaturo kaj originalaĵoj Esperantaj. Wilhelm Fricke. Berlin 1922. Esperanto—Verlag Ellersiek Borel.

La reĝo kaj lia servisto

El la kolekto da Tataraj rakontoj de prof. Katanov el Kasan.

El la lingvo rusa tradukis A. Kofman.

Reĝo sidis	ĉe sia tablo
kaj atendis	la alporton
de manĝaĵoj	Sed unu el
la servistoj,	kiu estis tre
timema, faletis,	kaj kelkaj
gutoj de la	buljono ŝprucis
sur la veston	de la reĝo.
La reĝo koleris	kaj ordonis
senkapigi la	mallertulon.
La malfeliĉulo	pensis: "Mi
estas filo de	la morto, mia
savo estas	neebla!" kaj
li prenis la	buljonujon
kaj verŝis	ĝian enhavon
sur la reĝon.	Tiu ĉi
miregis kaj	ekkriis: "Ho
junulo, ĉu	vi estas
posedata de	frenezo? Kion
vi faris?"	La servisto
diris: "Mia	reĝo, mi ne
freneziĝis,	miaj pensoj
estas en	ordo. Mi
kuraĝis fari	tion ĉi, por
danki vin pro	la boneco al
mi. Nun la	homoj ne diros
pri vi: la	reĝo ekzekutigis
malfeliĉulon	pro ia bagatelo
ili laŭdos	vin kaj diros:
la reĝo estas	tute prava kaj
neriproĉinda,	ĉar la servisto
montris	teruregan kaj
nepardonindan	arogantecon."


La reĝo pensojn kaj junulo, kaj bone vin mi pardonas faron pro via klarigo." Kaj al li bonan	profundiĝis en diris: "Ho, malbone aganta senkulpiganta, vian abomenan lertega la reĝo faris donacon.
---	--

Via legtempo : sekundoj


3.4 Ekzercoj por plilarĝigi la legkampon

Por tiuj ekzercoj vi bezonas du kartonpecojn kun fendo laŭ la formato de la sekvantaj bildoj :

Por la trikolumnaj paĝoj



Por la dukolumnaj paĝoj :



Vi ŝovos vian kartonpecon sur la legota kolumno por aperigi ĉiujn liniojn de la kolumno en la fendo unu post la alia de la supro al la malsupro.

Vi mezuros la tempon necesan por legi ĉiujn liniojn de ĉiuj kolumnoj de ĉiu paĝo. La tempo necesa por legi ĉiujn vortojn de iu ajn paĝo devas esti preskaŭ la sama por ĉiuj paĝoj kun

samnombra kvanto de kolumnoj kvankam la nombro de la signoj en ĉiu linio multe malsamas de la unua paĝo al la lasta.

Vi devas trudi movon de la kartonpeco pli kaj pli rapidan por ne lasi al vi la tempon por artikulacii aŭ subartikulacii.

Vi devas provi ĉiam plibonigi vian legtempon, pro tio estas pli bone trejni sin autage se eblas dum almenaŭ 4 semajnoj per tiuj ekzercoj.

Utiligu vian kartonpecon kun fendo por tiu ekzerco.

Mezuru la tempon necesan por fari tiun ekzercon.

du	aŭ	el
io	ĉu	se
al	da	ja
jam	ses	ĉiu
tie	pli	por
unu	ajn	tri
plej	apud	alta
fojo	tiom	kapo
bela	cent	ĉiam
kvar	homo	krom
ankaŭ	afero	super
nenio	forta	nacio
inter	helpi	kelka
amiko	nenie	lerni
hieraŭ	flanko	feliĉa
infano	ĉirkaŭ	ĉambro
facila	granda	hodiaŭ
kvankam	komenci	dekstra
sinjoro	rapidaj	veturas
demandi	familio	persono

Via legtempo : sekundoj.

Utiligu vian kartonpecon kun fendo por tiu ekzerco.

Mezuru la tempon necesan por fari tiun ekzercon.

nun	mil	dek
per	nur	kio
tia	iam	jen
kies	diri	nomo
post	jaro	tial
loko	kiel	esti
kvin	juna	alia
piedo	resto	okazi
antaŭ	plena	lando
neniu	lerni	longa
tamen	nenia	ambaŭ
morgaŭ	frukto	preter
deziri	kvazaŭ	libera
rapida	paroli	apenaŭ
ĉevalo	ekster	fingro
ankoraŭ	konsili	postuli
semajno	almenaŭ	kontraŭ
kompreni	fenestro	intereso
proksima	renkonti	prezenti
printempo	historioj	trankvila

Via legtempo : sekundoj.

Utiligu vian kartonpecon kun fendo por tiu ekzerco.

Mezuru la tempon necesan por fari tiun ekzercon.

kiu	ami	tiu
iri	ĉia	ĵus
loko	mano	tero
bona	tuta	kiom
diri	fini	havi
tiam	kial	nova
riĉa	tago	koro
kampo	tempo	sendi
lasta	devas	ruĝaj
kredi	multa	mondo
grave	porti	klare
afabla	militi	memori
montri	blanka	popolo
restas	rimedo	necesa
vizaĝo	kolore	skribi
bezonis	punktoj	momento
lingvaj	rigardi	diversa
vespero	trinkis	permesi
rimarki	precipa	valoraj
anstataŭ	respondi	aŭskulti

Via legtempo : sekundoj.

Utiligu vian kartonpecon kun fendo por tiu ekzerco.

Mezuru la tempon necesan por fari tiun ekzercon.

kaj	mem	dum
ĝoji	vojo	viro
formo	preni	nigra
morti	patro	vorto
fingro	kreski	vojaĝi
propra	letero	varmaj
ricevi	simpla	mateno
akcepto	rakonti	justulo
agrabla	interna	samidea
direkto	plezuro	preskaŭ
forgesi	kolekti	senpage
pardone	nombroj	ŝercadi
konsen.ti	kontenta	profunda
kaprompa	novembro	merkredo
produkto	ordinara	sunradio
efektiva	konservi	respekti
rekomendi	industrio	direktoro
ĝeneralaj	kilogramo	karaktero
septembro	materialo	fotografi
reprezenti	aŭtomobilo	aŭtoritato

Via legtempo : sekundoj.

Utiligu vian kartonpecon kun fendo por tiu ekzerco.

Mezuru la tempon necesan por fari tiun ekzercon.

mono	maro	lito
monto	perdi	naski
utila	larĝa	prava
pensi	knabo	glaso
simila	ĉapelo	ordoni
prunto	horaro	angulo
atendi	kuraĝa	atenta
edzino	doloro	batali
serioza	kapabla	konduki
maniero	horloĝo	arĝento
silenti	komerci	grizaĉa
dombirdo	ekzemplo	aranĝado
konstrui	senfunda	vendredo
februaro	invitilo	delikata
plenplena	diferenci	informilo
juĝistaro	konstanta	aventuroj
okcidento	pantalono	ripeti ĝas
promenante	organizado	respubliko
korespondi	meritplena	malvarmumo
dorsapogilo	brasikfolio	apartamento

Via legtempo : sekundoj.

Utiligu vian kartonpecon kun fendo por tiu ekzerco.

Mezuru la tempon necesan por fari tiun ekzercon.

preta	festi	nokto
hundo	verda	kulpa
gajni	supre	plendi
ĝusta	orelo	okulo
elekti	esperi	sufiĉe
komuna	fremda	vintro
natur	rivero	tranĉi
monato	suferi	aparta
kalkuli	mezuras	koverto
dan ĝero	krajono	virbovo
verkema	kompati	prepari
decembro	kuracado	glaciaĵo
surgenua	buterita	makulita
azenkapo	konsisti	aparteni
mensogema	vinbotelo	piedpilko
akcidento	grandioza	kamentubo
sensukcese	akvofonto	kompetenta
instruisto	universala	rekompenco
medikamento	temperaturo	indiferenta

Via legtempo : sekundoj.

Utiligu vian kartonpecon kun fendo por tiu ekzerco.

Mezuru la tempon necesan por fari tiun ekzercon.

valizo	severa	titolo
ornami	tabako	gracia
humila	tondro	tabelo
tritiko	aspekti	daŭrigi
esprimi	freneza	fortika
kurioza	terpomo	difekti
advokato	koncerni	politiko
surprizi	prudenta	evidenta
oportuna	artikolo	komuniki
persekuti	telegrafo	standardo
diligenta	konsideri	tribunalo
proksimume	fundamento	administri
biblioteko	entrepreni	termometro
konversacii	komplementa	Mediterraneo
lambastonoj	prokrastado	konsekvenco
cirkonstanco	eksperimento	flugkompanio
universitato	respondeculo	preparlaboro
aŭskultantaro	kunlaborantoj	administracio
traduksistemo	respondkupono	eksambasadoro
esperantologio	ekstereŭropano	nekonservativa

Via legtempo : sekundoj.

Utiligu vian kartonpecon kun fendo por tiu ekzerco.

Mezuru la tempon necesan por fari tiun ekzercon.

abunda	tapiŝo	streko
diskuti	stomako	preciza
privata	sincera	sekundo
ekskursi	akompani	murmuri
komforta	ekzameni	pacienca
instinkto	fanfaroni	kilometro
kontrakti	komisiono	reciproka
literaturo	konferenco	konscienco
centimetro	inspektoro	metalurgio
konfidenco	ministerio	propagandi
inteligenta	substantivo	malpopulara
horizontalo	koncentriĝi	laborplano
multiplikado	kongrestemaj	bibliografio
postkongresa	kursgvidanto	ekspozicieto
librovendado	terminologio	buĝetpropono
nekontentigaj	maldensiĝinta	seminarilando
karakteriziĝi	reprezentanto	jarkonferenco
provekzemplero	boatrifuĝintoj	politikfaranto
nekonsiderinda	amaskomunikilo	okcidentstilaj
interkompreniĝo	interparlamentaj	produktoprocezo

Via legtempo : sekundoj.

Utiligu vian kartonpecon kun fendo por tiu ekzerco.

Mezuru la tempon necesan por fari tiun ekzercon.

aŭtobuso	kamarado	kvadrato
embaraso	magazeno	kongreso
dekoracio	fonografo	karnavalo
ekvilibro	mekanismo	kategorio
kalendaro	originalo	familiara
malhonesta	neperfekta	suspektema
restoracio	operaciado	matematiko
garantiado	leŭtenanto	interpreti
instrumento	laboratorio	elektroniko
kondamninda	konstitucio	redaktistaro
interpelacii	forkonsumado	eksterminado
alproksimiĝo	amindaspekta	rezignopreta
militviktimoj	pretervidebla	memekstermiĝo
ekkonvinki ĝas	mondlo ĝantaro	termodinamiko
troekspluatado	honordoktorino	direktoredzino
utiligintereso	edukministerio	lingvoproblemo
kontraŭrevolucio	eksterordinara	mediokonservado
televioprogramo	cirkuloprincipo	netranspagipova
pliprofundiĝanta	ekzamenkomisiono	interlingvistiko
sendiskriminacia	kulturinterŝanĝo	konstrumaterialo

Via legtempo : sekundoj.

Utiligu vian kartonpecon kun fendo por tiu ekzerco.

Mezuru la tempon necesan por fari tiun ekzercon.

strukturo	telegramo	distribui
milimetro	triangulo	Aŭstralio
sekretario	psikologio	neprobabla
kompromiti	malmoderna	ortografio
maleleganta	agadmaniero	devenpunkto
helikoptero	endanĝerigi	kapitalismo
memkonsciiĝo	efektivigado	latinamerika
superreganta	mondkoncepto	tre speciala
memkontentiĝo	nekalkuleblaj	subkomprenata
malmultekosta	registarestro	defendsistemo
senprecedencaj	ŝtatsubvencioj	biokibernetiko
filmindustrio	plenumkomitato	tempomezuriloj
literaturpremio	informkampanjo	duonkonduktanta
partoprenantaro	ĉefinstruistino	grundgimnastiko
porcelana botelo	malsama fenomeno	malprofunda maro
nacimalplimultoj	diversaj fakuloj	aparte menciinda
blindulbiblioteko	kargotransportado	plurjara praktiko
elektroproduktado	ĉina marnavigisto	certagrada influo
esperantogramatiko	naturdotita haveno	pitoreska marbordo
eksterlanda turisto	oportunaj aerlinioj	senfrukta modernigo

Via legtempo : sekundoj.

Utiligu vian kartonpecon kun fendo por tiu ekzerco.

Mezuru la tempon necesan por fari tiun ekzercon.

suplemento	akvobezono	bremslampe
persvadado	testamenti	lastatempe
pligrandiĝi	tabloteniso	enkarcerigi
suspektinda	neimageblaj	vivkunulino
disvastigita	konsilantaro	vulkanteorio
plenkreskulo	glacikovrita	sudokcidente
higiena afero	romaneldonado	tegmentorando
daŭre observi	marfunda gaso	malavantaĝulo
totala salajro	nova generacio	bonaj kondiĉoj
urbeta fabriko	kultura centro	grupa kuracado
printempa pluvo	vespere promeni	turisma region
triafoja vizito	malfermita urbo	forigi dormemon
malhelpi moviĝon	malnova ekonomio	amatora kantisto
kvadrataj metroj	elektroventumilo	kuranta jarcento
pendanta sonorilo	fremdlanda muziko	koresponda sekcio
modernaj domblokoj	aprobi rezolucion	enhavoriĉa gazeto
respondeca spirito	konstanta komitato	pririgardi maŝinon
esprimante deziron	medicina vidpunkto	argilaj homfiguroj
respektata profesio	grandskale konstrui	elektitaj anekdotoj
superflua laborforto	ultrrapida aviadilo	nerimarkite elkreski

Via legtempo : sekundoj.

Utiligu vian kartonpecon kun fendo por tiu ekzerco.

Mezuru la tempon necesan por fari tiun ekzercon.

akupunkturo	konsternita	merkatagado
argumentado	manifestado	homaranismo
internaciigo	malboniĝanta	malobservado
reklampanelo	propagandilo	interesantaj
ĉokoladmilito	mondregistaro	pacokonceptoj
cirkonstancoj	inteligenteco	naturkompreno
strategia loko	akiri profiton	kuraĝe kritiki
rigardi. norden	unika tradicio	intertraktanta
someruma vilaĝo	vera fizionomio	kontraŭbatalado
stratprezentado	malsama malsano	unuanime decidi
malsamaj laboroj	konkreta propono	oficiala starigo
proksima lernejo	prefere ripetadi	kreskanta bezono
desegnita pejzaĝo	sinsekvaj numeroj	individue enspezi
evoluintaj landoj	senescepte detru	eksmodaj rigardoj
plenumi redaktadon	laciga vestolavado	estas antaŭdideble
novaj perspektivoj	holografia tekniko	surfotabula velado
altakalkanumaj ŝuoj	avangarda komputilo	plenumi laŭtleĝadon
flava senvertebrulo	forgesita fakgazeto	belega vostonplumaro
respekti demokration	kompreneble bagatela	renkontiĝante saluti
ŝparema dommastrumado	bonvenigi vizitgrupon	ĉielskrapanta cipreso

Via legtempo : sekundoj.

Utiligu vian kartonpecon kun fendo por tiu ekzerco.

Mezuru la tempon necesan por fari tiun ekzercon.

ĉefe pro tio	en sia rajto	voli kaj agi
pri la plano	per bona teo	estas necese
tio ja, eblas	por havi ion	se oni havas
kiel vi scias	per la evoluo	li volus regi
en ĉiu kajero	li konas tion	multe da akvo
mi opinias ke	antaŭ nelonge	ne tute bonaj
ni tion kredas	tute ne gravas	pruvi la rolon
kiam ni venkos	kiel eble plej	pli ol taksita
la unuaj reagoj	miroj da vortoj	kiel li asertas
plendoj pri tio	la sociaj leĝ-oj	ekde la komenco
ni okaze toleris	ankaŭ en noveloj	homoj sen laboro
multe pli gravaj	samtempe kun tio	nun nova danĝero
kiel estis antaŭe	veturi dum ferioj	la fama diktatoro
pro la nova krizo	la nuntempa formo	sed plej verŝajne
supozi ke ekzistas	ĝi okazis telefone	problemo de legado
influo tute fremda	la krutaj deklivoj	la fakulo rakontis
la diversaj aŭtoroj	laŭ ĝenerala opinio	la januara frostego
li rifuzis konfirmi	la principo de vivo	moviĝi sufiĉe longe
flanke de diplomatoj	havi sekretan planon	lumante kaj klukante
tiu organizo enhavas	por longaj distancoj	tiaj devigaj decidoj

Via legtempo : sekundoj.

Utiligu vian kartonpecon kun fendo por tiu ekzerco.

Mezuru la tempon necesan por fari tiun ekzercon.

antaŭ tri jaroj	pro novaj reloj	el dika kartono
kial ne elspezi	laŭ la esploroj	por ĝuste taksi
ne sufi ĉas vivi	tiam mi decides	vidi la fiaskon
pli rapide kapti	la pluvego fluas	muziko el Afriko
raboj kaj ŝteloj	kiam la buldozoj	realigi la ideon
mi certe alvenos	en la tria mondo	kun akraj dentoj
oni povas konfuzi	ludi gravan rolon	por aliaj firmaoj
memoru ke infanoj	sia perioda apero	estas tuj videble
trejni sin regule	la privata roboto	lando de misteroj
la lasta praarbaro	nenio pli konkreta	kun silenta aprobo
kontraŭ la imitado	per kruda traktado	neniam la praktiko
milionoj da knaboj	la sola klara kazo	estus rekomendinde
rimedo por fari ĝin	nun diligente turnu	ekzistas kondukiloj
etendi sian influon	en la sama artikolo	ili singarde marŝis
internacia simpozio	la agado komenciĝis	la ĉevalo teruriĝis
unuafoje en la mondo	en oficialaj asertoj	la nombro de silaboj
periodo de tersekiĝo	reesti moderna lando	baseno plena je akvo
esti lojala partnero	jen imitenda konduto	en la famkonata turo
kelkaj personoj diras	kelkaj gravaj detaloj	koncerne la cerealojn
ekologia kaj ekonomia	la trovita kompromiso	oni atendas miraklojn

Via legtempo : sekundoj.

Utiligu vian kartonpecon kun fendo por tiu ekzerco.

Mezuru la tempon necesan por fari tiun ekzercon.

nun tre kolera	maljusta akiro
perfekt a formo	konata al anoj
maro da mizeroj	ne per la vosto
sed kun talento	preta reciproki
funde de la maro	enbotela informo
bongustaj herboj	batadi la venton
krajoni lipharojn	difektemaj knaboj
mistera kaj unika	tradicia folkloro
nutri per promesoj	aperis nova eldono
modelo de pacienco	komplika kombinaĵo
temas pri preparado	ĝi ankoraŭ funkcias
tie okazis la murdo	tiaspeca fiŝkaptado
ordinara dorlotbesto	grandskala kverelado
sensalajra volontulo	tre malproksima celo
en tre streĉa momento	sugesto de konsilanto
honestaj kaj fidindaj	urĝa helpo dum krizoj
konsentu pri du servoj	defendi sin kontraŭ iu
malantaŭ sovaĝa ansero	tiel grandioza intenco
adekvata surogata sango	tiu knabino nun paliĝas
akcepti valoran donacon	jam en la nuna situacio

Via legtempo : sekundoj.

Utiligu vian kartonpecon kun fendo por tiu ekzerco.

Mezuru la tempon necesan por fari tiun ekzercon.

necesas emfazi	eble pli glora
ekonomia krizo	primitiva vivo
estas dezirinde	kvankam simplaj
bona rekompenco	sub tiu kondiĉo
individua vizaĝo	bruego vekis ŝin
venis la najbaro	ĉe piedo de arbo
amara senluziigilo	pli grava faktoro
iom da kontrolado	en nia nuna epoko
dua aŭtora konfeso	profesia kvalifiko
turista poŝfrazaro	eĉ malgranda grupo
bela ŝajnis la tero	regis plena silento
valora griza papago	probable tre kostaj
malgrandaj notlibroj	plenkreskaj geknaboj
grumblante al si mem	konfeso al policianoj
la provizo de elektro	fama rumana lingvisto
ne estis ilia intenco	krioj iĝis pli laŭtaj
alveninte sur la placo	pafo de ĵaluza tajloro
por rebonigi la aferon	la argumento konvinkis
tamen estas iom maldece	forpelis ŝin la soldato
kun ĝuo ni rigardu tion	post reveno al la ponto

Via legtempo : sekundoj.

Utiligu vian kartonpecon kun fendo por tiu ekzerco.

Mezuru la tempon necesan por fari tiun ekzercon.

longvosta papago	dum multaj jaroj
post la tagmanĝo	jam konata al vi
preteco por kapti	tagmanĝa bifsteko
bonkora maljunulo	universala renomo
avizo en stacidomo	laŭ ĝisnunaj scioj
la trian vendredon	nekonata admiranto
eksterordinara kazo	forfluginta kolombo
numismatika kolekto	avangarda romanisto
post la nova rikolto	privateco iom mankas
vere videbla reklamo	nederlanda pentristo
jen unu el la fabeloj	jen interesa artikolo
restas kelkaj kuketoj	la sorto dorlotis lin
en londona apartamento	sed pro avideco al oro
vere korektendaj eraroj	daŭras tre humana helpo
iuj katoj naĝas volonte	granda estis la danĝero
duono de la ĉeestantaro	maltoleremaj registaroj
pugnobato inter ebriuloj	en multaj eŭropaj landoj
en bopatrina dormoĉambro	konduki hontinde malbone
pluraj mondfamaj geniuloj	kolosa trezoro de juveloj
kun multaj malsamaj domoj	ili ĉiutage promenis kune

Via legtempo : sekundoj.

Utiligu vian kartonpecon kun fendo por tiu ekzerco.

Mezuru la tempon necesan por fari tiun ekzercon.

estus nenia ĝeno	tra la tuta tero
bone kaj sincere	laŭ via bontrovo
necesa al la vivo	kompreneble taŭga
centjara tradicio	medicina problemo
japanaj kuracistoj	supertalenta knabo
ne valoras kvereli	jen mono por helpi
en la ĝusta momento	temas pri preparado
ankaŭ mi povus diri	sendube vi preferus
bonvolu prunti al ni	faktoj kaj fantazioj
preskaŭ ĉiuj popoloj	simio kapablas pensi
antaŭ la loka juĝisto	per la propraj korpoj
la plej stranga besto	tiam li sendis amikon
la kato subite alkuris	tre primitivaj popoloj
ni nomas ilin legendoj	nur la homo argumentas
oni produktas aluminion	granda estas tia atingo
li ne povis bone grimpi	pacienca eksperimentado
la patro eĉ informis min	pardonkapabla prezidento
defendante nasklimigadon	proksimuma interkompreno
arkeologoj trovis indikon	la decido ne estis facila
inter la frostigaj ventoj	tiaj akcidentoj ne okazus

Via legtempo : sekundoj.

Utiligu vian kartonpecon kun fendo por tiu ekzerco.

Mezuru la tempon necesan por fari tiun ekzercon.

prudenta kompromiso	pako da karbopapero
hindua sankta libro	ŝpinadi kaj teksadi
labori kiel amuzisto	klara voĉo de infano
io ne ŝajnas absurda	centra piramida turo
impertinenta ŝtelisto	antaŭjuĝoj de rasismo
anekdoto pri sanktulo	la virkapro malaperis
paŭzante nur por manĝi	hazarde estis malfluso
post la dua mondmilito	bedaŭrinda malpurigado
numero de la aŭtomobilo	eleganta nur sur papero
li aspektis tute kaduka	kovrita per nigra vualo
pli bone rajdi sur azeno	la strutoj neniam flugas
plena de kosmaj simboloj	viro staris sur la sojlo
riski plenan senesperigon	preskaŭ impertinenta peto
modeste kaj milde klarigu	rako por sekiĝantaj fiŝoj
por ĝentile vekti dormanton	lace kaj malrapide piediri
ermito amikiĝis kun lupino	mezurunuo en kelkaj landoj
skulptita trilanga serpento	memdisciplino kaj precizemo
sinteno amikeca kaj gastama	ĉiu devas obei al la devizo
monsumo dediĉita al lernejoj	kolosa kaj altkultura laboro
pagi bovon por akiri edzinon	en mondo ankoraŭ suferoplana

Via legtempo : sekundoj.

Utiligu vian kartonpecon kun fendo por tiu ekzerco.

Mezuru la tempon necesan por fari tiun ekzercon.

ni ankaŭ ne forgesu	por lavi sian bekon
grandskale organizi	insulo sen loĝantoj
ne valoras principoj	ni povas utiligi ĝin
parto de la progreso	elstaraj tradukintoj
mizcre malalta nivelo	mansako el bruna led
kiel eble plej multaj	kato de usona bienulo
tial valoras iri pluen	li foriris tiel rapide
kiom da homoj malsatas	komenciĝis interpuŝado
aŭskultado de sonbendoj	parenteze kaj pedagogie
ĉirkaŭprenante la filon	ĝui pli interesan vivon
kapricema riĉa sinjorino	dum la dekkvina jarcento
kontrolu la temperaturon	multe okupita flegistino
ekzistas tre riĉa kolekto	diskuto pri difinita temo
improvizitaj konversacioj	pruntedoni aŭ pruntepreni
rapide kreskanta industrio	hodiaŭ la hundo same faras
bonvolu havi pretaj por li	provianto por pluraj tagoj
troviĝas ankaŭ bela montaro	ĝi tre malrapide konsumiĝas
laŭ liaj observoj tiutempaj	sugestoj pri saĝa elspezado
marŝis bele vestita elefanto	katalogo pri aktualaj libroj
prelego de vere klera fakulo	kiam la portreto estis preta

Via legtempo : sekundoj.

Utiligu vian kartonpecon kun fendo por tiu ekzerco.

Mezuru la tempon necesan por fari tiun ekzercon.

nevenkeblaj obstakloj	pro grava okulmalsano
la edzo volonte obeis	interspeciaj amikecoj
infano vidis elefanton	kontaktoj multe helpos
ni ne tro turmentu nin	jen persistemaj knaboj
la vivo postulas multon	ekstravagancaj rakontoj
parto de cigana kulturo	longdistanca telefonado
sur la skeleto de mamuto	ĉio troviĝas en tirkesto
best ĝardena biletvendejo	aperis turisma prospekto
inter kaseroloj kaj patoj	la pastro ne nur ne pekis
mia dekdua eldonita libro	ĉe la pordo en la mallumo
preskaŭ centprocente certe	ekzistas pluraj biografioj
flanke de maldekstra genuo	jen la demando konsekvenca
taŭga al personaj interesoj	serene kaj humile li mortis
internacie fidindaj difinoj	vi rajtas elekti uzmanieron
spite progresantan paralizon	ekde siaj suferoplenaj jaroj
dumvive strebi al perfekteco	kunfrotado de iuj intelektoj
sed unu el la fortigaj faktoj	videbliĝas montaraj panoramoj
staris tabuleto kun la vortoj	kuracisto ekzamenis la korpon
mirinda entuziasmo pri la vivo	la sinjorino estis konsternita
foje farena laboro estas teda	abundas mankoj, malestas dankoj

Via legtempo : sekundoj.

3.5 Ekzercoj por legi liniojn per unu aŭ du legkampoj

Kiel multaj personoj vi legas plurajn revuojn aŭ ĵurnalojn. Ofte la tekstoj estas presitaj en mallarĝaj kolumnoj. Se via legkampo estas sufiĉe larĝa vi povos legi ĉiujn liniojn per unu aŭ du legkampoj. Ni konsideris kelkajn esperantlingvajn revuojn kaj mezuris ilian mezan kolumnolarĝecon.

nomo de la revuo	kolumnolarĝeco
E1 popola Ĉinio	50 signoj en dukolumnaj paĝoj 33 signoj en trikolumnaj paĝoj
Esperanto	52 signoj
MONATO	39 signoj
Heroldo de Esperanto	34 signoj

Por tiuj ekzercoj, la tekstoj apartenas al tiuj revuoj. Sekve se vi laciĝas de tiuj tekstoj sufiĉas al vi elekti novajn tekstojn el tiuj revuoj kaj pretigi similajn ekzercojn.

Viaj okuloj devas al kutimiĝi al la legado de tiuj tekstoj per du rapidaj haltoj en ĉiu linio de la kolumnoj.

Atentu, viaj fingroj, viaj lipoj, via kapo tute ne devas moviĝi dum tiuj ekzercoj. Vi ne devas aŭdigi vian voĉon.

Vi devas pli kaj pli rapide legi ilin por ne lasi al vi la tempon por artikulacii aŭ por subartikulacii.

La unua teksto en kiu la legkampo enhavas nur 13 signojn proksimume trovi ĝas en la ekzercoj por rapidigi la okulmovojn.

Por ĉiu ekzerco, la komencaj linioj estas disigitaj por ke vi al kutimiĝu al du okulmovoj en ĉiu linio kaj poste la fino de la teksto troviĝas laŭ la normala aspekto de la revuo.

Por la sekvanta teksto, via legkampo devas kapabli enteni 16 signojn proksimume.

Tiu teksto aperis en El popola Ĉinio 12/1985

Rakonto pri serpentvino (p67)

Tio okazis
urbeto de suda
toj da jaroj:

Iutage, multaj
la drinkejon.
piĝis la vino.
dis kelneron Li
vinon.

Malfermiĝis
ekkriis kaj tuj
kriegis: "Helpu!

En la tenejo
longa serpento.

ton ĉirkaŭ la trabo, etendis la kapon al vinvazo kaj trinkis la vinon. Aŭdinte la kriadon de Li Bo, oni tuj alkuris. Sed neniu kuraĝis eniri, vidante la serpenton. Post momento la serpento ebriliĝis kaj falis en la vazon. Li Bo rapide kovris la vazon kaj metis grandan ŝtonon sur la kovrilon. Poste, ĉiufoje, kiam Li prenis vinon, li staris ĉe la vazo por aŭdi, ĉu sono venas el ĝi aŭ ne.

Pasis du jaroj. El ĝi aŭdiĝis neniom da sono. Li pensis, ke la serpento certe mortis kaj estas neniom timinda. Li aliris al la vazo, demetis la kovrilon kaj trovis, ke la serpento vere mortis kaj la vino fariĝis ruĝa kiel sango.

En la urbeto estis kanajlo Liŭ, kiu ofte venis al la drinkejo. Li lame iradis. Kiam ventis aŭ pluvigis, la talio kaj kruroj doloris al li tiel forte, ke li devis kuŝi en lito. Li neniam pagis por vino. Se la kelnero ne donis vinon al Liŭ, li do estis batata de la lasta; se la kelnero donis vinon al Liŭ, li do estis insultata de la mastro. Iutage Liŭ refoje venis trinki vinon. Ĉe tiu momento la kelnero

en iu drinkejo de
Ĉinio antaŭ cen-

klientoj venis en
Post nelonge elĉer-
La mastro do sen-
Bo al tenejo preni

la pordo. Hu! li
kuris returne. Li
Helpu!"

estis ĉ. 7 metrojn
Ĝi volvis la vos-

ekpensis pri la
do elprenis
proponis ĝin
mandis: "Kia
mi neniam ĝin
dis: "Ĝi estas
kiun oni ne
loko." Trans-
Liŭ ĝin flaris,
doras!" Liŭ el-
tiro. Li ankoraŭ
men, liaj vortoj
ĝis, kiam li falis
sante, ke Liŭ

Li Bo tuj trenis lin en sian ĉambron kaj intencis trakti la aferon en la nokto.

Nokte, enirinte la ĉambron, Li Bo eklumigis la lampon kaj vidis, ke Liŭ sin turnis supren kaj sidiĝis kun vortoj en la buŝo: "Bona vino, bonega!" Sekve li stariĝis kaj eliris el la ĉambro. Li iris facile kaj ne lame. Post du tagoj, sub pluvado Liŭ refoje venis kaj petis la vinon. Li Bo demandis al li: "Vi ne povas iri en pluva tago, kial vi povas atingi ĉi tien?" Liŭ respondis: "Trinkinte vian vinon, mi sentas min multe pli bone kaj ne doloras al mi la talio kaj kruroj dum pluva tago. Donu al mi ankoraŭ iom da vino." Li Bo donis al li duonbovlon da vino. Trinkinte li ankoraŭ petis. Sed la kelnero ne volis plu doni al li kaj diris: "Elĉerpate jam." Vidante lin eliri, Li Bo pensis en si, ke kredeble tia vino povas kuraci malsanon.

De tiam la serpentvino estas uzata kiel ĉina medicinaĵo kaj servas al malsanuloj.

Kiel kreiĝis segilo

Legendo diras, kreita de antikva Ban.

Foje, Lu Ban ligno por kons do sendis sian arbojn sur monto. koraŭ ne troviĝis kilo oni hakis nur en unu tago. Lu ĝis pro tio kaj monto por rigardi

La monto estis Ban devis grimpi post paŝo, kaptante

bojn. Subite lia fingro estis vundita de herbeto kaj sangis. Kial tiel akra estas la herbeto? Atente rigardinte, Lu Ban trovis, ke la rando de la herbofolio havas dentetojn. Per fingro li tuŝis la dentetojn, kaj la fingro estis vundita. Li pensis, ĉu ne estos multe pli bone, se oni faros el fero ilon kun dentetoj imite al la herbofolio kaj segos arbon per ĝi. Tuj reveninte hejmen, li faris unu tian ilon kaj kunportis la ilon al la monto por ĝin provi. Ĝi vere estis pli akra kaj pli efika ol hakilo. De tiam oni komencis uzi segilon.

ke segilo estas ĉarpentisto Lu Ban.

bezonis multe da trui palacon. Li lernoknabon haki Tiutempe ansegilo. Per haketke da arboj Ban maltrankvillipersono iris al la la aferon.

kruta, tial Lu supren paŝon arbojn kaj her-

Ghang Heng nombris stelojn

Nokte, la ĉielo steloj similaj al inkrustitaj sur knabo sidis ĉe la kapo, montris al bria stelojn en cent

Kun rideto la malsaĝa, vi de lojn. La steloj brilantaj kaj okul povas klare ilin

"Avino, se mi povas ilin nombri. tamen ne senorde. ĉi tiu kaj tiu steloj sama distanco,"

estis plena de sennombraj perloj telero. En korto avino, kun levita la ĉielo kaj nom- ĝi: unu, du, . . . ducent . . .

avino diris: "Mia nove nombras estas multemultaj, blindigaj. Ĉu vi nombri?"

vidas ilin, mi do Ili ja moviĝas, Rigardu, inter ĉiam restas la diris la knabo.

"Mia nepo, vi rigardis atente. La steloj moviĝas en la ĉielo, tamen la distancoj inter ili estas senŝanĝaj. Niaj prapatroj dividis ilin en grupojn kaj donis al ili nomojn," diris la avo. Montrante al la norda ĉielo, li daŭrigis: "Vidu, tiuj sep steloj interlige similas al ĉerpilo kaj nomiĝas la Granda Ĉerpilo (Granda Ursino). Ne malproksime de ili estas la Polusa Stelo, ĉirkaŭ kiu ĉiam rondiras la sep steloj."

Tion aŭdinte, la knabo malmulte dormis dum la tuta nokto kaj kelkfoje leviĝis por observi stelojn. Post sia observado li rimarkis, ke la sep steloj malrapide rondiras ĉirkaŭ la Polusa Stelo.

La knabo estis Gang Heng (78-139 p.K.). Li vivis en Han-dinastio. Kiel plenkreskulo li diligente studis pri astronomio kaj fariĝis fama astronomo. Li inventis la tertreman kaj ĉielkorpan aparatojn. Estis li, kiu la unua ĝuste klarigis la kaŭzon de luna eklipso. Laŭ lia opinio, tio okazas, pro tio ke la luno eniras en la ombron de la tero.

Moroj de Ĉinoj en manĝado

La ĉefaj ĝenerale estas laboritaj per la pasinteco Ĉinio portis Oni kutimas manĝaĵojn en

Ekz., unu el de la nordanoj prilaboritaj el fadenformajn kuirado oni al sajn spicaĵojn. tas malsamaj, kaĵo, orefungo taj kun amela fritita sojfaba sezama misoo, aŭ bovaĵo, kaj caĵo kaj graso.

laboroj oni ricevas malsamajn vermiĉelojn, kiaj maŝinfaritaj, tranĉitaj, tiritaj k. a. Pro sia facila farado kaj manĝado, ili estas unu el la ĉefaj manĝaĵoj de ĉinoj.

La ĉinoj ŝatas vermiĉelojn ne nur pro ilia moleco kaj facila digestiteco, sed ankaŭ pro ilia specifa senco en malsamaj kazoj. Laŭ la tradicia moro, la ĉinoj senescepte manĝas vermiĉelojn en la naskiĝtago, kiel la okcidentanoj manĝas torton en tia tago. Vermičeloj estas maldikaj kaj longaj, kio simbolas longvivecon. Tial vermiĉeloj por celebri la naskiĝtagon estas admirindaj pro sia longeco. Tio postulas kaj lertan faradon kaj moderan kuiradon, alie vermiĉeloj rompiĝas, kion oni rigardas malbonaŭgura.

manĝaĵoj de la ĉinoj faruno kaj rizo apartaj metodoj. En multaj manĝaĵoj de specifan sencon. preni malsamajn malsamaj kazoj.

la ĉefaj manĝaĵoj estas vermiĉeloj tritika faruno en pastaĵojn. Post donas al ili diversaj La vermiĉeloj es- kiaj tiuj kun por- kaj ovaĵo miksi- saŭco, tiuj kun misoo, tiuj kun tiuj kun porkaĵo tiuj kun nur spicaĵo Per malsamaj pri-

Estas alia ĝjaŭzi-o. Por unue rulpremas pastetojn en pla- cojn, metas sur faldas la pecon firme kunpre Generale, oni en bolanta ak fritas ilin en ĝenerale estas taj kaj spicitaj kaj eĉ marpro aŭ nur el legomo. Bon- vas esti ma- da farĉo, mal- larĝa rando.

la randon per figuroj de papilio, orfiŝo k.a.

faruna manĝaĵo prepari ilin oni la tranĉitajn tajn rondajn pe- ĉiu peco farĉon, kun farĉo ene kaj mas la randon. kuiras ĝjaŭzi-ojn vo, vaporumas aŭ kuirpoto. La farĉo preparita el haketi- viando kaj legomo, duktaĵo kaj ovaĵo. haketita kaj spicita kvalitaj ĝjaŭzi-oj de- lgrandaj, kun multe dika peco kaj mal- lufoje oni borderas

Laŭ la tradicia moro de la nor- danoj, ĝjaŭzi-oj servas kiel la plej grava manĝaĵo en festaj tagoj. Precipe en la Printempa Festo, oni senescepte devas manĝi ĝjaŭzi-ojn. Por tio ĉiuj familianoj kune sidas ĉe la tablo, iuj rulpre- mas la tranĉitajn pastetojn, aliaj faldas la pecojn kun farĉo kaj fir- me kunpremas la randon, triaj kuiras ilin. En la tuta familio regas ĝojo kaj plena harmonio. Sed la maljunuloj ne kontentas pri tio, sed turnas pli da atento al iliaj formo kaj farĉo. Ĝjaŭzi- ojn por la Printempa Festo ĝene- rale portas ŝu-formon, kiu similas arĝentan ingoton kaj simbolas ri- ĉiĝon. Oni iam enmetas moneron en ĝjaŭzi-on. Kiu manĝas tiun ĝjaŭzi-on, estos feliĉa en la tuj venonta jaro.

Por la sekvanta teksto, via legkampo devas kapabli enteni 20 signojn proksimume. Tiu teksto aperis en Monato 12/1985

Chu vi volas iĝi UN-volontulo ?

Ĉu vi volas iĝi UN-volontulo?

Por granda parto publiko, UN havas funkcion disponigi al prezentantoj tribunon, doni sin al la ĝojoj de parolado. Fakte, UN multe pli ol tio, sed sajn agadojn la ĵurnaloj agadas. Ŝajnas, ke la laboro ne povas sukcese konkuri, en la amaskomunikado, kun la brilaj kaj bruaj forumoj. La UN-volontuloj, ekzemple, meritis seriozan agnoskon al ili preskaŭ neniam donatan.

Kiuj estas la UN-volontuloj?

Ili estas viroj kaj virinoj, grandparte junaj, el ĉiaj kulturaj, lingvaj kaj religiaj aŭ ideologiaj medioj, kiuj portempe dediĉas sin al agado utila al nefavorita lando. Multaj trejniĝis en teknika lernejo, multaj aliaj akiris universitan diplomon. Ĉiuj havas almenaŭ du jarojn da sperto profesia, sed la plimulto praktikis sian metion dum tri ĝis kvin jaroj antaŭ ol meti sian kompetentecon je la servo de la internacia komunumo.

Kio plej karakterizas ilin, tio estas, ke ili rigardas sian dungigon ne posteno, sed servo. Ili scias dekomence, ke ne temos pri kariero: la kontrakto ne superas du jarojn. Krome, ili enspezas ne salajron konforman al la profesia nivelo, sed vivtenan pagon ĝuste sufiĉan por la normalaj bezonoj de ĉiutaga vivo. Ili do devas adaptiĝi al cirkonstancoj ofte malfacilaj kaj kapabli superi la frustrajn, kiujn implicas simila eksternorma laborado.

Oni ne povas fariĝi UN-volontulo, se oni aĝas malpli ol 21 jarojn, sed ne ekzistas maksimuma aĝo. Fakte, 87% havas aĝon inter 25 kaj 44 jaroj, dum 8% estas inter 21- kaj 25-jaraj.

La suma nombro estas proksimume viĝas fakuloj pri librotenistoj, kura laboratoriaj tekni akuŝistinoj, animan po, ktp. Ili devenas originas el evolu multaj ankaŭ el lan nombro de UN-vo gulas la nombron

lando: kvankam Belgio kaj Francio estas, loĝantare, tre malsimilaj landoj, ili havas similan nombron da UN-volontuloj. Belgio havas 23, Francio 26.

82% el la UN-volontuloj venas el evolulandoj. Tio tradukas la deziron, unuflanke, vastigi teknikan kunlaboron inter landoj neindustriaj kaj, aliflanke, ekspluati la avantaĝojn, kiujn prezentas homoj, kies origina medio socia, kultura, religia multilate similas tiun de la volontula laborloko.

Kion ili faras?

Ili laboras en centoj da evolulandoj, ĉefe en la plej malriĉaj. 43% (479) plenumas sian agadon en unu el la 40 afrikaj landoj, kie UN taksas helpon nepre necesa. La plej ampleksa programo disvolviĝas en Somalio: tie laboras sesdeko da UN-volontuloj.

Pro la suferoj kaŭzigitaj de la seka vetero, kiu terure batis la Sahel-regionon de Afriko, UN tie lokis centon da volontuloj, kiuj partoprenas en la efektivigo de urĝa programo celanta helpi la tuŝitajn landojn restarigi vivon elporteblan. La volontuloj prizorgas ekzemple la transporton kaj disdonon de nutraĵoj, la bazan sanecan traktadon, la havigon de sana akvo, la protekton de arboj kaj la batalon kontraŭ dezertiĝo, same kiel la sanservojn al kameloj, azenoj, kaproj kaj aliaj bestoj, kies plua ekzisto montriĝis nepre kondiĉo por taŭga homa vivo tie.

de volontuloj nun 1200. Inter ili tro- arbaroj, agronomoj, cistoj, ekonomiistoj, kistoj, meĥanikistoj, toj de junulaj gru- el 90 ŝtatoj. Multaj landoj, sed sufiĉe doj industriigitaj. La lontuloj tute ne spe- de loĝantoj en ilia

Servoj por nacia

La volontuloj el evociale bonvenaj en kiun enhavas la gramon. Tiu subdivido pri helpo al la t.n. disvolvo. La volontuloj agas por stimuli, memhelpon je la diĉoj por aliĝi al tiu servo estas: aĝi kaj havi ateston pri

lernejo. Al la interesatoj la programo proponas vojaĝon al la helpota lando kaj returne, monatan pagon situantan inter 80 kaj 150 usonaj dolaroj (tiu salajro similas al tiu de la samniveluloj en la koncerna lando), instaliĝan krompagon (50 dolarojn) kaj reinstaliĝan kompenson, fiksitan je 240 dolaroj, kiun la volontulo ricevas, kiam finiĝas lia kontrakto.

Fakte, kvankam por eniri tiun fakon de la volontula servo, ne estas postulata pli ol mezgrada instruiĝo, pli ol duono el ties anoj havas universitatan diplomon kaj plurjaran sperton en laboroj kiel produkti nutraĵojn, prizorgi kamparan higienon, ekspluati la latentajn akvodisponejojn, plenumi la taskojn de flegisto aŭ de baza san-helpanto, instrui skribadon kaj legadon, organizi laborojn mon-enspezigajn, k.s. La agado en la servoj por nacia disvolvo estas alte taksata, ĉar ĝi atakas la problemojn plej konkrete je la nivelo, kie ili stanĝas: en la vilaĝoj.

disvolvo

lulandoj estas spe-
aparta subdivido,
UN-volontula pro-
okupiĝas specife
servoj por nacia dis-
laborantaj tiukadre
starigi kaj organizi
nivelo vilaĝa. La kon-
fako de la volontula
minimume 21 jarojn
fino de mezgrada

Kiai ne provi

Kompreneble, se
tan vivon, oni ne
volontula servo.
malpli la samajn
noj. En tio kuŝas
de la programo:
kvalifikon, kiu raj
lajron normalan
sed rezignas je ĝi
blojn je la servo
vivante kiel tiuloka
interesatoj pretas

UN gravan problemon, ĉar antaŭe tro ofte okazis, ke altranga fakulo, alte salajrata, devis okupiĝi pri taskoj ege malsuperaj al sia profesia nivelo.

Indiferente al kiu fako de la volontula programo la kandidato apartenas, li faras al la komuna bono de la mondo grandan servon, pri kiu estas bedaŭrinde, ke la amaskomunikiloj tiagrade silentas. Eble la evoluigo de ekonomie nesufiĉe disvolvigitaj landoj profitus pli de la multigo de similaj agadoj, modestaj, sed rekte kaj konkrete helpantaj, ol de tiu simpla mondo, kiu aperas al multaj kiel la sola maniero kontribui al la ekonomia kaj socia mondprogreso.

Se leganto kun taŭgaj kvalifikoj deziras kandidatiĝi al la UN-volontula servo, li povas skribi al „*Volontuloj de UN*“, *Palaco de Nacioj, CH-1211 Ĝenevo 10, Svislando*. Kompreneble ne ĉiu kandidato estas akceptata. Dungiĝo dependas, koncerne la kandidaton, de ties kvalifikoj, koncerne UN, de la mono disponebla en la speciala fonduso kreita tiucele, kaj, koncerne la helpotan landon, de ties specifaj bezonoj. Krome, akceptita kandidato kelkfoje devas atendi ses monatojn aŭ eĉ pli antaŭ ol ekvojaĝi al sia laborloko. Sed homo, kiu volas vivi interesajn travivaĵojn laborante serve al la monda komunumo, havas la eblecon mensriĉiĝi per neordinara kontakto kun homaj realaĵoj kaj akiri spertojn spirite kaj psikologie maturigajn, proponante sin al la UN-volontula servo.

cp

Kristnaska bano

En Skandinavio, kaj Svedio, estas kutimo bani en „basto” aŭ „saŭno” hodiaŭ alte taksata. Ke la finnlandaj sol milito en la 1940-jar tan punktan malvar supozeble dependis saŭnaj banoj.

Decembro estis milda to, sed kelkajn tagojn venis iom da neĝo.

kvankam la vintra sunstadio ĵus estis pasinta. Ĉu estos vera Kristnasko kun neĝo-kovritaj branĉoj kaj blanka kovrilo sur la vastejoj?

En la kristnaska antaŭvespero suno brilis. Estus agrable havi kristnasko-banon. Apud la lago staras eta banejo hejtigebla per ligno. Ĝi donas al mi du horojn da distraĵo ĉiusemajne. Ĉi tiun tagon mi balais kaj ordigis la ĉambreton, dum la kameno varmigis ĝin. Por moligi la banviparon, mi iris en la lagon por plenigi sitelon per akvo. Ne estis precipe malvarme promeni en la akvo. Strange! Estis ja tamen kristnaska tempo, sed agrable, se oni volas bani. La viparoj estis metitaj en la sitelon, kaj mi senvestigis min. Estas agrable iom kuri, dum la banejo varmiĝas. Jen venis kurante vigla, fortika knabino.

– „Ĉu ni iom kuru en la sunbrilo sur la agrable sablostrando kaj poste faru banon?” mi demandis.

– „Jes, volonte,” ŝi respondis.

La suno brilis de sennuba ĉielo. La flavaj akvoherbaj kanoj ekhavis belan rebrilon kaj la lago kuŝis verdblua. Ni iom kuris, reen al la banejo – sed unue rekte en la lagon. Trempigo inter la ondoj – sed la akvo ne estis tre varma.

precipe en Finnlando de post jarcentoj ŝvitbano nomata . Ĝi estas ankoraŭ saniga banspeco. datoj dum la vintra deko eltenis la formon en la neĝo, de ilia hardiĝo per

kaj pluva mona-antaŭ Kristnasko La naturo lumiĝis,

Tre utilas, froti la var neĝo (supre), kaj ruliĝi en la malvarma eble afero absolute loĝantoj de varmaj mondo...

Rapida elakviĝo. La tris + 4 gradojn.

Nun en la varmejon. nun estas oportuna, agrable. Post kvar varmo la korpoj iĝas vipas unu la alian kelkaj folioj falas

mirinda odoro plenigas la ĉambreton.

Ni enspiras la bonan odoron, kuras en la lagon, faras kelkajn naĝmovojn, reiras sur la strandon, iom gimnastikas en la sunradioj. Kion pensas kelkaj migrantoj vidante nin kurante, banante kaj gimnastikante sen vestoj en tiu vintra vetero? Frenezuloj? Vigluloj? Naturamikoj?

Ree en la baneja varmo. Estas agrable rekti siajn korpojn sur la lignaj kuŝejoj por kelkaj minutoj. Ŝvitaj perloj aperas kaj tiam estas tempo meti kelkajn gutojn da biero sur la kamenan ŝtonujon. Kia mirinda odoro! Oni enspiras, fermas la okulojn, ĝuas! Poste sur la baneja verando, tie estas dolĉe sidi en la sunbrilo. La korpoj elvaporas. Kiom bela tamen estas la vivo! Denove trempigo en la lago. Jam la suno estas subironta ĉe la arbaj pintoj. La kristnaska bano de la jaro estas farita. Restas nur sin vesti kaj reiri hejmen. Sed kiom mirinda posttagmezo! Ĉu persono, kiu ne konas tiun tipon de bano, komprenas ke tia kristnaska bano estas la plej mirinda kristnaskodonaco? Lupo

megan korpon per estas tre agrable, neĝo (sube) – neimagebla por regionoj de l'

termometro mon-

La temperaturo + 80 gradoj. Vere ona horo en la brilaj pro ŝvito. Ni per la betulaj vipoj, sur la kamenon kaj

Por la sekvanta teksto, via legkampo devas kapabli enteni 22 signojn proksimume.

Tiu teksto aperis en la libro Elzasaj legendoj, tradukis Chralotte Pulvers (1924) Esperanto-Verlag Ellersiek Borel, Gmbh Berlin kaj Dresden

La parolanta kranio de mortinto

Viro jam estis malproksime en la tuta mondo, kaj tamen li ree formigris el sia hejmo.

Kaj ree li metis sian paketon sur siajn ŝultrojn, ekprenis la bastonon kaj gaje marŝadis sur la ŝoseo, kiam su bite kranio ruliĝis antaŭ li.

„Ho, kion vi deziras, amiko?“ la migranto ekkriis; „venu nur kaj tagmanĝu kun mi!“

„Mi estas nek malŝata, nek soifa“, estis la respondo, „sed morgaŭ estu mia gasto; kaj se vi ne venos, mi serĉos vin.“

„Eble jes, eble ne“, la juna viro murmuretis, paŝante tra longaj, mallumaj arkajoj, kiuj lin fine reen kondukis al bela, larĝa ŝoseo.

Apud la ŝoseo, sur arbeto, sidis du kornikoj furioze disputantaj unu kun la alia. Tio ŝajnis al li stranga, sed tio ne koncernis lin; kaj li daŭrigis sian migradon.

Li venis ankaŭ al rivereto; apud ĝi staris pastro, kiu ĉerpis akvon en kuvon, sed la akvo refluis en la rivereton, ĉar la kuvo ne havis plankon.

„Ne estas strange, diris, „ke vi tiom penas: senplanka!“

Via Pastra Moŝto“, li via kuvo ja estas

La pastro ne respondis. Li frapis la pordon, aŭ respondis. Kaj li fenestraj kovriloj, kaj elflugetis tra ĝi, tiel ke li rapide ĵete fermis la kovrilon.

La alia konstante fine li venis al domo. vokis, sed neniu venis malfermis unu el la ho! sennombraj birdoj ekterurigiĝis kaj

Denove li migris kaj migradis; kaj ree li ekvidis apud rivereto la kranion. Ree li kriis al ĝi: „Ĉu vi ankoraŭ ne sentas malsaton kaj soifon?“

„Mi estas nek malsata, nek soifa“, ĉi tiu reparolis, „sed vi nun devas veni kun mi en mian kastelon.“

La migranto ne kontraŭstaris kaj sekvis la kranion, kiu, montrante la vojon, ruliĝis antaŭ li.

Alveninte al la kastelo, ambaŭ supreniris la ŝtuparon, marŝis tra larĝaj, longaj koridoroj, tra vastegaj haloj kaj ĉambroj; ĉiuj estis plenaj de lumetoj.

La migranto ekmiris pri tio; sed la kranio klarigis al li la aferon: „Vidu, jen estas la vivlumetoj. Dum sia vivo la homo havas sian lumeton, kiu estas kandelo, kaj kiam li mortas, ĝi estingiĝas.“

„Montru al mi ankaŭ mian.“

La kranio montris al
estis forbrulinta ĝis nur
tio la migranto fariĝis tre

„Do rakontu al mi“,
forigi de li la melanko
survoje?“

„Unue mi ekvidis
kluj inter si disputis!“

„Estas du fratoj, kiuj
sur tero kaj tre ofte
juĝisto. Ili devas ankaŭ post sia morto disputi.
Kion vi krome vidis?“

„Mi vidis pastron, kiu ĉerpis akvon el la
rivereto en senplankan kuvon.“

„Tu estis pastro, kiu amis la mondajn posed-
aĵojn, neniam povis akiri sufiĉe da ili kaj ilin
pli kaj pli nur deziris havi. Nun li devas ĉerpi
kaj ĉerpadi akvon kaj tamen ne sufiĉe povas
ĉerpi, por plenigi sian kuvon. Sed kion vi
krome vidis?“

„Mi vidis ankaŭ domon, kies pordon mi
frapis, poste mi vokis, kaj ĉar neniu venis aŭ
respondis, mi tire malfermis fenestran kovrilon;
subite tra ĝi elflugis sennombraj birdoj en la
vastan aeron.“

„Kiom estis da ili?“

„Ho, kelkaj miloj, mi supozas.“

„Kiom da ili elflugis, tiom da bedaŭrindaj
animoj estas liberaj.“

Ĉi ĉio strange tratremis la cerbon de la
migranto, kaj li fikse rigardis el vitrecaj okuloj
antaŭ sin.

„Do diru al mi“, lin
kranio, „kiom da tempo
via kalkulo?“

alparolis denove la
vi nun vojaĝas laŭ

„Nu — la tutan tagon.“

„La tutan tagon! Ho
migras jam de tricent
tien, de kie vi venis!“

ne! Ĉar sciu, ke vi
jaroj! Kaj nun reiru

Kaj la migranto eliris el la kastelo. Li
unue venis al la domo kun la fermitaj
fenestraj kovriloj; el ili unu li malfermis, sed
birdoj ne plu elflugis. Apud la rivereto ne
plu staris la pastro, kiu ĉerpis akvon en mal-
plenan, senplankan kuvon, kaj sur la arbeto
apud la ŝoseo ankaŭ ne plu disputis la kornikoj.

Daŭrigante sian migradon, li fine venis en
sian vilaĝon kaj staris antaŭ sia patra domo.
Li sonorigis, kaj iu al li fremda sin montris
apud la fenestro. „Al kiu vi volas iri, amiko?“,
oni lin demandis.

„Nu, en la domon — en mian domon!“
li respondis. Kiam la homoj malfermis la
pordon kaj ekvidis la fremdan viron en tute
antikvaj, difektitaj vestaĵoj, kovritaj de polvo,
ili ekbalancis la kapon, kaj eĉ pli ankoraŭ,
kiam li diris sian nomon tute nekonatan en
la tuta vilaĝo.

La homoj kompatis la strangan fremdulon,
lin kondukis al la urba domo, kaj tie ili
rigardis en la malnovajn komunumaĵajn librojn.
Kaj efektive, antaŭ tricent jaroj ekzistis gento
kun lia nomo, sed ĝi de post tiu tempo tute
estis formortinta!

Ili iris kun la fremdulo en la preĝejon kaj
igis legi por li la sanktan meson. Dume
oni vidis blankan kolombon fluganta ĉirkaŭ
la altaro. Sed la fremdulo genuileksis rigide,
senmove, kaj kiam oni lin ekskuis, li disiĝis en
polvon kaj cindron. Oni supozas, ke la
blanka kolombo estis lia animo forfluganta.

La monaĥino en S-ta Klara

La monaĥino

En la monaĥinejo
vivis monaĥino, kiu
viron. Estis ja ankaŭ
lin aŭ paroli kun li.

Sed ŝia sopira
kunesto kun ŝia karulo.

La geamantoj prizor
monaĥino el la instituto.

La juna viro sciis,
antaŭ la monaĥinejo
sekrete sciigis al ŝia
sur la muro je tiu horo kaj malsuprengliti per
ŝnuro kaj forkuri kun li.

Oĵe kaj kun batanta koro ŝi ŝteliris el la
ĉelo laŭlonge de la muro. Malsupre paŝis ire
kaj revene la gardostaranto; meditema li estis.
Sed ĉar ĉi tiu ne faris la priparolitan signon,
ŝi tiom laŭte tuis, ke la gardostaranto ekri-
gardis kaj ekvidis la blanke vestitan figuron.

Li supozis ekvidi fantomon kaj laŭ la
ordono ŝin alvokis. Sed la monaĥino opinis,
ke li vokis alian personon, kaj ŝi ne respondis.

Dua alvoko ankaŭ ne sukcesis.

Fine, post la tria alvoko, la gardostaranto
ekprenis sian pafilon kaj celis al la blankullino.

Laŭta, timplena, dolora ekkrio eksonis, kaj
mortpafita la monaĥino falis de l' muro.

Ŝia amanto ĉi tiun fojon hazarde ne devis
gardostari, estis alia gardostaranto.

Longan tempon post tio la monaĥina figuro
migradis ĉirkaŭ la monaĥinejo, sopire atend-
ante sian karulon.

en S-ta Klara

S-ta Klara en Strassburg
multege amis junan
multaj okazoj, por vidi

deziro estis la ĉiama

gis la forkuron de la

ke li devis gardostari
je fiksa horo kaj tion
karullno. Ŝi devis esti

Por la sekvanta teksto, via legkampo devas kapabli enteni 26 signojn proksimume.

Tiu teksto aperis en ESPERANTO 12/85.

Por informi trafe, iom da psikologio

Vortoj agas. Tiu principo, mistoj kaj propagandistoj, komprenata de la esperantgvo. Ni ripete diskonigas ne sufiĉe atentis la nuancojn, de la celata publiko.

Vortoj ja ne nur priskrib kaj ĉefe – elvokas. La elvo konsciataj. Ili estas kvazaŭ interprektiĝas fone de la menso, tiel kreante etoson, kiu siavice naskos bildaron kun firmigo kaj evoluigo de la etoso.

Tiu mensa fono tre gravas, ĉar el ĝi fontas la sintenoj. Fakte, la mensa etoso ludas pli gravan rolon en decidoj ol racia rezonado. Tial, i.a., kiel ajn pura la intenco, kiom ajn pravaj la argumentoj, la racia prezentado de Esperanto ree kaj ree fiaskas.

La koncepto "plani"

Komplikas la problemon ĵoj diferencas laŭ la kulturo, teno. Mi ne scias, ĉu la es por germanoj. Eble jes. latinida lingvo, kaj eble

homoj nutritaj de latinida kulturo, la asocio de planado kaj de lingvo elvokas ion sakrilegian. Ĝi produktas sentojn pri io burokrata, nehoma, kontraŭa al ĉiaj spontaneco kaj poezio. Ĝi pensigas al la rigideco de skemo en kampo, kie homoj sopiras al vivo disfioranta. La esprimo *konstruita lingvo*, kiun kelkaj uza, ne efikas pli bone. En franclingvujo, laŭ miaj esploroj pri la psikologia efiko de vortoj, la dirmaniero, kiu montriĝas plej taŭga por eviti forpuŝan sintenon, estas *konvencia lingvo*.

bone konata de rekla- ankoraŭ ne estas sufiĉe istoj informantaj pri la lin- Esperanton mistrafe, ĉar ni kiuj difinas la sintenon

as aŭ sciigas; ili ankaŭ – kajoj ofte ne estas klare songaj bildoj, kiuj inter-

la fakto, ke tiuj elvoka- la popolo, la socia apar- primo *planlingvo* estas trafa Sed ĝi fuŝ-agas ĉe homoj kun ankaŭ ĉe anglalingvanoj. Ĉe

La koncepto "krei"

Nun kiam la Centjara Jubileo de Esperanto proksimiĝas, oni multe parolas pri lingvo "kreita en 1887". Ree esprimo samtempe nevera kaj psikologie mistrafa.

Nevera, ĉar Esperanto estas multe pli ol la lingvaĵo de 1887. Ĝi naskiĝis sufiĉe longe antaŭ tiu fama dato. Dokumente pruveblas, ke jam en 1878 la lingvo ekzistis, sub alia formo, jes ja, sed kun ne pli da diferenco, rilate al la nuna aspekto, ol la malnovaj franca, angla, rusa rilate al la nuntempaj. Estas la sama lingvo – kun sama identeco – eĉ se nesimila – kun mal-sama aspekto. Ne ekzistas rompo inter tiu stato de la lingvo kaj tiu de 1887, same kiel ne okazis rompo inter la lingvo de 1887 kaj la hodiaŭa.

Plie, se vi diras: "Zamenhof kreis (inventis, elpensis) Esperanton", vi misprezentas la historian veron, ĉar ne vivus la lingvo, se nur Zamenhof ekzistus. Sufiĉas preni numeron de *Esperanto* kaj analizi, kiom el ĝia lingvaĵo estas zamenhofa, por tuj vidi, kiom la lingvo ŝuldas al aliuloj. Zamenhof mem ĉiam rifuzis, ke oni nomu lin kreinto. Kiel li mem petis, oni diru, ke li *iniciatis* la lingvon. Tiu estis kunkreita de li kaj de multegaj uzantoj, jen famaj (verkistoj, gramatikistoj), jen simple anonimuloj.

La rilatoj inter Zamenhof kaj la kolektivo, kiu akceptis lian proponon kaj tiel estigis vivantan lingvon, similas al la rilatoj inter homo plantinta glanon kaj la grundo, kie kreskas la kverko. Preskaŭ ĉiuj karakterizoj de la arbo venas de la glano, kiel preskaŭ ĉiuj trajtoj de Esperanto originas el Zamenhof, sed sen la grundo kaj la cirkonstancoj (pluvo, suno, apuda ĉirkaŭaĵo), la kverko ne estus tia, kia ĝi estas. Same pri la Internacia Lingvo. Ĝi estas, kio ĝi estas, ne nur pro Zamenhof, sed pro la esperantistaro kaj pro diversaj historiaj aŭ aliaj cirkonstancoj, kiuj evoluigis ĝin en tiu direkto kaj ne en iu alia.

Psikologie mistrifas paroli pri kreado fare de Zamenhof, ĉar lingvo estas sentata de la plimulto kiel vivanta estaĵo. Diri: "Lingvo ne estas biologia afero, sed socia" sukcesas nur vekti en la aliulo senton esti nekomprenata, ofte eĉ forjetata kaj lokita en mal-supera pozicio. Kvazaŭ vi sciis pri lingvoj, kaj li ne. Ni tiel malhelpas la komunikon kaj ŝokas senton naturan. Kial natura? Ĉar lingvo havas efektive multon komunan kun vivajo: ĝi devenas de io praa, ĝi en komenca stadio montriĝas mankhava kaj mallerta, poste ĝi kreskas, maturiĝas, disfloras, ĝi mem reagis al cirkonstancoj, nature adaptiĝante, kaj ĝi konstante ŝanĝiĝas, tamen restante si mem. Komparu kun aŭto, skribmaŝino aŭ muzikdisko, kaj vi preceptos, kiom lingvo pli similas al io vivanta ol al aĵo.

Dirante: "Esperanto estis kreita de Zamenhof en 1887", ni donas la impreson, ke li fabrikis en kelkaj semajnoj viv-imitan, sed fakte senvivan, roboton. Tiu frazo ja implicas, ke unu homo ĉion decidis, plej arbitre. Kontraŭ tia ideo nia kunparolanto, pro sana pri-lingva instinkto, spontane ribelos. Nia vortigo elvokas estaĵon, kiu devus vivi, sed havas nur patron, ne patrinon. Tio estas grava, ĉar profunde en nia psiko nia lingvo estas asociita al rilato kun patrino. En la plimulto el la lingvoj oni diras ne *gepatra* lingvo, sed *patrina*. Lingvo kreita de viro, aginta sola en sia kabineto, povas esti nur monstro. Monstro forpuŝas. Tial multaj homoj, ne volante rigardi, kiel Esperanto prezentigis praktike – ni komprenu ilin: monstro ne estas alloga – jam principe ĝin forjetas.

Kion oni do diru? Ekzemple: "Esperanto estiĝis jene. En plej diversaj landoj ekzistis homoj, kiuj sopiris al komunikilo ebliganta al malsamlingvanoj interkompreniĝi. Juna poligloto proponis lingvaĵon, kiun li verkis dum jaroj, komponante poemojn kaj tradukante ĉefverkojn el diversaj literaturoj. La unuaj alprenis la komunikilon proponitan de la dua, kaj la uzado estigis vivantan lingvon, kiun oni nun nomas Esperanto". 1887 estas nur la dato de la publikigo de la propono. Oni ne prezentu ĝin kiel daton de lingvo-estigo.

La koncepto "universala"

Tria ekzemplo estas la nas elvokan signifon de ĉion, kio ĉion invadas, ĉion fone de la menso bildon de submeti al si la tutan montrudos al ĉiuj. Tia vortogvo ne plu povos ekzisti universala, oni ne plu Kial estus malsame pri

roboto ĉi-supre menciita montriĝas ne nur nehoma, sed ankaŭ ĉi forigi ĉion, kio ne estas ĝi. Kiel en sciencfikcia verko, la veraj vivantoj malaperos, cedante la tutan lokon al universalvora malnaturajo.

Samspecan timon povas vekti sloganoj kiel "la lingvo por ĉiuj". Estas psikologie nature reagi al ili, pensante: "Ne por mi, mi volas resti libera".

La vorto *internacia* – kiun uzis Zamenhof – elvokas tute alian etoson. Ĝi emfazas, ke temas pri lingvo uzenda *inter* popoloj, nacioj, homoj. Ĝi estas peranto, servanto. Ne inkluzivante la koncepton de tuteco, ĝi lasas al ĉiu unuopulo la eblecon memstare elekti. Ĝi dissendas la mesaĝon: "Esperanto estas lingvo por tiuj, kiuj deziras ĝin; se vi ne interesiĝas pri ĝi, ĝi ne volas trudi sin al vi". Tial ĝi ne kaŭzas defendreflekson.

Ni konsciigu pri la elvoka

Ofte uzataj de esprepritraktitaj efikis kontraŭ malfavorajn reagojn. Ni antan komunumon. Lingvo – kaj speciale lingvo ekstera, kiel Esperanto – estas tiel kompleksa fenomeno, ke preteratenti la nuancojn en ĝia priskribo aŭ prezento estas tute nature.

Krome, la kaŭzo de la reago ne estas nur nia, ĝi ofte kuŝas ankaŭ en timo ĉe la celata publiko. Multfoje, dum ni diras "internacia", niaj aŭskultantoj aŭdas "universala" kaj ili reagas, ne al nia diro, sed al sia (mis)kompreno.

Tamen nun, kiam ni intencas uzi la okazon de centjareco por vaste informi, ni ne forgesu, ke la efiko de niaj vortoj gravas, kaj ke ĝi ne obeas la leĝojn de racio. Aŭ, eble, ĝi obeas la leĝojn de racio pli subtila, ol tiu, pri kiu oni unuavide pensas. Estas ja fakto, ke Esperanto estas pli vivanta kaj spontana ol la simpla plenumo de plano; ke ĝi estas peranto, ne imperiisto celanta sufoki la tutan mondon sub si; ke ĝi ne estis kreita de unu homo en 1887, sed rezultas el longa procezo, en kiu arto kaj sentoj rolis same grave kiel plananta racio.

Kion ni festos, tio estas la publikigo de projekto. Tiu projekto havis kaj havas neimageble riĉajn latentajojn, sed por ke la kaŝita riĉo manifestiĝu – t.e. por ke Esperanto estiĝu – necesis io pli ol la homo, kiu prave postulis, ke oni lin nomu nur *iniciatinto*. Pri tio la publiko nepre devas scii.

efiko de vortoj

rantistoj, la tri esprimoj ĵus -intence, estigante multajn ne kulpigu pri tio la Esper-

vorto *universala*. Ĝi entenas "ĉio" aŭ "tuto". Ĝi elvokas volas ampleksi. Ĝi naskas konkeranto, kiu intencas don, aŭ de kodo, kiun oni vekas timon, ke la propra lingvo. Se la metra sistemo fariĝos uzos la malnovajn mezurojn. universala lingvo? La monstra

Claude Piron

Por la sekvanta teksto, via legkampo devas kapabli enteni 30 signojn proksimume.

Tiu teksto aperis en la libro *Leo Tolstoj* de Victor Lebrun, eldono Gabrielli.

LA KORESPONDADO

Someron de la jaro 1906, kiel majnojn ĉe Mario Smit, helpante kaj ofte vizitadis Jasnajan Pol dreidino demandis min, se mi en ŝian domon por transkribi *kajeron* de Tolstoj. (Gia nuna dek volumojn).

— La junecaj kajeroj de Leo koloriĝi. Krom tio je nuntempaj ĝere konservadi nur unu solan banta je tri ekzempleroj: unu por ni, la duan mi sendos Moskven en Muzeon. Oni rezervis tie por mi apartan ĉambregon. Ĝi estas proviziita de specialaj feraj kurtenoj por esti apartigata okaze de fajrego. Fine, la trian ekzempleron ni sendos Anglujen al Ĉertkov en lian « Stalan Cambron ».

Ĉu estus eble imagi ion pli allogan? Ekposedi eblecon tralegi la tutan intiman ĵurnalon de Leo Tolstoj!... Pri simila feliĉo mi ne kuraĝis eĉ revii. Jam sekvontan tagon mi transmigris en la grandan domon de la familio de la Majstro. Oni instaligis min malsupre en la ĉambregon de la filo Andreo, kiu estis for.

Tamen Tolstoj malakceptis laris, ke liaj ĉiutagĵurnaloj povas estas. Ke afero ĉi tiu estas tute legado ekpovus eĉ havi diboĉigan influon je tiom juna homo, kiel mi!...

Tiamaniere, anstataŭ transkribado de la « Ĵurnaloj », min trafis oficoj de persona sekretario. Tio donis al mi eblecon proksimege vidi kaj eĉ partopreni la intiman vivon de la Majstro. Kun grandega scivolemo kaj atento ekkomencis mi pristudadi Tolstojon. Ne tiel la famegan romaniston kaj kuraĝegan ribelulon. (Ilin oni bone vidas pere de la libroj), sed — la ĉiutagan hejman homon, la nelaciĝeblan skribiston kaj pli precipe — Tolstojon la pensulon.

Antaŭ ĉio ekmirigis min, ke vere pagitan sekretarion la mondfama verkisto havis neniam. Li konsideris sian laboron de verkisto tiel malgrava, tiel sensignifa, ke volonte akceptante tutokazan helpadon de amikoj, li neniam permesis al si dungi helpanton.

kutime, mi pasadis kelkajn se ŝin en ŝiaj kamaraj laboroj janan. Sed baldaŭ Sofio Anne konsentus rekte transloĝ la monumentegan *Ĉiutagan* eldono en Moskvo okupas tri

Nikolaido komencas jam sen cirkostancoj estas tro dan ekzempleron. Vi estos transkri

planon de sia edzino. Li dekbonege konserviĝadi kiel ili malgrava, kaj, krom tio, simila

Tamen la sola korespondado postulis sufiĉe da laboro. Okazadis tagoj, kiam alvenadis ĝis dekkvin leteroj. Meznombro, mi pensas, kvar aŭ kvin potage. Ĉiu letero ricevadis sian numeron kaj estis enskribita en speciala kajerego. Persone Tolstoj respondadis al tre malmultaj leteroj. Al iuj li petadis respondi familianojn aŭ amikojn. Sed la plej granda kvanto, post tralegado, estis simple zorge enŝrankigata en granda nigra ŝranko. Ĉiu korespondanto havis tie sian propran paketon ligitan per ŝnureto.

Tolstoj ĉiam mem atente tralegadis ĉiujn leterojn, surskribante sur koverto, kion oni devas respondi. La purajn blankajn foliojn li forŝiradis zorgeme. Sur ĉi tiuj pecetoj de papero li skribadis siajn leterojn. Tial la aŭtografoj de la granda verkisto aspektas tiel strange.

Ofte li ŝatis rediri: « Ĉi tio estas vere regulo: ju pli malbona estas papero kaj ortografio, ju pli malpura kaj sursalivita la koverto, des pli grava kaj serioza estas la enhavo ».

Multfoje, tenante belan maŝinskribitan folion li diris: « Ĉio, kio estas taŭga en ĉi klerula letero, estas ĉi tiu blanka paĝo ». Kaj li zorgeme forŝiradis ĝin.

Mi memoras, kiel la unuan tagon de mia ekfunkciado, respondinte laŭ la indikoj de l'Majstro al pluraj leteroj, mi apartigis ankoraŭ kvin, kiuj laŭ mia opinio, meritis respondon. Posttagmeze ekkaptinte oportunan minuteton, mi diris tion al Leo Nikolaido.

— Nu, kion do? Se tia estas via bonfavoro, ni respondu. — Kaj, ne elpreninte la kvin leterojn el koverto, por ĉiu li diris al mi, kion mi devas respondi. Mi estis vere mirigita. Li ankoraŭ memoris la enhavon! Samtempe li esprimis timeton, ke mi jam havas tro da laboro.

Efektive estis tiom da laboro, ke sufiĉus por tri homoj. Ĉi tiuj leteroj, alvenantaj de ĉiuj flankoj de l'mondo, lasis en mi profundan impreson. La plej multo estis de tre intima enhavo. Al la koro de amata aŭtoro elfunde malfermadis la animoj. Ili petadis lian opinion aŭ lian konsilon. Estis ĉi tie teruraj vivokazoj, plenaj de tragedieco, aŭ senliraj duboj, el kiuj, kiel ŝajnis al la skribanto, nur la potenca menso de Tolstoj povus trovi eliron. Aŭ teorie religiaj kaj moralaj duboj kaj kontraŭaĵoj. Aŭ hezitado de junulo aŭ knabino antaŭ la mensogoj, per kiuj oni serĉas droni ilin sub la nomo de ĝenerala klerigo. Aŭ leteroj de diversaj sektanoj, per kiuj svarmis Ruslando, malgraŭ sovaĝa kruelega persekutado de la estraro. Alvenadis ankaŭ leteroj sekrete elportitaj el malliberejoj.

Ekzistis ankoraŭ aparta morale rifuzantaj devigan milit sindonemaj al la homaro, prefe ol ofici ĉe la armeo de la caro.

Ili pravigadis sin per la homa kaj morala digno aŭ per fideleco al la evangelia doktrino. Ekzistis ankaŭ sektoj mahometanaj, kiel la Babidoj en Persujo aŭ, dum certa tempo, « La Dia Regimento » de la tataro Vaisov en la urbo Kazanj.

Ĉi tiuj ekzempleroj de la homa gento vere prezentas la spiritan floron de l'homaro. Kaj ĝis la nunaj tagoj en multaj landoj la malkleraj regantoj, tute senigitaj de superaj homaj sentoj, malhoneste kaj sencele turmentegas ilin. Foje mi elnombris ilin. El dekok, kiuj sukcesis venigi al ni siajn leterojn, duono estis turmentigata ĝis morto de la caraj oficistoj.

Krom la leteroj estis ankoraŭ libro-sendaĵoj. La popola penso febre vekigadis en la Rusujo de tiu epoko. Kaj post la relativa liberigo de l'preso, la petado pri broŝuroj fariĝis kva-zaŭ pasiega. De la plej malproksimaj anguloj de la lando oni petadas la socialajn kaj filozofajn verkojn de Tolstoj. Liaj amikoj en Moskvo kaj en Peterburgo, duonŝtele kaj rapide eldonis ĉion, kio antaŭe estis malpermesata de la cenzuro. Ĉiutage, laŭ la elekto de Tolstoj, mi kolektadis certan nombron da sendaĵoj, enkudradis ilin en tolon kaj registradis la enhavon. Ĉiuj ĉi sendaĵoj estis ĉiam senpagaj.

Mankis ankoraŭ ĉe la granda rusa verkisto adreslibro. Mi do komencis fari ĝin. Krom tio ofte estis necese transkribi fragmentojn el libroj aŭ partopreni urĝan transskribon de grandaj manuskriptoj.

El la familianoj nur la plej tage rapide transskribadis la manus pli aĝa Mario Leonidino, alvetut dadis al leteroj, kompar-legis kun originalo, kaj Sofio Andreidino multnombrajn librojn, kiujn aŭtoroj alsendadis ĉi tien el ĉiuj landoj. Kelkfoje ŝi ankaŭ tradukadis fragmenteton el angla lingvo. La aliaj familianoj, kiam ili alveturadis, restadis tute flanke de la okupoj de l'patro kaj estis videble suferantaj je enuo.

juna filino, Aleksandrino, ĉiukriptojn per skribmaŝino. La ante iafoje por gastadi, respon-iu el amikoj la kopion kun enskribadis en la slipkatalogon

En la granda biblioteko de l'verkisto regis malordo. Ofte demandita libro malestis en ĝia loko.

Kompleta ordo estis nur en la kabineto.

Ĉe Tolstoj, kiun nun mi havis feliĉegon observi tute intimece, frapis min precipe tri ecoj.

Unue, lia tute sincera modesteco kaj mire sentema, ĉarma delikateco en interrilatoj; due, la vere senlaca, sinforgesiga fervoro kun kiu li perlaboradis ĉiujn, eĉ plej malgravajn el siaj skribaĵoj; kaj, trie, lia tute eksterordinara laborkapablo.

La sorto devigis min vivi kun multe da homoj, sed Tolstoj estis la sola, kun kiu mi neniam rimarkis eĉ ombreton de manko de vere ĉarma milda delikateco ĉe niaj interrilatoj. Malgraŭ mia juneco, li ĉiam pardonpetis, vokante min.

Por la sekvanta teksto, via legkampo devas kapabli enteni 33 signojn proksimume. Normale devas esti nur unu legkampo en ĉiu linio, sekve viaj okuloj devas moviĝi nur vertikale.

Tiu teksto aperis en El popola Ĉinio 12/85.

La media polucio kaj kontraŭmetodo en Pekino

La media protektado estas unu el la plej gravaj problemoj alfrontataj de la nuna mondo, precipe la ekonomie evoluintaj landoj. Kun rapida disvolviĝo de ekonomio, la media protektado en la urboj, precipe la grandaj urboj, estas aparte atentata de la registaroj de diversaj landoj. Pekino, ĉefurbo de Ĉinio, estas unu el la plej grandaj urboj de la mondo. Kiel multaj aliaj urbegoj de la mondo, Pekino en rapida disvolviĝo estas minacata de ĉiam pli serioza media polucio kaj ekologia detruo. Kiel efike protekti la medion en la ekonomia disvolviĝo estas unu el la nunaj ĉefaj taskoj plenumendaj por la Pekina magistrato.

Nun Pekino estas suferanta de polucio de akvo, gaso, ruboj kaj bruo. Laŭ statistiko, pro la atmosfera polucio la mortokvanto de urbanoj pro pulmokancero grandiĝas kaj pro la akva polucio la malmoleco de la subtera akvo en Pekino altiĝas kaj malboniĝas la akva kvalito de la riveroj kaj lagoj. Al iuj lagoj kaj riveroj mankas vizitantoj pro serioza polucio. La urba rubo pliiĝas je 6-7% ĉiujare kaj jam estas malfacile trovi pli da lokoj por teni ĝin. La ruboj ĵetitaj sur kampoj multe malutilas al la grundo por konservi nutron kaj akvon. La bruo, skuo kaj elektromagneta ondo jam malbone influas la radio-komunikadon kaj la vivon kaj sanon de la popolanoj. Kaj tio kaŭzis eĉ konfliktojn inter fabrikoj kaj loĝantoj.

La media polucio, tiu okulfrapa socia problemo, ne nur malbone influas la vivon kaj laboron de la popolo, sed ankaŭ kaŭzas grandan perdon de energio kaj aliaj riĉfontoj. Laŭ takso, ĉiujare la media polucio perdigas ĉ. 200-300 milionojn da jŭanoj (2.8 jŭanoj egalas al unu usona dolaro).

Antaŭ dek jaroj Pekino ekfaris kontraŭmetodon al media polucio. Kvankam la polucio ankoraŭ ne estas tute bridita, tamen grandaj sukcesoj estas atingitaj, precipe en la lastaj jaroj.

Koncerne al la serioza atmosfera polucio kaŭzita ĉefe de hejta karbo, la Pekina magistrato unuflanke transformis la fornegojn de la urbo por elimini fumon kaj polvon, aliflanke aplikis metodon koncentre liveri varmon por malpliigi fornegojn kaj ŝanĝi la speciojn de hejtaĵoj. Ĝis la fino de 1984 la fornegoj de la urbo estis plene transformitaj. La areo de domoj kun koncentra varmolivero pliiĝis je 8.8 milionoj da kvadrataj metroj. Kvankam la uzita hejta karbo de la urbo pliiĝis je 3 milionoj da tunoj, tamen la kvanto de falinta polvo restas fundamente senŝanĝa.

Por protekti la akvofonton la koncernaj departementoj de la magistrato rapidigis la konstruadon de la kloaka reto kaj instalaĵoj por trakti malpuran akvon, difinis la protektejojn de akvofonto por la akvorezervejoj Mijun, Gŭanting kaj Hŭajjoŭ kaj ellaboris regulojn pri protektado kaj

administrado de akvofonto. Dank' al polucio-elimino, reformo, kunigo, translokigo kaj fermo, pli ol 300 fabrikoj ne plu ĝenas la loĝantojn nek faras polucion, oni fermis ĉ. 200 muldejojn, varmotraktejojn kaj galvanizejojn. Dank' al tio, la ellasaj kvantoj de fenolo, ciano, hidrargo, kadmio, arseno kaj aliaj venenajoj malpliigis je pli ol 80 % kompare kun tiuj de 1973, kio mildigis la polucion de riveroj kaj subtera akvo.

Por severe bridi la trafikantbruon la magistrato publikigis la "Regularo por Protekti la Medion kaj Elimini la Bruadon (projekto)". Ĉiuj motorveturiloj de la urbo estas provizitaj per kornoj sonantaj mallaŭte. En la urbaj kvartaloj estas malpermesite sonigi kornon. Kvankam motorveturiloj pliiĝis je 8%, tamen la trafika bruo reduktiĝis je 1 ĝis 6 decibeloj, sub la normo difinita de la ŝtato.

Ĉi-jare kun plua laboro super la polucia fonto kaj unuopa polucio en loĝkvartaloj, Pekino plene energie faris sintezan reordigon de la urba medio. La ses lagoj (Ŝiĉaŝjihaj, Hoŭhaj, Ĉjanhaj, Bejhaj, Ĝonghaj kaj Nanhaj) en la urbocentro antaŭe estis imperiestraj ĝardenoj, sed post la Liberiĝo fariĝis lokoj ekskursaj kaj ripozaj por la popolo. En la pasintaj jaroj, pro neglekto de media protektado, la regiono estis poluciita certgrade. Ĉi-jare la magistrato decidis fari al la regiono

polucio de gaso ellasita en trafiko estas tre serioza. La kvanto de nitrogen-oksidadaj kombinaĵoj en la aero ambaŭflanke de la ĉefaj trafikaj vojkruciĝoj tutjare superas la normon difinitan de la ŝtato. Laŭ statistiko, la proporcio de la trafikaj policanoj suferantaj spirkanalan malsanon estas pli granda ol tiu de hortikulturistoj suferantaj de la malsano je 10%. En la pasintaj jaroj oni intensigis la traktadon de malpura akvo, sed la polucio ankoraŭ estas pli serioza. 76% de la riveroj kun longeco de 642 kilometroj trapasantaj la urbon kaj antaŭurbojn estas poluciitaj malsamgrade.

La media polucio multe suferigas la homaron, rezulte de tio la homaro konis la gravecon de la media protektado kaj ekologia ekvilibro. Ĉinio nun prenas la median protektadon kiel unu el la gravaj ŝtataj politikoj, fundamentan garantion de la moderniga konstruado kaj strategian taskon. Laŭ la postulo de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio, ke Pekino fariĝu urbo pura, bela kaj ekologie racia, la Pekina magistrato decidis plupaŝe preventi kaj elimini polucion kaj ekologian detruon en la Sepa Kvinjara Plano komenciĝonta en 1986 por konstrui Pekinon en la unuaklasan urbon, kiu estos la plej pura kaj bela en la tuta lando, je la fino de la nuna jarcento.

Por la sekvanta teksto, via legkampo devas kapabli enteni 34 signojn proksimume. Normale devas esti nur unu legkampo en ĉiu linio, sekve viaj okuloj devas mviĝi nur vertikale.

Tiu teksto aperis en Heroldo de Esperanto N-ro 9 (1764).

5 julio 1986



Integro tutmonda

Internacia Scienca Akademio Comenius

La unuaj virinaj kuracistoj

Medicino, samkiel multaj aliaj sciencoj (kaj muziko, literaturo kaj belarto), estis preskaŭ ĉiam rezervita al viroj. Temen, se oni esploras la pasintecon, oni malkovras, ke multaj virinoj postlasis spurojn en medicino.

Ni reiru al la jaro 2700 a. K. kaj ni trovas Merit Ptah, egiptinon, la unua kuracistino, pri kiu ni havas sciigojn. Sur ŝia tombo, skulptita el ŝtono, daŭre rezistas je la tempo ŝia meditema kaj hieratika portreto. Multaj jarcentoj pasis de tiam. Sed eble Merit Ptah, en la praktikado de sia profesio, ne spertis la problemojn, kiujn devis alfronti la atenanino Agnodika, vivinta en la tria jc a.K. La leĝoj de Ateno ne antaŭvidadis virinajn kuracistojn; sed Agnodika ruze evitis tiujn leĝojn, surmetante virajn vestojn. Kaj ŝi iĝis tiel lerta kuracistino, ke ŝiaj kolegoj, plenaj de envio, misakuzis "lin" pri seksperforto kontraŭ iuj pacientinoj dum la praktikado de la profesio. Kompreneble, estis facile al Agnodika pruvi la neeblecon de la akuzoj; kaj sekve de tio Ateno malfarmis la medicinajn studojn al virinoj.

Kaj ni konsideru la mezepokan Italion de la XI-a jc: en la "Salerna Skolo" pri Medicino, ankoraŭ hodiaŭ aprecata, lu virino, kiu nomiĝis Trotula Platearia, estis "magistrino pri medicino". Ŝi okupiĝis pri ginekologio kaj akuŝo-arto, kaj verkis la unuan traktaĵon pri tiu temo "Pri la virinaj suferoj". Same en Salerno, kelkajn jarcentojn pli malfrue, en 1430, Costanza Calenda havis la honoron esti la unua virino en la mondo, kiu doktoriĝis pri medicino.

(Radio Roma Esperanto,
trad. A. de Salvo)

Praktika uzado

Akademio Comenius, kun maksimume 80 membroj, estas sendependa institucio, kiu celas:

- Iniciati, kuraĝigi kaj konsili pri efektiveco de sciencaj esplorprojektoj;
- Reprezenti la sciencistojn, kiujn uzas la Internacian Lingvon;
- Sekurigi kaj administri fondaĵojn por antaŭenigi sciencajn aktivadojn;
- Kullabori kun aliaj organizaĵoj kaj akademioj, ekzemple la Esperanto-Asocio, Teknikista-Sciencista (Ĉina Akademio de Sciencoj) kaj la Akademio Internacia de la Sciencoj (San-Marino), kiu arigis pli ol 200 sciencistojn el multaj landoj.

Ĝia unua tasko estas publikigo de la jarlibro "Aktoj de Akademio Comenius" kun regularo, adresaro de la membroj, raportoj en Esperanto (kun nacilingvaj resumoj)

de la Akademianoj kaj de alte kompetentaj fakuloj.

Grava problemo

La financado estas la plej tikla problemo. Ĝian bazon formas la kapitalo, la ĉiujaraj enspezoj kaj la fondaĵoj. La kapitalo de Akademio Comenius konsistas el heredaĵoj kaj kontribuadoj de minimume 10.000 svisaj frankoj, aŭ ekvivalentoj donacitaj de institucioj aŭ individuaj mecenatoj. La enspezoj konsistas el interezoj de la investita kapitalo kaj el regularaj kontribuadoj (minimume 100 svisaj frankoj).

La sukceso kaj ekfunkcio de la Akademio dependas unuavice de la akcepto kaj helpo de esperantistaj individuoj kaj organizaĵoj.

Jam en januaro

La jura sidejo estos en Uppsala (Svedio) kaj la regularaj elektoj okazos, konforme al la regularo, tuj post la 1-a de januaro 1987.

(inf. P. Neergaard)

Simpla ne estas malriĉa

Johán Valano: Ili kaptis Elzan! Romano en facila Esperanto, 103 p., 14 x 20,9 cm. Eld. Fonto, Brazilo. Prezo 3 US \$.

Efektive la aŭtoro uzas nur 836 vortojn, sed en normala, klasika stilo: tute ne infaneca. Oni povas uzi la libron jam proksime al la fino de unuagrada kurso, kondiĉe ke la kursgvidanto funde traktis la kunmetemon de Esperanto.

Oni ne devas surpriziĝi, ke per vere minimuma vortprovizo eblas krei artan verkon, ĉe kiu oni tute ne havas senton pri malriĉo.

Evidente, Valano ne pretendos, ke jen aperis grandvalora artverko: ĝis nun li ne verkis tiaĵon. Temas pri modesta suspensa krimromano povunta kadriĝi inter la Ĉu-romanoj. La intrigo estas iom komplikata kun multaj flankintrigoj, la tuto eĉ tre malverŝajna, kun industriistoj, grafinoj, teroristoj, svastistoj, ktp. Cetere, ĝi felietonis en "Ovo".

Rikardo Cash

Pri la Esperanta kulturo

Bruĉjo Kasini intervjuas Baldur Ragnarsson

Pri poezio mi ne multe volas paroli nun, sed kompreneble, la plej granda evento lastatempe estis la reeldono de la "Esperanta Antologio" kun aldonaĵaj poemoj. Iuj tamen esprimis siajn dubojn pri tio, ĉu indas aperiĝi antologiojn de originalaj Esperanto-verkoj: tiuj deziras ali-

specajn verkojn, ekz. sciencajn.

B.K.: Pri tio vi povas ankaŭ respondi en via rolo de estrarano de UEA. La klopodo de UEA aperiĝi sciencajn verkojn tra sia centro en Budapeŝto laŭdire ne atingis grandan sukceson: mi aŭdis, ke la libroj, kiuj aperis tie, ne estis kontentige disvenditaj. Ĉu laŭ vi tiu bezono de sciencaj verkoj efektive ekzistas, kaj se jes, ja kiu speco de sciencaj verkoj sin direktas la bezono?

B.R.: Nu, mi aŭdas de iuj homoj, precipe de ĉinoj, ke ili bezonas tiajn verkojn, ke ĉinoj lernas Esperanton i.a. por povi studi sciencojn pere de la internacia lingvo tiel ke mi opinias, ke la bezono vere ekzistas. Mi ne scias precize pri la sukceso aŭ malsukceso de la sciencaj eldonoj en Budapeŝto, sed mi tamen opinias, ke oni ne predevas daŭrigi tian laboron. Estas tre bezonate, ke Esperanto ankaŭ evoluu sur tiuj kampoj.

B.K.: Ĉu UEA havas novajn ideojn por lanĉi en la kultura kampo?

B.R.: Mi povus menci kompreneble la projekton de la kultur-informiloj, kiun la Komitato decidis antaŭ du jaroj. Bedaŭrinde tiu projekto, pro manko de kunlaborantoj, tro malrapide progresas, sed la ideo estas, ke aperu laŭeble multaj koncizaj priskriboj de kulturoj, precipe minoritataj, de la tuta mondo, kaj tiuj kultur-informiloj servu ankaŭ por neesperantistaj instruistoj, kiuj povus utiligi tradukojn de ili en instruado: vi scias, ke estas tre malsame, kiel oni informas pri la kulturoj de diversaj nacioj, de diversaj etnaj minoritatoj tra la tuta mondo, kaj tiuj iloj celas ian unuformecon en la informado kaj egalrajtecon; mi esperas, ke tiu projekto ne mortos, sed bedaŭrinde nuntempe ĝi ne antaŭenmarŝas. Mi volas uzi la okazon atentigi la legantojn de "Heroldo de Esperanto", ke mi estas ĉiam preta akcepti proponojn kaj manuskriptojn de tiuj informiloj. Mi skizis la planon sisteme en "Esperanto", kaj an-

kaŭ aperis unu tia kultur-bildo en "Kontakto".

B.K.: Kion vi povas diri al ni pri Belartaj Konkursoj?

B.R.: Jam de dek jaroj mi estas la prezidanto de la Belartaj Konkursoj de UEA. Mi opinias, ke ili estas tre gravaj kaj necesaj: ili jam havas 35 jarojn, do sufiĉe longan tradicion. Kompreneble la konkursaĵoj estas vere diversvintaj: ofte juĝantoj iom malemas aljuĝi premiojn, sed tamen laŭ mi oni devas premi verkojn, ĉar temas ĉiujare pri relativa komparo finfine. En la lastaj jaroj plimultiĝis la branĉoj en la Belartaj Konkursoj, ni ne nur havas la tradiciajn branĉojn pri poezio, prozo kaj teatraĵo, ni ankaŭ havas eseon, kanton kaj fotografion; aliflanke, antaŭ kelkaj jaroj oni forigis la branĉon de tradukoj, simple ĉar la Komisiono opinias, ke ĝi ne estas kompetenta prijuĝi tradukojn el multaj lingvoj. Ĝenerale mi opinias, ke oni devas zorgi pri la altigo de la nivelo, ne pri multobligado de la branĉoj. Mi opinias ankaŭ, ke la ĉiujaraj komentoj de la juĝantoj iom kontribuas al la konsciigo de eventualaj verkantoj.

B.K.: Kaj fine, kiuj estas viaj personaj planoj: jam delonge ni ne plu vidas sur la bretoj de la libroservoj verkon kun via nomo?

B.R.: Vi pravas, dum multaj jaroj mi ne multe okupis min pri la verkado de poezio. Sed tio havas siajn kaŭzojn: unue, pro kaŭzoj en mia lando, kaj aliflanke en mia laboro en UEA. Kompreneble mi multe verkis en tiu periodo, sed plej parte artikolojn kaj prelegojn. Mi ankaŭ estas verkisto en la islanda lingvo kaj aperiĝis poemarojn ankaŭ en la islanda kaj multajn lernolibrojn pri la islanda lingvo. Entute aperis de mi 15 libroj, se oni enkalkulas ĉion, kaj Esperantaj kaj islandaj. Tamen mi ne cedis kaj oble mi rekomencos verki poezion en Esperanto: estus interese sperti, kian sintenon mi havos tiam al verkado de poezio post tiom longa silento.

R. Rossetti

Vinjeto

Mi havas tiun strangan kapricon, ke skribinte leteron mi devas tuj eliri kaj ĝin ekspedi. Eble mi timas, ke alie mi tute forgesos ĝin.

Nu okaze mi troviĝis surstrate ĉirkaŭ noktomezo. La kvartalo ŝajnis senhoma, sed subite sonis apuda voĉo. "Ĉu vi serĉas aferon?" Por mi nova esprimo, sed la senco estis netrompa. Jen ĉe mia flanko paŝas juna stratulino. "Ne, bona mia", mi respondis. "mi simple iras sendi leteron". Mi ŝin rigardis. Ŝi portis kolorvelkan bluĝinon kaj ĉifitan surtuton, la haroj estis nekombitaj: ŝika aŭ pimpa ŝi certe ne estis, kaj mi tute ne estus supozinta ŝian okupon. Ĉe mia parolo, la ombroj ŝin glutis tiel glate, kiel ĵus ŝi emerĝis el la tenebroj. Mi daŭrigis mian vojon.

Dudek paŝojn plu mi rimarkis plaĝan virinon, kun disbutonita peltito, kiu kvazaŭ ion serĉas sur trotuaro kaj en la ŝanelo. Dum mi venis proksimen ŝi rektiĝis kaj demandis kun irlandata tono: "Ĉu vi disponas cigaredon?" "Mi ne fumas", mi diris. "Estas por mia edzo", ŝi klarigis, "li mortas de kancero. Li havas plu nur kelkajn horojn kaj hodiaŭ mi forgesis aĉeti paketon por li". "Mi bedaŭras lin", mi diris kaj ni kune serĉis cigaredstumpojn, kiujn oni povas ja disĉifi por fari pluajn tubetojn aŭ, kiel oni slange diras, "ĉerkonaĵojn". Mi pensis, ĉu la edzo malsanas kanceron de la pulmoj ĝuste pro fumado, sed kial ŝovi la nazon, mi silentis. "Restas al li nur kelkaj semajnoj", ŝi diris nekonsekvence. Nu horoj, semajnoj, simpla buŝeraro — en Esperanto oni ja iam tiam konfuzas minuto kun monato.

La virino flankiris al garaĝo por serĉi apud la benzinpostenoj, sed mi avertis, ke aŭtistoj ne rajtas fumi tie kaj ŝi nenion trovas. Ŝi do transiris la straton kaj sub lanterno apud la butikoj ŝi plu spikumis.

Mi atingis la poŝtkeston, enŝovis la koverton, kaj reiris al mia loĝejo. La noktomeza strato estis jam tute silenta.



4 La kribla legado

La kompleta legado estas la baza tekniko de la legado. Multaj artikoloj, multaj libroj, multaj raportoj troviĝas ĉe niaj manoj sed ne ĉiuj valoras la tempon necesan por komplete legi ilin. Amaso da valoraj legaĵoj ekzistas kaj nia legtempo estas limigita, do estas grave havi metodon por ĉerpi la ĉefajn informojn de teksto sen legi ĉiujn vortojn.

La ĉefa principo de la kribla legado estas la malgrandigo de la nombro de la legitaj vortoj sen malpli bone kompreni la tekston.

La kribla legado estas uzata por akiri la interesajn informojn de la legata teksto sen antaŭe scii kiuj ili estas kaj kie ili estas. Sekve la kribla legado necesigas rigardon al ĉiuj paĝoj de la legata teksto, kaj plej grave pli aktivan rolon de la m.enso.

La kribla legado profitas de iuj principoj de verkado :

- La aŭtoro, sendepende de sia propra stilo, utiligas apartajn vortojn por enkonduki la gravajn punktojn de la teksto. Tiuj apartaj vortoj, uzataj por atentigi la leganton, estas nomataj signalvortoj, jen kelkaj el : "konklude", "resume", "jen...", "pro...", ĉiuj demandvortoj : "kiel...", "kial...", ktp. Demando estas kutime signalo kiun sekvas grava punkto de la teksto.
- La aŭtoro, precipe en artikoloj kaj raportoj uzas rektan stilon, tio signifas ke li elstarigas kiel eble plej rapide la ĉefajn punktojn (en titoloj, en enkondukoj, komence de sekcioj).

Plie la leganto ĉiam jam konas parton de la informoj en la teksto, tiuj informoj ne necesigas relegadon.

Ofte por bone .kompreni artikolon sufiĉas trovi la ĉefan ideon de la artikolo. Normale ĝi estas en la unua paragrafo, se vi ne trovas ĝin komence de la unua paragrafo, tuj saltu al la dua sen legi la finon de la unua paragrafo. Tiel oni povas salti de paragrafo al paragrafo ĝis kiam la enhavo interesas nin, tiam vi povas detale legi ĝin, eĉ redaŭrigi la kompletan legadon komence de la antaŭa paragrafo por esti certa ne maltrafi interesan enkondukan informon.

Poste, vi devas ĉiam demandi vin, ĉu vi vere legas novan informon ? se jes daŭrigu, se ne tuj ĉesigu la kompletan legadon kaj saltu al la sekvantaj paragrafoj ĝis kiam vi trovas ion legindan per kompleta legado. Pro tio tre gravas kapabli rapide trovi la signalvortojn.

Multaj legantoj intence malrapide legas, ĉar ili opinias ke se ili legus pli rapide ili malpli bone komprenus kaj malpli bone memorus. Tiuj legantoj certe konsentos kun la sekvanta aserto : post la legado, ni preskaŭ ĉiam ne memoras la frazojn, kiujn ni legis sed ni memoras nur la ideojn. Konsekvence kio plej gravas ne estas la legado de ĉiuj vortoj sed la akiro de la ideoj en la tekstoj.

Ni komparu telegramon kun normala teksto. En telegramo troviĝas unu triono de la vortoj de normala teksto kaj ĉu la signifoj estas grave malsamaj ? Tute ne. Tio signifas ke en normala teksto troviĝas multaj vortoj kies legado nur rabas nian tempon sen liveri utilan informon. Komprenoble, ĉi-tie ni konsideras nur informajn tekstojn, ni konsentas ke tiuj metodoj ne aplikiĝas al literaturaj tekstoj.

La tekstoj enhavas eble gravajn informojn sed ankaŭ multajn detalojn kiuj estas klarigoj, ekzemploj aŭ argumentoj kies legado estas necesa nur por tiuj kiuj ne konas la temon.

Se via legkampo estas same alta kiel larĝa, tio faciligos la serĉon de signalvortoj aŭ de ĉefaj ideoj.

4.1 Ekzercoj por plivastigi vian legkampon

Jen novaj ekzercoj por plivastigi vian legkampon laŭ la vertikala direkto. En tiuj ekzercoj vi devas fikse rigardi la centran vorton kaj sen movi la okulojn, provi legi la vortojn super kaj sub la centra vorto, pli kaj pli malproksime de la centra vorto (sen movi la okulojn). Iom post iom la ekzercoj fariĝas pli kaj pli malfacilaj, do pli kaj pli profitaj al vi.

(3)	kuo	ĉen
tri	kurbo	ĉarto
treni	kudro	ĉapltro
tre	kuv	ĉarma
		ĉef
naŭ	nun	
nadlo	nukso	fal
nun	nutro	fakto
	nek	familo
tuj		falsi
inter	lit	fon
tro	lifo	
	ligno	gal
ses	lin	gajni
sesio		galeaso
sep	oaz	gabio
	ofico	gaj
ĵus	ofero	
ĝusta	oft	hel
ĝis		hejmo
	(5)	heksano
ĉar		hejto
ĉarma	Eĥo	hej
ĉia	efebo	
	ebonito	iri
jes	eduko	imagi
jungo	eĝo	impreso
jen		imiti
	car	iom
sen	cedro	
senti	cemento	(5)
sed	cerbo	
	cel	tio
(4)		tanko
	dik	tartaro
kol	digno	tamburo
klifo	digesti	tamen
klera	dikti	tiu
kom	dig	

ven		paf
volbo	ree	pakto
vornbato	rajto	palumbo
volonte	ranatro	pantalono
vokto	rangifero	paleolitiko
vol	rankoro	papiliono
	raguo	palpado
ano	rak	palme
astro		per
aspekti	sed	
astenio	serio	sed
atelo	serpolo	sekci
aro	servitudo	sekreto
	serioza	sedimento
bon	serpo	sekigpaliso
bando	sen	sekundara
bankedo		sektoro
bangalo	(9)	sekto
bapto		sep
bel	unu	
(7)	dokta	nur
laŭ	dolmeno	nukso
lagro	domenpeco	numenio
laktuko	dolorpunkto	nukdoloro
labirinto	dokumento	numismatiko
lacerto	dominio	nutroriĉa
lakeo	dogmo	nutacio
lia	plu	nutro
		nun
mem	nek	
manĝo	grafo	(11)
marokeno	grapolo	
marioneto	gramofono	tri
maniero	gramatikaro	triki
mardo	grandioza	tributo
min	gratuli	tribunalo
	grava	trinkvazeto
oka	tra	trigonometrio
okulo		triumviraro
okarino	mem	tribunuso
okcidento	menso	tribuno
oksiuro	mensogi	tribo
oktano	meridiano	tre
oni	metamorfozo	
	meringelo	
pia	memuaro	
piano	mendo	
pieroto	min	
pirnpinelo		
piliero		
piedo		
pro		

sub	tiu	pra
sulko	tiklo	prodo
sulfuro	tiktako	procezo
substrate	timpanono	provianto
subjunktivo	tinkturisto	protoplasmo
subaŭskultado	testudmaniera	provekzemplo
substantivo	timonĉevalo	superproduktado
substitutuo	tinunkubo	provincanismo
sukcesi	timbalo	prospektoro
surda	tigro	prozelito
sur	tia	procedo
		prozo
pli	dek	per
placo	briko	
plafono	breloko	kia
planktono	brankardo	kameo
plezurboato	brakicefalo	kanjono
plugilteniloj	braklaboristo	kandidato
plendmotivo	bradipepsio	kantonmento
platformo	braceleto	kancelariisto
plastro	bravuro	kanonizprocesoj
plado	brilo	kampogardisto
plu	dum	kamenangule
		kampanulo
jam	(13)	kamloto
jakto	pri	kaoso
jahurto	presi	kiu
jugoslavo	preskaŭ	
jurmedicino	preteksto	kie
jurisprudenco	prezidento	krado
juglandarbo	presbiteriano	krajono
juĝantaro	prestidigitisto	krankakso
januaro	prezentletero	krestomatio
jardo	prerogativo	kristalografo
jes	preterito	kriminspektoro
	pretoro	kromatografio
tra	preta	krioterapio
trafi	pro	kreditoro
trafiko		kravato
trabapogi		krako
trajektorio		kio
tranĉilfarado		
trolestango		
trobadoro		
trogono		
trogo		
tro		

4.2 Ekzercoj pri signalvortoj en listoj

La sekvantaj ekzercoj celas trejni vin en plirapida rekono de la vortoj kaj en evito de konfuziĝoj.

La ekzerco konsistas el memstara vorto sekvata de vortlisto. La vorto troviĝas dufoje en la vortlisto, vi devas trovi ilin. Tiu vorto aperas inter similaspektaj vortoj.

Vi devas fari tiun ekzercon ĉiam pli kaj pli rapide; pro tio vi devas mezuri la tempon, kiun vi bezonas por fari ĝin.

adapti : adori, kapti, adepto, pesto, baptado, adapti, adolto, odori, abomeno, adapti, kaperi, adopti, adulta, asbesto.

aganto : agado, tago, agendo, gapanto, aganto, gardanto, agente, aganto, vaganto, ago, paganto, razanto, sago, diamanto.

lakto : pakto, kato, kakto, akto, akcio, lakto, aktiva, akta, ago, lakto, agado, kataro, takto.

ago : agro, tago, gapo, vagado, ago, agado, aĝo, agao, aĝio, aĵo, pago, papago, paĝo, ago, aglo.

plumbo : lumbo, aplomba, plombo, plumo, kolombo, palumbo, plumbo, lumbildo, lumado, plombado, pulmo, plumbo, lukumo.

aliĝi : aliigi, aliĝi, alligi, aligi, enlitiĝi, altigi, aliĝi, altiĝi, ligi, alia, ligado, aloj, almeti, alfiksi, alineo, gajiĝi, enladiĝi.

bendo :

benko, dento, bando, bendo, banto, bendo, benado, tendo, pendo, fendo, vento, vendo, pento, pordo, sendo.

anaso : ano, ansero, anso, anaso, anĉo, anĉovo, amo, anaso, anonco, ananaso, amaso, maso, nazo, gaso, raso, taso.

akcelo : akneo, akuŝi, akvario, akomodo, akcelo, akanto, akordi, akselo, akcelo, akvarelo, akvoj, akcidento, akcio, akcipitro.

arbusto : arbedo, arbusto, arbitro, arbaro, arbuto, arbeto, arbusto, arbitracio, asbesto, artiklo, ardezo, arkado, brusto, krusto, abrupte.

organo : orgeno, argono, arkano, ordono, oriono, ardezo, organo, gramo, organo, rigardo, gardo, garono.

artiko : artiklo, aroki, artifiko, artiklo, artikolo, praktiko, arseno, radiko, saliko, kaliko, paniko, kritiko, arakido, artiklo.

atendi : pendi, atenti, atuti, tendumi, vendi, tondi, aresti, alsendi, alpendi, atendi, atenci, alteni, tenadi, atendi, penti, fendi, stipendio.

barbo : bardo, barelo, barko, barto, barbo, barilo, basto, barako, brako, karbo, barbo, krabo.

beno : bedo, beto, bieno, bono, beno, bendo, beno, bano, bando, bagno, bebo, nepo, neto.

boato : boato, boeco, boao, blato, boato, boao, blago, bobelo, boaco, bobeno, bokalo, bordo, boto, bolto.

bobeno : berilo, borilo, bokalo, bobeno, bobelo, babelo, bombono, benzolo, bizono, pokalo, bobeno, bolado, balado, baletto, balkono.

branço : brando, branko, brako, bramano, bukano, brano, branço, bremeno, breviero, branço, brando, krano, bizono, boaco, branaço.

broço : breto, brano, bramo, broso, broço, breço, breçio, brogi, brokanti, broço, kruço, branko, blanka, branço.

brogi : brigo, breto, broso, brogi, broki, bruli, brogi, bre'ço, brano, brodi, broki, branko.

bufo : bufago, budeno, budo, bufo, budito, bufro, bufo, bufono, gufo, brui, budho, bufedo, bulko.

buklo : buleo, bulo, bufo, budho, buklo, buko, bulko, burdo, burb, bukano, buklo, bufro, bufedo, budito, bufago.

cidro : cefalo, cefeo, cedrn cidro, cidaro, cedrato, cindro, celo, çielo, çelo, cento, cendo, çeleo, cidro, citaro.

cepo : cepolo, cervo, ciano, cepo, cerbo, ciklo, cimo, cezuro, cedo, bedo, bebo, kepo, pepo, cepo.

cigaro : cikonio, cigaredo, cidonio, cerbo, cepolo, ciano, cigareto, cikaso, cikatro, ciklono, cigaro, cipreo, cipro, cigaro.

cipro : cipreo, cipreso, cirklo, cirkelo, cipro, cirko, ciklo, ciklono, ciprino, cipriano, cip•o, cirkuli, citruso, ciruso, citrono.

cirko : cipro, cirkelo, cirkuo, cirko, ciklo, cikatro, ciruso, citrono, citralo, cirko, cikado.

citrono : citruso, citrono, citrolo, citralo, citro, ciruso, citrono, cirklo, cipro, ciprino, ciklono, cikado, cigaro.

çamo : çano, çamo, çamo, çako, 'çapelo, çanelo, çasi, çamo, çarto, çesi, damo.

domaço : damao, damo, domaço, domaro, dromedaro, dometaço, damaço, domaço, homaço, omaço, kromago, naço.

debato : deserto, delfeno, debito, debeto, debato, batado, balado, deteno, debato, debuto, delto, tablo, tabelo, detalto.

dezerto : digesto, dizerti, diskuti, diluvio, deserto, drinki, dezerto, rezervi, diçesto, disputi, dezerto, dementi.

domo : domaĉo, donado, dorno, dormo, domo, domeno, domaĝo, domaro, dromo, droni, dromio, domino, domo, dolmeno.

ekrano : krano, kranio, efiko, ekrano, elfluo, efekto, ekliso, eklipso, ekrano, efluvo, ekregi, krado, krampo.

emporio : empireo, empirio, empiro, emporio, imperio, empetro, empeno, impeto, imponi, impozi, impresio, emporio.

etiko : etiko, etikedo, etiketo, etologio, etaĝo, etaĝero, etero, etoso, eterna, etilo, etileno, etato, etiko, etimo.

fabo : fabelo, faco, facio, fabo, fablo, fago, favo, fabo, fado, fajo, fako, faro, falo.

festo : fibolo, fibulo, fileo, fendo, festo, festeno, festono, festo, pesto, nesto, besto, kesto, resto.

foiro : folio, foliolo, flosa, fojno, fojno, foiro, foriro, fondo, forto, pendo, piro, brogi, foiro, friso.

fonto : fonto, fondo, forto, fuorto, ponto, fendo, fonto, fonduso, folio, konto, formo, fono.

forto : fuorto, folio, porto, forto, fondo, porto, korto, korpo, forto, formo, fendo, fortreso.

fringo : fonduso, frando, franĝo, frato, klingo, fringo, fingro, frambo, frajto, fuorto, fringo, fringelo, frizita.

fronto : frunto, frondo, fronto, forto, fonto, fronto, ponto, froko, frukto, frontono, fugo, fringo.

fuzeo : furio, fuzelo, fuzeo, fuzio, fulgo, fuzelaĝo, furo, fuzeo, fulmo, frue, fuliko, lupeo.

gajno : gago, gaja, gajno, gaino, gageo, gabio, gajno, pajlo, gapo, garno, gardo.

galero : gelato, gelateno, galeaso, galeo, galerio, galero, galio, galo, galero, galiono, gardo, glaĉero.

ĝeno : getao, gelato, gemo, ĝermo, ĝeno, ĝeto, geno, gento, ĝeno, ĝelo, peno, genro.

glacio : glaciso, glaco, glaso, glacio, glaĉero, glaceo, glacio, glano, glata, glavo, glito.

greno : grado, krado, grajlo, grenato, grenado, granito, preno, greno, graplo, groso, greno, greso, groto.

Via legtempo : sekundoj.

Jen nova listo :

La memstara vorto troviĝas dufoje en la listo, kiu sekvas ĝin. Trovu ilin. Praktiku ĝin multfoje, ĉiam provante pli rapide fari ĝin.

Mezuru vian tempon.

granito : termito, formiko, granito, perditio, granito, grenado, grenato, granato, greno, garantio, gramz-ttiko.

grapolo : grajlo, grajno, grifelo, graplo, grapolo, grafo, interpolo, grifono, grapolo, gratado, gvatado, raspado.

grifo : grifelo, grifono, grifo, grafo, grilo, gripo, grifo, grefto, greko, grejso.

groso : graso, greso, groco, grotto, grosa, greno, grado, groŝo, gvato, gruzo, graso, grosa, gusto, guŝo, gurdo.

gudro : gudro, gurdo, guto, gusto, guro, gudro, gardo, kudro, pulvo, grotto, gulo.

justa : ĝusta, ĝis, posta, gusto, justa, justico, ĵusa, jungo, jurto, justa, juka, junko, junto.

harpo : harpio, harpuno, harpo, harpeco, herco, harpalo, herpeto, hordo, harpo, hirta, hordeo, korpo.

heliko : helico, heliko, helikso, helaso, helero, helianto, heliumo, helikrizo, helero, heliko, helado, hedero.

hematio : hematino, hematito, hematozo, hematopo, hematio, hemiono, hemolizo, hemofilio, hemostazo, hematio, homaro, hematurio.

hepato : hepatiko, hepatito, hepialo, heptagono, hepato, helpato, hejmo, hepato, hejtado, heĝo, herbario, heredo.

herbario : herbo, herbaro, heredo, barbaro, herbario, herdo, herpeto, herbario, herezo, beribero, berberiso, berilio.

hibrido : hidro, hidalgo, hibisko, hibrido, kriblado, hidrato, historio, fibirdo, senbrida, hibrido, likvido, hebreo, histriko.

hieraŭ : hieraŭ, hieno, hieracio, hierarkio, hieraŭ, hierofanto, hierogamio, hieroglifo, hioido, hirta.

hiperiko : hiperbolo, hiperkritiko, hiperiko, hiperbato, hiperemio, hipermetropa, hiperiko, hipertrofio, hipertensio, hiperestezio.

hipostilo : hipogrifo, hipofagio, hipodermo, hipostilo, hipostazo, hipotenaro, hipostilo, hipotezo, hipotenuzo, hipospadio, hipoteko.

histerio : histero, histerio, histriono, histriko, hispano, hirundo, histerio, historio, histerezo, histaro, hastado, hostio.

hordo : horo, horciklo, horplano, horloĝo, hordo, hordeo, hororo, hormino, herbo, hardo, hordo, herdo, heredo.

hurlo : hurono, hurio, hurlo, kurbo, hundo, hurio, hurlo, hulo, kulo, kudro, bruto, brulo, kruda.

imperio : impedanco, imperaturo, imperia, impeno, imperiestro, imperialo, impeto, impono, imperio, imposto, impresio, impulso.

indiko : incido, indiko, incito, incizo, incizivo, incenso, indiko, indico, indekso, indigno, indolo, indukto.

indulto : indolo, individuo, indulto, indukto, indulgo, indulto, indulino, indulgenco, induktoro, indoksilo.

insisto : insekto, inokulo, inserto, instepo, instruo, instanco, insisto, insulto, insulo, insulino, insisto, instalo, insigno.

intereso : intensa, intereso, interna, interezo, interfero, interdikto, intenco, intermita, intermezo, intereso, intesto, intrigo.

inverso : inverso, inverto, invito, investo, invento, inundo, invencio, inventaro, inverso, inversio, invado, inulino.

izotono : izotopo, izolado, izomera, izotono, izotermo, izotropo, izopodoj, izomorfa, izotono, izocela, izatido, izobara.

junko : juro, jurto, junko, junto, jungo, juneco, jupo, junkro, junko, jukao, jufto, jubeo, jupeto.

kadro : kadavro, katastro, kadro, kadoleo, kadro, kadmio, kadrato, kaduceo, kaduka, kadiso, kadeto, kadio.

kalendo : kalateo, kalcino, kaldrono, kalendulo, kalefakcio, kalemburo, kalandro, kalendaro, kalendo, kalendo, kalenturo.

kaliko : kalibro, kaliko, kaliko, kalio, kalidro, kalifo, kaligrafo, kalikoto, kaliopo, kalisto, kalistefo.

kameno : kamao, kalvario, kamo, kamajo, kamarado, kamelo, kameno,ambio, kambrio, kamelio, kamero, kameno, kamiono.

kanalo : kanao, kano, kanabo, knabo, kanalo, kanajlo, kanapo, kanario, kancelo, kancero, kanalo, kanelo, kanibalo, kankano.

kantoro : kantado, kanoto, kantoro, kantato, kantiko, kantino, kantono, kantoro, kamulo, kanzono, kanvaso, kantiĵo.

kapitano : kaploko, kapabla, kapacito, kapacitanco, kapitano, kapelo, kapitano, kapero, kapibaro, kapitalo, kapitulo, kapitulaco.

karamelo : karmemora, karulino, karamelo, karafo, karakoli, karamboli, karamelo, kamelo, karavano, karavelo, karaso, karako, karabeno.

kareso : karcerio, kardano, kardio, kareto, kareno, kareso, karesmo, karesema, kareso, karekso, kardono, kardinalo, kardelo.

kartono : kartamo, kartono, kartelo, kartaro, kartoĉo, kartono, kotonio, kartuŝo, kartilago, kartografo, karsto, karoteno, karoto.

kasiso : kasacio, karvio, kaskado, kaseto, kasavo, kasio, kasifolio, kasiterito, kasiso, kaskarilo, kasono, kastelo, kasiso, kastoio, kasto.

kataro : katino, kateto, katalizo, katakrezo, katakombo, kataro, katalogo, katario, katarto, kataro, katastro, katedro, katastrofo, kateno.

klabo : klaso, klako, klano, klapo, klafto, klado, klabo, klara, klatro, klaŭno, klavo, klavaro, klavario, klabo.

kokono : kokaro, kokrito, kokao, koko, kokono, kokoso, kokluŝo, koktelo, kolo, kolonelo, kokono, kolao, kokso, koklo.

koloro : kolobomo, kolodio, kolokvo, kolono, koloro, kolonaro, kolonelo, kolonio, koloso, kolubro, kolostro, koloro, koluro, kolutero, kolzo.

Via legtempo :..... sekundoj.

4.3 Ekzercoj pri signalvortoj en tekstoj

Jen serio da ekzercoj en kiu vi devas trovi indikitan signalvorton kiel eble plej rapide.

Ekzerco 1 :

Kiom da fojoj aperas la radiko "gazet" en la sekvanta teksto, mezurante la tempon necesan por trovi ilin :

El "La fenomeno Svislando"
de Arthur Baur
eldonita de Svisa Esperanto Societo

La partioj

Ni parolis ĝis nun nur pri la ŝtataj institucioj, sed ekzistas ankoraŭ du organoj, kiuj por la funkciado de la tuta sistemo estas ege gravaj, nome *la partioj* kaj *la gazetaro*. Nia konstitucio estas tre lakona pri ili. Pri la partioj, ĝi eĉ tute ne parolas kaj pri la gazetaro ĝi diras nur unu frazon: «La libereco de la gazetaro estas garantiita.» La partioj tamen proponas la kandidatojn por la elektoj kaj en ili kristaliĝas la publika opinio. Por ties formado kaj disvastigo la gazetoj estas absolute necesaj. Iu foje diris, ke la gazetoj ekzistas, por ke la regado ne estu tro facila. Tio estas ĝusta, sed en Svislando ili havas plian taskon, ili estas bezonataj, por ke la popolo ricevu ampleksan informadon pri la objektoj de la voĉdonadoj. Plej ofte la redakcioj mem defendas iun starpunkton, sed fariĝis kutimo, ke ili donas spacon ankaŭ al la subtenantoj de la kontraŭa opinio, tiel, ke la publiko povas mem formi al si opinion. Nun ni rigardu iom pli detale la spektron de la partioj kaj la staton de la gazetaro.

Detala priskribo fariĝus tre komplika afero, ĉar ne ĉiuj partioj laboras en ĉiuj kantonj, kaj kelkaj eĉ havas diversajn nomojn en diversaj kantonj. Mi tial devas preterlasi la kantonajn radikojn de la partioj kaj lirnigi min al la situacio en la federacia kampo. Oni ne povas diferencigi inter registaraj kaj opoziciaj partioj, ĉar ĉiuj grandaj partioj estas reprezentitaj en la registaro. Tio tute ne ĝenas la unuopajn partiojn oponi eĉ proponojn, kiujn ellaboris iliaj propraj anoj en la registaro. En la federacia asembleo tri grandaj partioj ludas la decidan rolon. Ili estas preskaŭ same grandaj kaj ĉiu el ili jam povis en iu sesio fanfaroni esti la plej granda. Tio estas la Radikaloj, la Kristdemokratoj kaj la Socialdemokratoj.

Via tempo sekundoj. Nombro da "gazet-" -

Nun vi faru la samon por "publik-", poste por "opini-", poste por "partio", por "kanton-", por "registar-", por "propon-", por "federaci-", por "popol-", por "grand-", por "detal-". Solvoj post la "ekzerco 3".

Solvo de "ekzerco 3 : Pri tiu, kiu finfaris la orelo de la infano al la junedzino de sia najbaro"

:

infano (7), orelo (3), virino (4), edzo (3), graveda (4), najbaro (2)
urbo (3), monato (2), junedzino (2), edzino (2).

Ekzerco 2 :

Kiom da fojoj aperas la vorto "inĝeniero" en la sekvanta teksto, mezurante la tempon necesan por trovi ilin :

El "jarlibro 1985" de Universala Esperanto-Asocio eldonita de U E A

Niihama-si, Ehime-ken, 792; 2;r hejma (0897) 33-8850, ofica37-0225. Nisibiwazima (Aiti-ken) 20 000 D: Zisuke Takenaka, emerito, Zikken'ura 28, Niskasugai-gun, Nisibiwazima-mati, Aiti-ken, 452;Nagoya (052) 501-2843. Okayama (Okayama-ken) 500 000 D kaj Fli (medicino: hirurgio): Hideki Harada, hirurgo en Okayama Akcidento-Hospitalo, Isimamati-it-tydme 9-30, Okayama-si, 700; 5 (0862) 54- 0623. Ciesaka (Oosaka-hu) 3 100 000 D: Tutomu Nisio, inĝeniero pri maŝinoj, Takadono-yon-tydme 13-3, Asahiku, Oosaki-si, 535; 5= (06) 955-5728. FD (inĝenierado): Sinzo Sumiya, inĝeniero, 3-3 Suehiro-tyo, Kita-ku, Oosaka-si, 530; hejma (0722) 61-0129, ofica (06) 312-6621. FD (instruado): Rinzo Okumura, instruisto, Imagawa-ni-tydme 15-7, Higasisumiyosi-ku, Oosaka-si, 546; 1C (06) 701-2195. FD (virinaj aferoj): P-ino Safori Kita, Ikeda-ty5 1-1-1303, Kita-ku, Oosakasi, 530;(06) 361-0587. OF: Kansaja Ligo de Esperanto-Grupoj, Sonehigasi 1-11-46-204, Toyonaka-si, Oosaka-hu, 561; '1' (06) 841-1928. Kutime semajntage 10:00- 16:00, dimanĉe kaj feritage 13:00-17:00, vespere lu me ja sa 19:00-21:00. Petu informojn pri rondvojaĝoj. Do2u (Siga-ken) 180 000 D: Uzd Nakamura, em. direktoro de aŭtobus- kaj taksi-kompanio, Kokubuit-tydrne 4-27, Ootu-si, 520;(0775) 37-2866. Oltarui (Hokkaid8) 200 000 D kaj FD (medicino): D-ro Isamu Yamaga, oftalmologo, Hanazono 3-8-13, Otaru, 047; s. (0134) 22-7918. Sagae (Yamagata-ken) 40 000 D: Zird Nagaoka, oficisto, Rokkumati-ni-tydme 6-12, Sagae-si, Yamagataken, 991; '3' (02378) 4-3244. Sagamihara (Kanagawa-ken) 440 000 FD (elektroniko; radioamatorismo: JJ1LKL): Tokio Sydzi, elektronika inĝeniero, Matida-Sanhaimu-103, Kamituruma 2087-1, Sagamihara-si, 228; (0427) 48-4127. Sapporo (Hokkaid) 1 000 000 P D: Kirniharu Kimura, pensiulo, IVlinami 11-14, Honddri-zyonana-, tydme, Siroisi-ku, Sapporo-si, 003; Es' (011) 861-7564. Sendail (Miyagi-ken) 610 000 VD: S-ino Tume Saito, oficistino, Miyatiyo-it-tydme 17-15, Sendai-si, 983; 240	(0222) 94-7474. Sizaloka (Sizuoka-ken) 450 000 Rokuro Tokuda, eks-radiokomentariisto, 9-1 Mizuoti-mati, Sizuoka-si, 420; e (0542) 45-3023. VD: Akio Ooba, em. konstrua inĝeniero por fervojoj, Isida-ni-tydme 9-2, Sizuoka-si, 422; 21 (0542) 86-5079. Sdka (Saitama-ken) 187 000 FD (interpretado; tradukado): Syūiti Yamakawa, interpretisto kaj tradukisto de la angla pri ekonomio, Sdka-it-tydme 3-4, Sdka-si, Saitama-ken, 340; (0489) 42-4833. Takamafcla (Kagawa-ken) 300 000 D kaj FD (kemio: nutrado): Prof. Kawamura, kolegia profesoro iviiyawakity8 2-4-19, Takamatu, 760; hejma (0878) 31-2973, ofica 33-3737 (Meizen-Kolegio). Takaoka (Toyama-ken) 135 000 D kaj FD (instruado): Masao Kakuo, insfruisto, Moriyama-tyd 63, Takaokasi, Toyama-ken, 933. Takasago (Hydgo-ken) 80 000 D: Yositaka Mine, inĝeniero komputila, Kitahama-Kitawaki-Nisida 29-16, Takasago, Hydgo-ken, 671-01; E's (0792) 54-2802. Takatukl (Osaka-hu) 350 000 D: Sadami Tanaka, pensiulo, Tennd-tyd 20-10, Takatuki-si, Oosaka-hu, 569;(0726) 71-5303. VD: Yosikazu Takeuti, kooperativ-oficisto, Zyoisai-tyō 6-15, Takatuki-si, Oosaka-hu, 569; a (0726) 71-3773. Tiwa (Tiba-ken) 700 000 VD: Masami Nakamura, oficisto, Daini-Inage-haitu-7-405, Konakadai-tyd 1207-1, Tiba-si, 281; e (0472) 55-5019. Tokusima (Tokusima-ken) 250 000 D: Tosio Deguti, komercisto, Saiwai-tyd 2, Tokusima-si, 770; S' (0886) 52- 5943. Tōkyō (Tōkyō) 11 500 000 D kaj FD (muzeoj; sociaj sciencoj): Prof. Tard Nisiumi, universitata profesoro pri historio, Kitakoiwa-roku-Tydme 31-19, Edogawa-ku, Tōkyō, 133; (03) 657-5682. Dumsomera apudmara loĝejo: Kisasi- it-tydme 11-4, Akasi-si, Hydgo-ken, 673; (078) 922-4412 VD: Susumu Tezuka, ŝtata impost-oficisto, Ekoda-it-tydme 34-6, Nakanoku, Tōkyō, 165;(03) 953-1939. FD (filatelo): Nobuo Sakurai, komercisto, T.I.P.O., Box 5197, Tōkyō, 100- 31; grs. (03) 271-9783. Japanujo 241
---	---

Via tempo : sekundoj. Nombro da "inĝeniero" :

Nun vi faru la samon por "oficisto", poste por "profesoro", poste por "em-" aŭ "emerit-", por "instruist-", por "pensiulo", por "komercisto". Solvoj post la "ekzerco 3".

Solvo de "ekzerco 4 : La lernolibro de la vivo" : timo (4), homo (3), malsano (6), malbono (6), propra (3) afero (2), bildo (2), malfeliĉo (2), danĝero (2), oni (5), negativa (2), batalas (3).

Ekzerco 3 :

Kiom da fojoj aperas la vorto "infano" en la sekvanta teksto, mezurante la tempon necesan por trovi ilin :

El "franca esperantisto" N° 363 Julio 1985
eldonita de Unuiĝo Franca por Esperanto

Pri tiu, kiu finfaris la orelon de la infano al la junedzino de sia najbaro

Ne mirinde estas se la inoj el la kampo ne estas tre spritaj , ĉar foje ankaŭ la inoj el la urboj falas en tre simplajn trompojn. Verdire tio ne tre oftas, ĉar precipe en la urboj la virinoj mem inventas la ruzaĵojn. Pro Dio! Kaj tamen, mi volas rakonti , ke vivis en la urbo Liono juna virino inde beleta, kiun oni edzinigis je komercisto, kiu sufiĉe bone negocis. Sed, apenaŭ ili kunvivis kun ŝi tri aŭ kvar monatojn, kiam li devis forvojaĝi pro siaj negocoj, lasante ŝin graveda de nur tri semajnoj, kion ŝi ekkonis ĉar ofte ŝin trafis svenetoj, kun aliaj similaj okazaĵoj propraj al gravedaj edzinetoj.

Tuj post lia foriro, unu el liaj najbaroj, nomita Sinjor' Andreo, vizitis la junan edzinon, kiel li kutimis senĝene fari pro najbareca rajto, kaj ekŝercis kun ŝi, demandante kiel ŝi fartis en geedzumado. Ŝi respondis, ke sufiĉe bone, sed ke ŝi sentas sin graveda.

Ĉu vere?" li diris. "Via edzo ne estus havinta la eblecon fari al vi infanon en tiom mallonga komuna vivo."

- "Jes tute certe tiel estas," ŝi diris, "ĉar Sinjorino Tonjo diris al mi, ke ŝi estis kiel mi nun, kiam ŝi atendis sian unuan infanon."

- "Do," diris Sinjor' Andreo, tamen sen pensi pri malbono, nek imagante ke okazos kio fakte okazis, "kredu ke mi bone konas tiun fakon, kaj ke mi certas vidante vin, ke via edzo ne faris la infanon tutan kaj ke restas farenda ia orelo. Je mia honor', bone atentu! Mi jam vidis multajn virinojn, kiuj spertis malfeliĉojn kaj aliajn, kiuj estis pli prudentaj kaj petis, ke iu finfaru la infanon dum foresto de la edzo, timante la mankojn. Sed tuj post reveno de mia amiko, petu lin, ke ĝi finfaru!"

- "Kiel?" ĝemis la juna edzino: "li foriris al Burgonjo, kaj ne povos reveni post minimume unu monato."

- "Amikinjo," li diris, "vi ne havas bonŝancon. Via infano havos nur unu orelon kaj vi riskas, ke la ceteraj poste ankaŭ havu nur unu, ĉar ĝenerale, kiam okazas iu manko ĉe la virinoj gravedaj de sia unua infano, la sekvantaj havas la saman mankon."

La junedzino, je tiuj vortoj, estis ege ĉagrenita.

- "Ha! Dio mia!" ŝi diris. "Kiel malfeliĉa mi estas! Mi miras, ke li ne

Via tempo : sekundoj. Nombro da "infano" :

Nun vi faru la samon por "orelo", poste por "virino", poste por "edzo", por "graveda", por "najbaro", por "s'urbo", por "monato", por "junedzino", por "edzino". Solvoj post la "ekzerco 1".

Solvo de "ekzerco 1 La fenomeno Svislando" : gazet- (6), publik- (2), partio (11), opini- (3), kanton- (3) registar- (3), propon- (2), federaci- (2), popol- (1), grand- (4), detal- (2).

Ekzerco 4 :

Kiom da fojoj aperas la vorto "timo" en la sekvanta teksto, mezurante la tempon necesan por trovi ilin :

La lernolibro de la vivo
de Martin. KOJC
eldonita de Internacia Esperanto-Instituto

Kiam oni timas ion, oni pensas, ke venos io nedezirata. El tio sekvas, ke la timo al iu malsano estas la plej certa rimedo por ricevi tiun malsanon.

En la tuta mondo ne ekzistas malbono, kiu de ekstere povas veni al ni. Ĉiu malbono unue devas esti kreata en nia propra fantazio. Tial ni ĉiam batalas kontraŭ niaj propraj imagoj. Ni ĉiam timas nur la fantomojn, kiuj estas kreitaj de nia propra spirito.

La timo al iu afero kaŭzas senton de senpoveco rilate al tiu afero, do negativan bildon, kiu precize efektivas tion, kion oni timis.

Ekzemplo: Per libroj, amikoj, videblaj faktoj aŭ en iu ajn alia maniero la homo formas bildon de iu malsano aŭ alia malbono. Sekve de sia nescio li iamaniere akceptas, ke ankaŭ povos ekhavi tiun malsanon aŭ malbonon, kaj la sekvo estas, ke li komencas timi pri tio.

Tiamaniere naskiĝas en la homo la timo al minacanta danĝero, kaj ju pli li batalas kontraŭ tio, des pli rapide ĝi venos, tial ke la kontraŭbatalo akompanas la timon, kies grandeco estas denove termometro por la materia efektiviĝo de la negativa bildo pri la malsano aŭ iu ajn malbono.

Ju pli oni batalas kontraŭ iu malbono, des pli granda ĝi fariĝas. La malfeliĉo venas pro la klopodoj eviti ĝin. La malfeliĉo venos, se oni klopodadas por la feliĉo.

La homo, kiu sentime kaj trankvile kondutas rilate al sortobatoj, kiel malsanoj, akcidentoj, malsukcesoj k.t.p., evoluigas magian forton, kiu garantias la venkon kaj kiu sufokas tiujn danĝerojn jam en la ĝermo.

Via tempo : sekundoj. Nombro da "timo" :

Nun vi faru la samon por "homo", poste por "malsano", poste por "malbono", por "propra", por "afero", por "bildo", por "malfeliĉo", por "danĝero", por "oni", por "negativa", por "batalas". Solvoj post la "ekzerco 2".

Solvoj de "ekzerco 2 : jarlibro 1985" : inĝeniero (5), oficisto (5), profesoro (2), em- aŭ emerit- (3), instruist- (2), pensiulo (2), komercisto (2).

5 La lokalizo

La lokalizo devas esti uzata antaŭ la kompleta aŭ la kribla legado, por serĉi informon en jarlibroj, enciklopedioj aŭ dikaj libroj.

La lokalizo estas la taŭga metodo por serĉi :

- telefonnumeron de iu persono en jarlibro.
- difinon de vorto en vortaro.
- informon en enciklopedia, en historia aŭ en simila libro.

Por ekzemplo, por serĉi la difinon de vorto en vortaro, oni ne malfermas ĝin ekde la unua paĝo, sed oni malfermas ĝin rekte ĉe la unua parto se temas pri vorto komenciĝanta per A, B aŭ C, ĉe la mezo se la vorto komenciĝas per L, M aŭ N, aŭ ĉe la lasta parto se la vorto komenciĝas per la litero V aŭ Z.

Por bone utiligi la lokalizan teknikon, necesas unue precizigi la informon kiun oni volas akiri el la libro.

Kiam oni vere precize scias kiun informon oni volas trovi, oni devas serĉi la tabelon de la enhavo. Se ĝi ekzistas, la tabelo de la enhavo estas la plej grava helpilo de leganto, kiu volas trovi kiel eble plej rapide informon en iu ajn libro, ŝparante sian tempon.

Jen ekzercoj por trejni vian lokalizan kapablon :

Trovi vorton.

- Elektu vortaron pri Esperanto.
- Elektu vorton, kiun vi serĉos en la vortaron.
- Mezuru la tempon, kiun vi bezonas por trovi ĝin.

Serĉi informon.

- Elektu jarlibron de UEA aŭ de SAT.
- Elektu urbon en iu ajn lando el atlaso aŭ el geografia libro, sen rigardi en la jarlibro, kompreneble.
- Mezuru la tempon, kiun vi bezonas por diri kiom da delegitoj loĝas en tiu urbo.

6 La aktiva legado

Por akiri pli da informoj en kiel eble plej malmulte da tempo, necesas lerni kelkajn legmetodojn. Sed la plej grava elemento por la rapida legado estas la aktiveco de la menso.

Via legado estos pli rapida kaj pli profitdona nur se ĝi estas aktiva. Via menso devas plej aktive gvidi kaj movigi viajn okulojn, tio estos des pli facile se via legado havas celon. (kiun informon vi deziras akiri) kaj se vi limigas vian tempon por tio. Tion vi certe jam konstatis.

Konsekvence, la plej bona maniero por plirapidigi vian legadon estas regule trejni sin per la jam proponitaj ekzercoj kaj prepari ĉiun novan legadon tiel :

1. Precize identigi vian legcelon (kial vi intencas legi tiun novan tekston ?, kiun informon vi esperas akiri ?).
2. Limigi al si la tempon por atingi la identigitan legcelon.
3. Komenci la legadon nur post la plenumo de la du antaŭaj paŝoj
4. Utiligi, se eblas, la lokalizan teknikon.
5. Poste, utiligi la kriblan legadon.
6. Kaj kiam vere necesas, utiligi la kompletan legadon.
7. Kiam la legado ne plu alportas novan informon, tuj serĉi la sekvantan interesan informon per la lokaliza aŭ la kribla tekniko.

Ju pli la teksto ne interesas vin, des pli tiuj konsiloj validas. Por teksto pri temo, kiu tute ne interesas vin, plej grave estas fari al si demandojn kies respondojn vi devos serĉi en la teksto. Tiel vi donos celon al via menso, kiu aktivos kiel ĉashundo. Por legado same kiel por veturado, la plej rapida vojo estas direkte al la celo, pro tio necesas koni la celon antaŭ ol komenci la legadon.

(Oni ne parolas ĉi tie pri la porplezuraj legadoj. Ilia celo estas ripozigi la menson de la leganto, do ĝuste la malo de la priskribitaj legteknikoj).

Jen pliaj konsiloj por ŝpari tempon sur nova teksto :

1. Legi la enkondukon, la konkludon, la tabelon de la enhavo. Rigardi la bildojn kaj legi ties titolojn kaj klarigojn.
2. Post la unua paŝo, halti kaj decidi ĉu vi opinias profitdona plua interesiĝo pri la teksto (ĉu en tiuj jam legitaj informoj troviĝas io nova kaj interesa por vi ?). Se la legitaj informoj nur konfirmas tion, kion vi jam scias, tuj saltu al alia teksto; ĉar vi ja scias ke la aŭtoro ĉiam elstarigas la gravajn informojn, precipe komence, por allogi la leganton kaj sekve vi ne povas esperi trovi pli gravajn informojn en la teksto mem.

7 Aneksa : Rilatoj de Emile JAVAL al Esperanto.

D-ro Emile JAVAL (p: emil ĵaval) laŭ la libro "Leteroj de L.L. Zamenhof 1" (p81) ne estis inter la ĉefoj de la franca esperantista movado sed tamen ludis gravan rolon en la kuliso, kaj forte influis Zamenhof, kun kiu li ligi ĝis per delikata kaj profunda sento. Tre konata en la Pariza Societo, eksparlamentano, membro de la franca Akademio pri medicino, eminenta oftalmologo, inventinto de diversaj okulinstrumentoj, inciatinto de raciaj internaciaj vidmezuraj unuoj, li mem fariĝis blinda en 1900 kaj de tiam okupiĝis pri la edukado kaj adaptado de la blinduloj al la socia vivo. Li elpensis aparaton kiu ebligis al li skribi mem krajone siajn leterojn.

Esperanto ŝajnis al li -kiel al Cart- plej necesa helpilo por la disvastigo de la Brajla literaturo. Sed baldaŭ la lingvo mem ekkaptis lian atenton; kaj, ĉar jam en la naciaj lingvoj, li kontraŭbatalis la uzadon de kromsignoj ĉe la latinaj literoj, kiel kaŭzon de plia lacigo de la okuloj, ankaŭ en Esperanto, li deziris alfabeton sen kromsignoj.

D-ro E. Javal koresponde skribis al D-ro Zamenhof en la franca lingvo kaj D-ro Zamenhof responde skribis en Esperanto.

D-ro E. Javal estis judo kiel d-ro Zamenhof. Li invitis D-ro Zamenhof por restadi ĉe li en Parizo okaze de la unua kongreso en Bulonjo ĉe Maro en 1905. D-ro E Javal dediĉis sian libron "Fiziologio de la legado kaj skribado" al D-ro L.L. Zamenhof.

Per siaj amikaj rilatoj kun la ministro pri publika instruado, S-ro Bienvenu-Martin, D-ro Javal atingis ke tiu ordeno Zamenhof per la "Honora legio". Li estis la peranto inter Zamenhof kaj la firmo Hachette por la diskuto de nova kontrakto. Li projektis provizi Zamenhof per oftalmologia asistanto kaj esperantista sekretario. Li publikigis raporton pri sensupersigna alfabeto.

D-ro E. Javal mortis en 1907, Zamenhof verkis por sia amiko, nekrologon, kiu aperis en la marta numero de "La revuo" (Oficiala Verkaro p246).

8 Enhavo

1	Enkonduko	1
2	Analizo de la legado.....	2
2.1	Artikulaciado kaj subartikulaciado	3
2.2	La legkampo	4
2.3	La necesaj okulmovoj	5
2.4	La retroaj okulmovoj	6
2.5	La memoro en la legado	7
3	La kompleta legado	7
3.1	Ekzercoj por eviti la (sub)artikulaciadon.....	35
3.2	Ekzercoj por eviti la konfuziĝojn	37
3.3	Ekzercoj por plirapidigi la okulmovojn.....	41
3.4	Ekzercoj por plilarĝigi la legkampon	44
3.5	Ekzercoj por legi liniojn per unu aŭ du legkampoj	67
4	La kribla legado	87
4.1	Ekzercoj por plivastigi vian legkampon	88
4.2	Ekzercoj pri signalvortoj en listoj.....	91
4.3	Ekzercoj pri signalvortoj en tekstoj	97
5	La lokalizo	101
6	La aktiva legado	102
7	Anekso : Rilatoj de Emile JAVAL al Esperanto.....	103
8	Enhavo	104
9	Eldonoj.....	105

9 Eldonoj

De la sama aŭtoro

Kajeroj aŭ libroj

1. La datentransiga proceduro X25 kun generala enkonduko pri proceduroj. Verkinto. SUK KJ04. 1981. 133p.
2. Unua simpozio pri komputiko. Rennes, Francujo. Julio 1981. Redaktoro . 19 kontribuaĵoj. 269p.
3. La mikroprocesoro INTEL 8080. Tradukinto. 1982. 77p.
4. La programlingvo PASCAL. Verkinto. 1982. 72p.
5. Angla Esperanta Telekomunika Vortaro. Redaktoro. 1983. 76p.
6. BASIC, la programadlingvo. Verkinto. 1984. 156p.
7. AKTUALA KOMPUTIKO Numero 1. Redaktoro. 1985. 56p.
8. Computer dictionary, english-Esperanto (draft) 3800 vortoj aŭ esprimoj. Redaktoro. junio 1985. 106p.
9. Kurso pri rapida legado. Verkinto. julio 1986. 113p.

KURSO PRI RAPIDA LEGADO

Manlaboristo devas havi bonajn ilojn, bonajn maŝinojn por bone labori. Tio ankaŭ validas por la menslaboristo, kvankam la iloj malsamas.

Por la menslaboristo, kiun trafas ĉiutage pli kaj pli da legotaj libroj, raportoj kaj gazetoj, kapablo por rapide legi estas grava avantaĝo.

Tiu kurso estas plia paŝo en la leginstruo, kiun vi ricevis en via infanaĝa lernejo.

Tiu kurso celas proksimume duobligi (eble pli, eble malpli) vian legrapidon kaj tamen kun pli bona kompreno de viaj legaĵoj.

Tiu kurso en Esperanto, kun ekzercoj pri Esperantaj tekstoj, ankaŭ efikos en ĉiuj viaj legadoj en aliaj lingvoj.

Pensu, antaŭ ol legi ion ajn alian, ke tiu kurso povus ebligi al vi legi dufoje pli da libroj aŭ raportoj sen oferi pli da tempo ol kutime al la legado.